

12

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALA)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



TRIA EPOKO : JULIO-AUGUSTO 1924

700.014 - B. Esp

Animo kreskigas korpon

«Kataluna Esperantisto» ne formortis: jen pruvo konvinkega per tiu-ĉi numero. «Kataluna Esperantisto» neniam formortos. Fariĝis tro forta la vivo, la animo de niaj Floraj Ludoj. Tiu granda animo kreskigos malgraŭ ĉiuj cirkonstancoj korpon, ĉar ĝi plene, forte ekzistas, kaj tute nature kaj nepre ĝi naskas sian korpon, kiu ankaŭ nature kaj nepre pro historiaj kaj nunaj kialoj ne povas esti alia ol «Kataluna Esperantisto».

Ĉu vi, eminentaj verkistoj el ĉiuj landoj, kiuj ĉeeste, lege aŭ alipruve konas la forton kaj solenon, la belon kaj efikon de la Floraj Ludoj, ĉu vi ne sentus kiel animan krimon la malaperon de «Kataluna Esperantisto»? — Ĉu vi, ĉiuj, katalunaj esperantistoj, kiuj ĝuas ĉiujare vide, aŭde kaj kompreni la poezian festegon de la Floraj Ludoj, ĉu vi ne sentas la neceson konstati per «Kataluna Esperantisto» ilian okazigon, kaj alporti al ĉiuj mondanguloj la radiojn, la lumon, la eĥon de nia granda Literatura Festo?

Ĉu vi, katalunaj samideanoj, permesus ke nia organo, modelo de esperanta stilo, malnova gazeto kiu ĉiumonate frapas al via pordo kaj vekas vin al la esperantisma sento, ĉesus, subite, vin admoni kaj stimuli, vin fervorigi kaj en via koro renovigi la fajron de l' espero?

Ĉar ni konas vian respondon kaj je ĝi ni kalkulas, ni akceptis en Vich la ŝarĝon daŭrigi la tiel dankindan taskon de la antaŭa Komitato.

Via helpo, katalunaj esperantistoj, ne mankos; ankaŭ ne, nia fervoro kaj nia volo sukcesi.

Delfi Dalmau — Sebastia Alberich — Sebastia Chaler — Ramon Marsà — Artemi Barba — Francisc Pérez — Josep Alberich — Joan Gili — Jaume Herp — Marian Solà.





Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Raporto pri la XI^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Vich: 8-9-10 Junio 1924



DEZA laboro estas verki detalan raporton pri tiom da belegaj festoj, ĉiu el ili plene grava, kiujn ni ĝuas dum nur tri tagoj, okaze de niaj Katalunaj Esperantistaj Kongresoj. Ĉiujare pli kaj pli kreskas la sukceso kaj graveco de ĉiu Kongresa solenaĵo, tiel ke ne plu sufiĉas por doni bildon de ili, raporto farita kalkulante preskaŭ nur je la fideleco de bona memoro. Tial oni pardonu ke ni ne mencios ĉiujn nomojn, nek raportos la sencon de ĉiuj paroladoj, nek rakontos la ĝojon kaj emociion de ĉiuj momentoj, nek pritraktos ĉiujn, absolute ĉiujn detalojn. Ni estos kontentaj, se nur ni sukcesos iom respeguli la impresojn de iu ajn Kongresano.

La raportanto malkaŝas, ke tiaspeca raporto, de li farita jam kelkfoje, lin mem iom tedas... Tamen li klopodos, per la sekvantaj paĝoj, vidigi al niaj eksterlandaj amikoj tion kion ni Kongresanoj vidis, por ke ili sentu niajn proprajn sentojn.

ANTAU LA KONGRESO

La loka gazetaro estis detale raportinta pri la preparaj laboroj. La lastan tagon antaŭ la Kongreso, la ĵurnalo «Gaseto de Vich» aperigis

sur la unua paĝo gravan artikolon de la kataluna verkisto Jaume Collell, «Bonvenon al la esperantistoj...»

En plej videblaj lokoj de la urbo estis grandaj kaj belaj murafiŝoj pri la Kongreso, unuj kun alegoriaj pentraĵoj, aliaj arte presitaj enhavantaj la kongresprogramon.

Ĉe la montrejoj de multaj butikoj estis ekspozataj diversaj esperantaĵoj: premioj disdonataj ĉe la Floraj Ludoj, silkaj rubandoj kun metala surskribo donacotaj al la standardoj de la Esperantaj Grupoj, naciaj aŭ urbaj flagoj senditaj de samideanoj el malproksimaj landoj por ornamu la halon de la Esperanta Ekspozicio, nova standardo de la loka grupo, k. t. p.

Sed la plej grava elmonro de esperantemo de la urbo Vich sendube estis alegoria monumento pri la Paco, kun alta kaj bela statuo, starigita de la Urbestro ĉe la «Rambla», en kruciĝo kun la strato Verdaguer.

DIMANĈO, 8

ALVENO DE LA KONGRESANOJ

Je tagmezo, alvenis la plej granda nombro de Kongresanoj el Barcelona, Terrassa kaj Sabadell, en la oficiala vagonaro. Multaj jam estis alvenintaj per antaŭaj vagonaroj aŭ la hieraŭan tagon. Atendadis ilin ĉe la stacidomo Lia Urbestra Moŝto S-ro Comella, akompanata de aliaj aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj de lokaj societoj, kelkaj el kiuj kunportis siajn standardojn. Ĉe la eniro de la vagonaro en la stacion eksonis tondra aplaŭdado kaj muzikistaro ludis la esperantan himnon. La esperantistoj deiris el la vagonoj kaj tuj granda popolamaso, ĉe kiu bele svarmis la verdkoloraj standardoj de niaj Grupoj, demonstracie sin turnis al la Urbdomo pasante antaŭ la Esperanta Monumento, kiu surprizis kaj entuziasmigis ĉiujn alvenantojn. De la stacidomo ĝis la Urbdomo la esperantistaro trapasis inter du vicoj da sin premanta publiko kaj estis salutata de la enurbanoj ĉe ĉiuj balkonoj kaj fenestroj. La urbaj gvardioj, en solena vestaĵo, zorgadis pri la ordo.

AKCEPTO ĈE LA URBDOMO

En la Salono de Kunsidoj de la Urbdomo estis solene akceptataj la Kongresanoj. Sidis ĉe la prezidejo la Urbestro de Vich, la Delegito de la Militista Direktorio, la Urbkonsilantoj kaj aliaj aŭtoritatuloj, reprezentantoj de lokaj societoj, la loka O. K., la Komitato de K. E. F. kaj Delegitoj de la katalunaj Grupoj.

La Urbestro S-ro Comella bonvenigis katalunlingve la esperantistojn, dezirante al ili agrablan restadon en Vich kaj sukceson en la Kongresaj taskoj.

Ankaŭ salutis la Kongresanojn en hispana lingvo la Delegito de la Militista Direktorio en Vich, kiu faris justan laŭdon pri la kongresurbo.

Respondis al Sinjoroj Urbestro kaj Direktoria Delegito nia samideano Delfi Dalmau, kiu diris en kataluna lingvo belan pledon por Esperanto kaj dankis en la nomo de ĉiuj Kongresanoj la salutajn vortojn. Aplauĉo sonis je la fino de la tri paroladoj.

MALFERMA KUNSIDO

Sinjoro Joan Amades, Prezidanto de la «Kataluna Esperantista Federacio», prononcis elokventan malferman paroladon, en kiu li faris historian skizon pri la vivo de la Kataluna Federacio kaj eltiris la kuraĝigan konkludon, ke, malgraŭ ĉiaj malhelpoj, la esperanta movado en nia lando ĉiam iom progresis. Li konstatis la kreskantan sukceson de niaj Kongresoj kaj Floraj Ludoj, kaj rekomendis al la nove varbitaj samideanoj ke ili fervore daŭrigu tian laboron. Forta aplauĉado sekvis la paroladon de nia Prezidanto.

Salutis la Kongreson la jenaj delegitoj, kiuj parolis la plej multajn en esperanto kaj kelkaj katalune.

S-ro Josep Albagés, el «Bela Espero» (Manresa); S-ro B. Zanón, el «Nova Sento» (Barcelona); S-ro Sebastià Chaler, el «Lumon» (Terrassa); S-ro Joan Comadran, el Esp. Societo «Aplec» (Sabadell); S-ro Miquel Milla, el «Ĝerona Espero» (Girona); S-ro Ramon Marsà, el «Esp Grupo» (Terrassa); S-ro E. Artigas, el la gazeto «La Semisto» (Sabadell); S-ro Jaume Fluvià, el «Esperantista Amikeco» (Manlleu); S-ro. Eduard Capdevila, el «Barcelona Stelo» (Barcelona); S-ro Enric Aguadé, el «Nova Semo» (Reus); Fraŭlino Palmira Castellvi, el «La Metiisto» (Barcelona); S-ro Joan Costa, el «Studenta Juneco» (Girona); S-ro Ramon Soler, el «Ĉiam Antaŭen» (Barcelona); S-ro Pastro Planas, el «Esperanta Nesto» (Ripollet); S-ro Josep Canaleta, el «Esperanta Idealo» (Santa Coloma de Farnés); S-ro Jaume Grau Casas, el «Semo» (Barcelona).

Aparte menciindaj estas la esperantaj paroladoj de S-roj Emilio Gastón kaj Manuel Maynar, el Zaragoza; S-ro Joan Barceló, el Palma de Mallorca, S-ro Jacinto Bremón, membro de la «Lingva Komitato». La tri unuaj amike salutis la katalunan samideanaron, kaj la lasta rememorigis pri la grava tasko de niaj lingvaj institucioj. Oni entuziasme aplauĉis ilin ĉiujn.

Fine parolis, laŭ peto al li farita, la ĉefa organizinto de la Kongreso S-ro Jacinto Comella. Li esprimis sin kun granda emocio, dankante la ovacion per kiu la Kongresanaro lin salutis ĉe lia ekstaro. Li diris ke la Vikaj amikoj klopodis aranĝi Kongreson similan laŭ soleneco kaj sukceso al tiuj de Manresa, Girona, Reus, k. a., kaj li esperas ke ĉiuj samideanoj restos kontentigitaj.

Tie-ĉi ni denove esprimas al nia amiko Comella, kaj ankaŭ al lia afabla edzino kiu fervore helpis lin, la plej koran dankon de ni ĉiuj.

KONGRESINSIGNO

Ĉe la Urbdomo, estis disdonata al la esperantistoj la Kongresa Insigno, farita el bronzo, kun reliefa busto de nia Majstro kaj silueto de la urbo Vich. En la antaŭaj kongresoj la insigno estis simple farita el kartono. Ni devas danki nunjare al la Vikaj amikoj, ke ili *donacis* la kongresinsignon kaj eĉ ĝi estis bronza. Ĝi tre bele aspektis sur la brusto de ĉiu Kongresano... kaj pli bele ankoraŭ sur tiu de niaj Kongresaninoj, pri kiuj ni diru nun ke ili estis pli multaj ol dum la antaŭaj Kongresoj. Jen kiel ankaŭ pri tio ni progresis!

KONGRESLIBRO

Ankaŭ estis donacata al ĉiuj tre bela Kongresa Libro. Ĝi estas 140-paĝa, kun bela kovrilo ornamita per la ŝildo de Vich. Ĝi enhavas: Portreto de D-ro Zamenhof; Organiza Komitato; Programo; Membroj de «Kataluna Esperantista Federacio» (nomoj kaj adresoj); Grupoj Aliĝintaj; Priskribo de la urbo en lingvoj Esperanta kaj Kataluna, kun multaj gravuraĵoj presitaj sur speciala papero kaj du planoj pri Vich kaj ĝia Arkeologia Muzeo; Paĝoj kun reklamoj.

Aparte presita programo estis ankaŭ abunde disdonata.

PROPAGANDA EKSPozICIO

Je la 4^a posttagmeze, estis malfermata la Esperanta Ekspozicio instalita ĉe «Temple Romà». Granda ĉambro de tiu konstruaĵo estis plena de libroj, katalogoj, gazetoj, afiŝoj, poŝtkartoj, k. a. en esperanto. Ornamis la murojn flagoj de multaj nacioj, speciale senditaj de esperantistoj el la koncernaj landoj. En plej honora loko estis marmora busto de nia Majstro kaj granda esperanta flago. Tiu Ekspozicio estis vizitata dum du semajnoj.

VIZITO AL LA KATEDRALO KAJ ARKEOLOGIA MUZEO

Post la malfermo de la Ekspozicio, oni vizitis la Katedralon kaj speciale ĝian belegan klaŭstron, kie troviĝas la tombo de la kataluna filozofo Balmes. Estis ankaŭ vizitata la Episkopa Arkeologia Muzeo, vera juvelo de la urbo Vich.

MUZIKA FESTO

Tiu-ĉi grava kaj belega Muzika Festo, senpaga por la Kongresanoj, okazis en la vasta Vika Teatro kun ĉeesto de la plej distingindaj familioj de la urbo.

Ĉe la eniro, estis disdonata bele presita programo, en kataluna lingvo, kune kun alia presaĵo enhavanta la esperantan tekston de la kantotaj muzikajoj.

S-roj P. Palomas (piano), J. M. Puigcerver (violono) kaj B. Soler (violonĉelo) ludis la Trion n-ro 26 de Haydn, kaj la Hispanan Dancon n-ro 5 de Granados.

Fraŭlino Palmira Castellví, nia estimata samideanino kiu tiel bonevole regalas nin per sia bela voĉo, kantis la jenajn popolokantojn: «Hejmo, dolĉa nom'» (angla); «Jen lando kun arbar'» (dana); «Hieraŭ min petis knabin'» (aŭstra); «Kanto al Marianeto» (kataluna); «Trinkkanto» (pola); «Venecia Gondolkanteto» (itala); «Neutila serenado» (germana) unufoje kantata en esperanto, muziko de Brahms.

La infana fako de la «Orfeo Vigatà» direktata de F-ino Pilar Bach, prezentis katalune la infanajn kantojn kaj ludojn «Són deu noies per casar» (Llongueras), «A la terra del bon pa» (Llongueras) kaj «El casament de Cucut» (Jacques-Dalcroze).

Post ioma paŭzo, F-ino Castellví kantis ankoraŭ: «La floro de la senmorteco» (Ferrer); «Serenado» (Castellví); «Miniatur» (Castellví); «La edziĝo de Figaro» (Mozart); «La reĝo de la elfoj» (Schubert).

Fine, la tuta «Orfeo Vigatà», konsistanta el 200 orfeonistoj lerte direktataj de Pastro Miquel Rovira, kantis bonege la katalunajn «El soldat i la donzella» (Lambert), «La Sileta» (Cumellas) kaj la esperantistan himnon «La Espero», de F. de Menil, kantata kvinvoĉe.

Ĉiu kantita peco estis sekvata de entuziasmaj aplaŭdoj, sed kiam finiĝis la kantado de «La Espero», kiun oni starante aŭskultis, eksonoris impona ovacio kiu daŭris ĝis kiam la Orfeono ekripetis nian himnon, ĉi-tiufoje kantatan de la orfeonistoj kaj kongresanoj samtempe. Estis tre kortuŝa momento, kiun ĉiuj ĉeestintoj longtempe memoros. La orfeonistoj kantis la himnon tre fervore kaj prononcis tute bone kaj klare la konatajn strofojn.

HONORA VERMUTO

Post la Muzika Festo, kaj malgraŭ la tre malfrua horo, la kongresanoj sin turnis al la ĝardeno de la «Katolika Junularo», kie ili estis regalataj per Vermuto kaj kelkaj «specimenoj» de la famaj kaj bongustaj Vikaj kolbasoj. Mallongaj salutaj vortoj interŝanĝiĝis, kaj de tie la kongresanoj disiris al la diversaj hoteloj por vespermanĝi, interkonsentinte ke la Labora Kunsido okazos je la 23^a, anstataŭ je la 22^a.

LABORA KUNSIDO

Ĝi okazis, je la 11^a vespere, ĉe la Urbdomo. Sidis ĉe la prezida tablo la membroj de la Direkta Komitato S-roj Joan Amades, Ramon So-

ler, Eduard Capdevila, Jaume Pruna kaj Jaume Grau Casas, kaj ĉeestis preskaŭ ĉiuj Kongresanoj.

Pro neĉeesto de la Sekretario, la Komitatano S-ro Jaume Grau Casas faris en esperanto parolan raporton pri la agado de la Federacio de post la lasta Kongreso.

Komence li aludis la fakton ke la fermiĝo, laŭ ordono de la aŭtoritato, de la «Enciklopedia Popola Ateneo», sidejo de K. E. F., iom malhelpis la regulan funkciadon de la Komitato. Li esprimis profundan bedaŭron pri tio, ke la malpliiginta nombro de federacianoj ne plu permesis la aperigon de «Kataluna Esperantisto» kaj devigis anstataŭi ĝin per malpli vasta kaj luksa gazeto «L'Esperantista Català»; li instigis varbi pliajn federacianojn por denove ebligi sendaŭgeran vivon de nia presorgano. Li sciigis, ke la Kataluna Federacio jam pagis al la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj kotizaĵon po 300 membroj por la jaro 1924. Li pravigis la decidon de nia Federacio ne aliĝi al la projektata Iberia Esp. Konfederacio ĉar ni estas jam rekonitaj de la K. R. kiel Nacia Societo kaj ni jam havas, el lingva vidpunkto, proprajn reprezentantojn ĉe la Komitato kaj Akademio. Fine li konstatis kun ĝojo ke la lastjare elektita Komitato povis almenaŭ reguligi la financon situacion kaj organizi, kun la valora helpo de la Vikaj amikoj, la nunan sukcesan Kongreson kaj la X^{aj}n Florajn Ludojn. Per aplaŭdo oni aprobis la raporton de la Sekretario.

La Kasisto, S-ro Eduard Capdevila, legas la bilancon, kiu estas aplaŭde aprobata. Estas sukcese, ke nunjare dum la okazo de la Kongreso troviĝas en kaso pli alta sumo ol la antaŭajn jarojn.

La sekretario legas la sekvantajn telegramojn, kiujn oni fervore aplaŭdas:

«Vich-Wien. Plej belan sukceson al via Kongreso deziras Deksesa. Loka Kongresa Komitato Vieno. Soade».

«Vich-Lyon. Bondeziron de (nekomprenebla vorto) kaj sukceson Won Kenn.» (Hina membro de la Lingva Komitato).

«Vich-Barcelona. Mi salutas entuziasme Kongreson. Mi petas transdoni al Kongresanoj mian senkondiĉan aliĝon al alprenotaj decidoj por pli granda propagando de nia kara lingvo internacia, kies elpenso pravas ke malgraŭ ĉio la homo estas inteligenta estaĵo. Stop. Reprezentis min respektinda Pastro Planas. Vivu Esperanto kaj la interna ideo de Esperanto. Frederic Pujulà». (Prezidinto de la V^a Universala Kongreso en Barcelona kaj unua pioniro de Esperanto en Katalunujo).

«Vich-Lorca. Mian aliĝon koran. Bedaŭreĝo pro neĉeesto. Samideanan saluton al ĉiuj. Claramunt». (Vicsekretario de K. E. F.)

«Vich-Armentera. Grupo «Empordana Ebenajo» salutas ĉiujn gesamideanojn kaj deziras grandan sukceson Kongreso. Armengol».

«Vich-Vendrell. Grupo «Frateco» Vendrell salutas Kongresanojn dezirante bonan laboradon por nia kaŭzo esperantista. Prezidanto Marcé».

Per letero ni ricevis la jenajn aliĝojn:

Universala Esperantista Pacifista Ligo — Sekcio Aŭstrujo, S-ro Rudolf Michael Frøy, Wien. — F-ino Louise Briggs, Armley (Anglujo). — S-ro Edouard Jung, Strasbourg (Francujo). — S-ino Emma L. Osmond, London (Anglujo). — «Esperanto Triumfonta», Horrem bei Köln (Germanujo). — S-ro H. A. Luyken, London (Anglujo). — Samideanino Roksano, Marseille (Francujo). — S-ro Joan Gili Norta (Eks-Prezidanto de K. E. F.) el Kolombio (Ameriko). — S-ro Francisco Máñez, Cheste. — S-ro Antonio Mármol, Sevilla. — S-ro René de Lajarte, sekretario de Prof. Th. Cart, Paris. — S-ro Henri Isnard, Marseille (Francujo). — S-ro F. de Menil, Paris. — S-ino Anna Mandič, Fiume (Italujo). — S-ro Julio Mangada Rosenörn, Madrid. — Eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig (Germanujo). — S-ro Francisco Segrelles, Juĝisto, Castelló. — S-ro P. J. Arno, Barcelona. — S-ro Jaume Sales Balmes, Barcelona. — S-ino Alice Brone, Wépion (Belgujo). — S-roj Prezidanto kaj Sekretario de la VI^a Hungarlanda Esperanta Kongreso en Szombathelej. — S-ro Charles Brunet, Bordeaux (Francujo). — S-ro Carlos Bosch, Santander. — S-ro Otto Wilcke, Berlin. — S-ro René Llech, Perpignan (Francujo). — S-ino Regina Weinsberg, Krakow, (Polujo). — S-ro Vicente Orlando, Bahia Blanca (Argentino). — S-ro Euleterio Rosario. Porlamar (Venezuelo). — Fino Ella Fürstner, Orsova (Rumanujo). — S-ro René Beck, Marseille (Francujo). — S-ro Francesco Pizzi, Venezia (Italujo). — S-ro Marcel Laignier, Annecy (Francujo). — S-ro D-ro Bruno Migliorini, Roma.

Kiam la Sekretario estis menciinta la aliĝon de S-ro Joan Gili Norta, prezidinto de nia Federacio, li petis ke la Kongreso montru per aplaŭdo salutan rememoron al nia kara amiko, kion la ĉeestantaro entuziasme plenumis.

S-ro Enric Aguadé proponas, kaj la Kongresanaro aprobas, voĉdonon de danko al la Direkta Komitato kiu ĝis nun zorgis pri la vivo de la Federacio.

Laŭ propono de la Sekretario de la Floraj Ludoj la Kongreso decidis sendi telegraman saluton al S-ro Th. Cart, Prezidanto de la Esperanta Akademio, dankante lin pro la akcepto de la Prezidanta posteno ĉe la nunjaraj Floraj Ludoj, kaj dezirante al li plenan resaniĝon.

Unuanime la Kongreso decidis, laŭ propono de D-ro Bremón, nomi «Honoraj Membroj» de K. E. F. la hispanajn samideanojn S-ron Emilio Gastón kaj S-ron Manuel Maynar, kaj la anglan samideanon F-inon

Louise Briggs, kiuj jam kelkfoje honoris per sia ĉeesto la Katalunajn Kongresojn.

S-ro Josep Albagés proponas, ke oni sendu insignon de la nuna Kongreso al S-ino Vidvino Zamenhof, kun kora saluto. Oni aprobas tiun ĉi proponon per granda aplaŭdo.

La Kongreso esprimas sian dankon al S-ro Jacinto Comella, prezidanto de la loka Kongresa Komitato, pro lia agemo kaj fervoro en ĉiuj prikongresaj aferoj. Nia bona amiko S-ro Comella emocie salutas.

La Prezidanto, S-ro Amades, elokvente parolas pri la devo de ĉiuj fervoraj esperantistoj helpi la starigon de monumento ĉe la tombo de nia Majstro, kaj petas ke la Kongresanoj aĉetu tiucele kuponon el tiuj senditaj de la por-Monumenta Komitato.

LUNDO, 9

ESPERANTA DISERVO

En la arta preĝejo «L'Escorial», je la 9^a matene, solene okazis la Esperanta Diservo, kiun diris Pastroj Josep Planas, el Ripollet; Miquel Vilatimó, el Vich; kaj Miquel Orobítg, el Barcelona. La Vika Orfeono kantis la «Missa del Roser» (Romeu). Ĉeestis preskaŭ ĉiuj Kongresanoj.

Pastro Josep Casanovas, Profesoro ĉe la Seminario de Girona, faris korektan esperantan predikon, sub la Kristvorta moto «Irante tra la tuta mondo, prediku la Evangelion al ĉiuj kreituloj» (St. Marc, XVI, 15), pri la temo: «Ĉu la evangeliaj misioj ne ricevos tre efikan helpon de Esperanto, kiel natura donajo de Dio?» La tuto estis konjektoj pri la profesonaj vortoj de Pio X^a «Esperanto havas antaŭ si gravan estontecon», rilate la misiadon, ĉu por reunuigi la disigitajn kristanajn ekleziojn, ĉu por konatigi la Evangelion al la paganoj.

Oni disdonis esperantan presaĵon rememore pri la Diservo.

X^a Internaciaj Floraj Ludoj



AME kiel dum la antaŭaj jaroj okazis la X^a Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj kun la plej granda soleno. La vasta «Vika Teatro» brile aspektis. Okupis la loĝiojn plej belaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj kaj eminentaj personoj de la urbo. Por la Kongresanoj estis rezervita la antaŭa parto de la parteroj. La scenejo estis bele ornamita, kun riĉa trono por la Reĝino kaj aro de brakseĝoj por la Korteganinoj.

Je la 11^a la tuta teatro estis jam plena de ĉeestantoj avidaj ĝui la belan feston. Baldaŭ eniris, salutataj de longa aplaŭdado, la Vikaj aŭtoritatuloj kaj la samideanoj kiuj konsistigas la Juĝantaron de la Floraj

Ludoj. Ili trairis la parteron, sin direktante al la scenejo, kie ili sidigis: dekstre, Lia Urbeŝtra Moŝto, akompanata de la ceteraj aŭtoritatuloj; maldekstre, la Juĝantaro de la Konkurso, reprezentata de S-roj Jacinto Bremón, Jacinto Comella, Estanislau Pellicer kaj Jaume Grau Casas; la prezidanto de K. E. F. S-ro Joan Amades, kaj kelkaj membroj de la Konservantaro de P' Floraj Ludoj.

Lia Urbeŝtra Moŝto, S-ro Comella, prononcas en esperanto la ritan frazon: «Oni malfermas la Feston».

La Sekretario de la Juĝantaro stariĝas kaj per klara voĉo eklegas sian raporton:

«Sinjorinoj kaj Sinjoroj:

Konfuzite pro la alta kaj nemeritita honoro esti elektita de la Konservantaro de P' Floraj Ludoj por ĉi-tiu posteno, kaj kortuŝite pro la nura antaŭsento de P' beleco de la tuj disvolvigonta Festo de la Poezio, apenaŭ mi kuraĝas aŭdigi mian voĉon, proze parolantan, por iom plenumi la devon raporti al vi la sukcesegan rezulton de la nunaj Internaciaj Floraj Ludoj, je la deka fojo okazantaj, kaj tial havantaj, krom sia propra pozitiva graveco, la signifoplenan karakteron, la kuraĝigan simbolismon de plej ĝoja Jubileo.

Elĉerpitaj de la antaŭaj Sekretarioj de la naŭ okazintaj Floraj Ludoj la laŭdoj ĉiuspecaj al nia ravanta Poezia Festo, mi konstata nur la fakton, kiu per si sola estas la plej forta esprimo de laŭdo, ke la Floraj Ludoj atingis nun la plej riĉan vivon kaj la plej grandan internaciecon, kion pruvas la 145 verkoj el 16 landoj ricevitaj por la nuna Konkurso.

Sed tamen, kvankam riskante ripetadon, estu permesate ankaŭ al mi diri nur kelkajn vortojn de fervora kaj entuziasma komentario pri la valoro de tiu-ĉi poezia solenaĵo.

La Esperantaj Floraj Ludoj ne sole havis la efikon kontribui al la ĝenerala riĉeco de nia literaturo kaj vivigado de nia lingvo, sed ankaŭ, tute speciale, ili akcentis ĉe multaj talentaj esperantistoj la Poeziamon, inklinigante ilin al la verkado de poeziaj pecoj laŭgrade perfektigantaj, kelkaj el kiuj estas veraj juveloj kompareblaj al tiuj de la plej brilaj naciaj literaturoj. Jen do la Esperantaj Floraj Ludoj helpis krei la Internacian Poezion, aŭ almenaŭ la plej internacian formon de Poezio.

La mildaj trobadoroj Provencaj kaj Katalunaj, kiuj dum la Mezepokaj jarcentoj partoprenis la Florajn Ludojn en ilia origino kaj frutempa vivado, ne nur kreis poetikan skolon ankoraŭ nun influantan, sed ankaŭ, per la spirito de siaj kantoj, vivigis kaj pliriĉigis lingvojn, kiuj, sen la helpo de tia poezia riĉeco, eble estus preskaŭ mortintaj pro la batoj de malfavoraj cirkonstancoj historiaj. La komenca riĉeco de naskiĝanta Poeziarto estis la ĝermo el kiu disvolvigis tiuj lingvoj, precipe nia nacia kataluna lingvo, nun post kelkaj jarcentoj plene maturiĝinta. La en la

komenco nura idealo de beleco ebligis al ni Katalunoj postan idealon, nian nunan idealon de justeco kaj nacia digneco.

Nu, simile al la forto kaj efiko de la Poeziarto kulturata de la Katalunaj Floraj Ludoj, eble la forto kaj potenco de la Esperanta Poezio, kiun en la Internaciaj Floraj Ludoj ni ame kulturadas, estos en venontaj tempoj decidiga kaŭzo por la universala alpreno de nia kara helplingvo. Eble la *spirito* de nia Esperanto, kiun pli ol ĉio alia la Poezio naskas, estos la savanta forto evitanta la pereon de la internacia lingvo en la maron de l' indiferenteco. Eble la nomoj de la nunaj Esperantaj poetoj, la antaŭuloj de iu en la estonteco riĉa Esperanta poezio, estos rigardataj post jardekoj kun tiu sama respekto kaj admiro kiun ni katalunoj sentas por niaj poetoj frutempaj kaj klasikaj. Eble la kantoj de la Esperantaj poetoj, kiuj ankaŭ kiel poetoj havas por Majstro nian senmortan Zamenhof, estos por nia lingvo, por la plena kaj definitiva triumfo de nia lingvo, batalanta ĉefe kontraŭ nesciantaj ridoj, moko kaj skeptikecoj, io simila al tio, kio estis la blovo de Dio en la korpon de Adamo.

Kaj ni estu certaj, ke, se la hela Poezio estos ĉiam animo de nia lingvo, ni nepre atingos la venkon. En niaj penadoj, ĉiam nia devizo estu: Poezio, Spirito, Idealo.

Pardonu, ke ĉi-tiuj vortoj volis esti himno de admiro al la poezia sento, kaj nur estis prokrasto de tiu ravanta momento kiam ĉi-tiu loko iĝos Templo de l' Poezio, pro miraklo de l' ĉeesto de nia Reĝino kaj de l' sono de la delikataj pensoj de l' Poeto kies verko atingis la Naturan Floron.

Gesinjoroj:

La Poeto premiita per tiu plej honora premio estas S-ro **Kolomano de Kalocsay**, el Budapeŝto (Hungarujo). Lin reprezentos, ĉar li ne povis veni en nian landon, S-ro Delfi Dalmau, el Barcelona.

Li elektis kiel Reĝinon de l' Floraj Ludoj, por ke Ŝi prezidu la Fes-ton kaj disdonu la premiojn al ceteraj premiitoj, Fraŭlinon **Montserrat Terricabras Fatjó**.

Ni salutu ŝian majeston, Gesinjoroj, kaj per ovacio aklamu ŝian eniron, Gesamideanoj!

La reprezentanto de la premiita poeto suriras la scenejon kaj ricevas de manoj de Sinjoro Urbestro belegan kaj grandan bukedon de ruĝaj diantoj, kiun li iras proponi al la Reĝino, forlasante la scenejon sek-vate de la aŭtoritatuloj kaj esperantaj eminentuloj.

Post mallonga paŭzo, muzikistaro ekludas triumfan marŝon ĉe la momento kiam eniras la teatron Ŝia Reĝina Moŝto kaj ŝiaj kunulinoj de la Ama Kortego, kiuj de la brako de siaj akompanantoj iras okupi sur la scenejo la lokojn al ili rezervitajn. Per ovacio salutas ilin la staranta ĉeestantaro.

Helan belecon radiis ĉiuj korteganinoj, Fraŭlinoj Pepeta Alier, Con-

ĉeĉiό Banús, Maria Bassols, Trinitat Bayés, Patrocini Codina, Montserrat Fatjó, Maria Illa, Elvira de Mas, Carme Puig, Carolina Soler kaj Pilar Vergés, elegante vestitaj per blankaj kaj luksaj vestoj, kaj gracie aspektis la du paĝioj, infanoj Eduard de Arana kaj Miquel Vilà. Ili ĉiuj estis indaj je la majesta beleco de la Reĝino Fraŭlino Montserrat Terricabras Fatjó, kiu ĉarme prezidis. Kiam la aplaŭdoj de admiro estas ĉesintaj, la Sekretario daŭrigas la legadon de sia raporto:

Reĝina Moŝto:

Reĝina Kortego:

Respektplene mi esprimas al Vi, en la nomo de ĉiuj, nian profundan admiron kaj tutkoran dankon. Nian admiron al Via majesto kaj gracio; nian dankon al Via bonvoleco prezidi ĉi-tiun Feston, kiu ĉefe pro Vi estas Festo de Beleco kaj Poezio. Ni riverencas antaŭ Vi, bela Reĝino, ĉarmaj Korteganinoj, kun entuziasmo kiun partoprenas esperantistoj el multaj plej diversaj kaj malproksimaj landoj: tial Vi regas plej vastan regnon; Via Imperio, imperio de Beleco kaj Paco, estas la tuta Esperantujo.

Ekscelencaj Aŭtoritatoj:

Eminentaj Re prezentantoj:

Sinjorinoj kaj Sinjoroj:

Gesamideanoj:

La plenvalora verkaro, kiu meritis la baldaŭ disdonotajn premiojn, estas kvazaŭ bonodora bukedo enhavanta la samtempe akran kaj delikatan parfumon de floroj el ĉiuj landoj. La nunjara literatura rikoltado estis fruktabunda. Abundeco, riĉeco kaj varieco estas la ĉefaj kvalitoj de la verkaro alveninta por la nuna Konkurso, kiu, por plej granda ornamo de nia Florluda Jubileo, estas el la dek okazintaj konkursoj la plej sukcesa. La Juĝantaro ne havis sufiĉajn premiojn por la amaso da premiindaj literaturajoj kaj multajn el ili nur povis mencii. Eĉ kelkaj verkoj restis sen mencio, kvankam ili ja havas rimarkindajn ecojn. Alie ni devus esti menciintaj preskaŭ ĉiujn ricevitajn verkojn, kiuj ĝenerale estas bonstilaj kaj literature valoraj. Dirinte tion por nia senkulpigo, ni tuj transiru al la raportado pri la premiitaj verkoj.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj Tekstoj, I: Versaĵo kantanta Amon. Premio de «Kataluna Esperantista Federacio».

Dek-tri Amaj versaĵoj estas ricevitaj: El ili, kvin estas aparte rimarkindaj. La premion kaj kune la Naturan Floron la Juĝantaro aljuĝis, post atenta esplorado de tiuj kvin verkoj, al la numero 91, kun devizo «Mil

da brulo» titolita «Kisoj». Ĝi estas delikata sinsekvo de poeziaj amaj pensoj, esprimitaj en formo konciza, originala kaj alloga. Ĝia aŭtoro estas la konata poeto kaj eminenta esperantisto Doktoro **Kolomano de Kalocsay**, el Budapeŝt (Hungarujo).

S-ro Delfi Dalmau, reprezentanto de la poeto S-ro Kolomano de Kalocsay stariĝas kaj bele deklamas la versaĵon :

Kisoj

Mi kisas vian manon:
Patrinon kisas fil'...
Estim'. Respekto pia.
Humil'.

Jen kis' al viaj haroj:
De patr' al filinet'...
Dorlot'. Fier' naiva.
Kviet'.

Mi kisas vian frunton:
Fratinon kisas frat'...
Fidela ŝirm'. Kareso
Kaj flat'.

Jen kis' al via vango:
El kamarada kor'...
Komunaj zorgoj, ŝercoj.
Humor'.

Mi kisas vian buŝon...
Mallumo. Fulm' ! Destin' !
Turmento! Rav' ! Komenco
Kaj Fin' !

KOLOMANO DE KALOCSAY

Longaj aplaŭdoj salutis la belan verkon premiitan. Kiam ili estas ĉesintaj, la Sekretario daŭrigas sian raporton:

Unuan Honoran Mencion oni aljuĝas al la verko «La naskiĝo de Amo,» numero 122, devizo «Amo, animo de l' mondo.» Ĝi estas longa lirika versaĵo rimita kun facila arto kaj enhavanta brilantajn pensojn kaj sonorajn esprimojn. Ĝia aŭtoro estas la multfoje laŭrita poeto S-ro Artur Domènech, el Barcelona.

Dua Mencion estas aljuĝata al la verko «Aŭtuna elegio», numero 6,

Suplemento al "Kataluna Esperantisto"

XI^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio


Vich: 8, 9, 10 Junio 1924



La Reĝino de la X^ai Internaciaj Floraj Ludoj,
FRAULINO MONTSERRAT TERRICABRAS FATJÓ




La Reĝino, kun sia Ama Kortego: Fraŭlinoj Pepeta Alier, Concepció Bannús, María Bassols, Trinitat Bayés, Patrocini Codina, Montserrat Fatjó, María Illa, Elvira de Mas, Carme Puig, Carolina Soler, Pilar Vergés kaj paĝioj Eduard de Arana kaj Miquel Vilà.



Kongresanoj elirantaj el la stacidomo.



En direkto al la Urbdomo.



Malferma Kunsido.



Ekskurso al «Les Guilleries».

devizo «Jam jam premiita», belritma versaĵo elspiranta emocion de ampledo. Ĝia aŭtoro estas la talenta samideano S-ro N. V. Nekrasov, el Moskvo (Rusujo).

Trian Mencion meritas la verko «Pli ŝatas mi...», numero 61 devizo «Por gekatalunoj», tre bela versaĵo, verkita laŭ la maniero de la kataluna Manel de Cabanyes, kies temo estas ĝoja ama laŭdo. Aŭtoro estas: S-ro Charles Brunet, el Bordeaux (Francujo).

Kvaran Mencion oni aljuĝas al la versaĵo «Ridu kara», numero 88, devizo «Infano Ĝojo», kiu estas ĝoja alparolo al la Amatino, grazie verkita de la facila poeto Kolomano de Kaloksay.

Originalaj Tekstoj, II: Ama verko en prozo. Premio de «Kataluna Esperantista Federacio».

Kvar verkoj alvenis por ĉi-tiu temo. Oni premias la prozaĵon «Prin-tempo», numero 30, devizo «Remember», kiu estas tre bonstila verkita de S-ro Antoni Durà, el Barcelona.

Mencion meritas la prozaĵo «Mi serĉas vin», numero 96 devizo «Fundamentano», bela kaj plena de emocio. Aŭtoro: S-ro Jakobo Sapiro, el Bialystok (Polujo).

Tradukitaj Tekstoj, I: Traduko de la katalunaj versaĵoj «Visions de Catedral», de Jaume Collèl. Premio de «Kataluna Esperantista Federacio».

El la du ricevitaj tradukoj meritas la premion tiu titolita «Bildoj de Katedraloj», numero 130, devizo «En spirita pilgrimado». Ĝi ne konservas la rimriĉecon de la originalo, sed estas bona asonanca traduko. Aŭtoro: Pastro Ignasi Vinyes, el Santa Maria de Besora.

Tradukitaj Tekstoj, II: Traduko de la kataluna prozaĵo «El gore blanc», de Marti Genis i Aguilar. Premio de «Kataluna Esperantista Federacio».

Oni aljuĝas la premion al la traduko «La Blanka Gurgo», numero 119 devizo «Ĉu gurgo aŭ gorgo?», tre lerte farita de Pastro Josep Casanovas, el Girona.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. Originala verko. Premio de la Ekscelenca Urbeŝtaro de Vich.

Pro la graveco de la premio, konsistanta el tricent pesetoj, la Juĝantaro decidis ne doni ĝin tutan al unu sola verko, sed dividi ĝin en kvar partojn, kiuj estas aljuĝataj al kvar originalaĵoj diversspecaj kaj preskaŭ egalvaloraj. Ili estas:

Verko numero 24, «La Sankta Gralo», kun devizo «Pacemo», tre dokumentita kaj bele verkita studo pri la legendo de la Sankta Gralo, la

smeralda vazo el kiu trinkis Jezuo Kristo. Aŭtoro: S-ro **Jakobo Schmid**, el Bern (Svisujo).

Verko numero 14, «Mia ĝardeno», devizita «Nur mortinte mi ĉesu flegadi mian ĝardenon», poemo en grekaj heksametroj, kun dek-unu kantoj kaj mil cent versoj, kiu estas tre atentinda kiel provo de tiaspeca verko. Ĝia formo estas sufiĉe bona kaj la temo en kelkaj okazoj bone disvolvita kaj interesa. Aŭtoro: S-ro **Edouard Jung**, el Strasbourg (Francujo).

Verko numero 13, «Utopia kaj Kihota», devizo «La steloj ne bruas», literatura studo pri la hispana verko «Don Kihoto» de Cervantes en komparo kun la angla «Utopio» de Thomas More, interesa kaj tre bonstila. Aŭtoro: Sinjorino **Emma L. Osmond**, el London (Anglujo).

Verko numero 77, fragmentoj de romano «La batalo kontraŭ la malhelo», devizo «Etienne», interesplena rakonto pri la impresoj de homo perdinta sian memoron, en perfekta stilo verkita de Sinjoro **St. J. Fethke**, el Bydgoszcz (Polujo).

II. «La Katolikismo kaj la paco». Premio de Lia Moŝto Doktoro Francisko Muñoz, Episkopo de Vich.

El la kvar ricevitaj verkoj pri ĉi-tiu temo, atingas la premion la verko numero 26 «Katolikismo kaj Paco», de S-ro **Jakobo Schmid**, el Bern (Svisujo).

III. Tradukitaj Prozaĵoj (Unua Grupo). Premio de Lia Moŝto S-ro Albert Russinyol i Prats, Parlamenta Deputito de Vich.

La premion destinitan por ĉi-tiu unua grupo de tradukitaj prozaĵoj la Juĝantaro aljuĝis al la verko numero 132, devizo «Trans la vivo», bonega traduko de «La senmorteco», el Maurice Maeterlink. Aŭtoro: S-ro **Marian Solà**, el Terrassa.

Unuan Mencion meritas la verko «Lia filmo», numero 80, tradukita el pola aŭtoro de S-ro E. Fethke, el Bydgoszcz (Polujo).

Duan Mencion atingas la verko «La Virgulino kiel kavaliro», numero 109, tradukita el la germana lingvo de Profesoro Adolf Hainschegg, el Graz (Aŭstrujo).

Trian Mencion oni donas al la verko «Kantaĵo», numero 125, devizo «Fantazio», bona tradukaĵo el la kataluna Joan Maragall, farita de Fraŭlino Dolors Maymi, el Girona.

IV. Originalaj Versaĵoj. Premio de la «Terkulturista Ĉambro Ausetana».

Dek-ok originalajn versaĵojn ni ricevis, el kiuj almenaŭ ses estas plene rimarkindaj.

La premio estas aljuĝata al la verko «Tri benoj», numero 92, devizo «Infane», belega versaĵo de Sinjoro **Kolomano de Kaloksay**, el Budapeŝto (Hungarujo).

Unuan Mencion meritas la numero 86, «Kanto de vagabondo», devizo «Hej, hola!», emocia versaĵo majstre verkita ankaŭ de la poeto Kolomano de Kaloksay, el Budapeŝt (Hungarujo).

Dua mencio: Versaĵo «En la mondon venis nova sento», devizo «Mondon lumigas Verda la stelo», numero 21. Aŭtoro: S-ro Francesco Pizzi, el Venezia (Italujo).

Tria Mencio: «Plendo de Don Juan», numero 90, devizo «Infera kavaliro». Aŭtoro: S-ro Kolomano de Kaloksay, el Budapeŝt (Hungarujo).

Kvara Mencio: «Saluto al la Floraj Ludoj», numero 144, devizo «Jam matenas». Aŭtoro: S-ro Veniamin Vozdvijenskij, el Odessa (Ukrainjo).

Kvina Mencio: «Antaŭen», numero 10, devizo «Antaŭen al la bon'! Antaŭen al la bel'!», marŝkanto laŭ la ario de la franca «Marseillaise». Aŭtoro: S-ro Gustave Roy, el Gaillac (Francujo).

V. Tradukitaj Versaĵoj. Premio de la «Terkulturista Sindikato de Vich».

Ok verkoj partoprenis ĉi-tiun temon. Oni dividas la premion en du partojn, kiujn oni aljuĝas al la verkoj numeroj 136 kaj 4.

La verko numero 136, kun devizo «Plaĉi al ĉiuj neniu sukcesis», estas rakonto el la ĥinda eposo «Maha-Bharata» titolita «Savitri», bonstile tradukita. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Wilhelm Solzbacher** el Honnef apud Rhein (Germanujo).

La verko numero 4, «Legendo bela», estas bona traduko el Longfellow, farita de la lerta esperantistino Fraŭlino **Louise Briggs**, el Armley (Anglujo).

Unua mencio: Verko numero 12, devizo «Bataladu, sed por paco kaj amo!», titolita «La militisto Marsalana», tradukita el la franca lingvo. Aŭtoro: S-ro Edouard Jung, el Strasbourg (Francujo).

Dua Mencio: Verko numero 7, devizo «Aŭburno», titolita «La forlasita vilaĝo», ĉerpaĵo el la poemo de la angla Oliver Goldsmith. Aŭtoro: Fraŭlino Louise Briggs, el Armley (Anglujo).

Tria Mencio: Verko numero 41, «Pacon sur la tero», traduko el la germana lingvo. Aŭtoro: Doktoro Friedrich Francke, el München (Germanujo).

Kvara Mencio: Verko numero 142, «Preteriru», el la rusa Bogdanov. Aŭtoro: S-ro Veniamin Vozdvijenskij, el Odessa (Ukrainjo)

VI. Originalaj Prozaĵoj (Unua Grupo). Premio de la «Vika Industria Societo».

El la naŭ verkoj de ĉi-tiu grupo, meritas la premion la verko «Tjuva», numero 34, belega rakonto bone verkita de Sinjoro **J. Ŝirjaev**, el Baklan-ka (Rusujo).

Unua Mencio: Verko numero 128, «Indulga-sed justa», de Sinjoro Christian Thoma, el Köln-Kalk (Germanujo).

Dua Mencio: Verko numero 116, devizo «La kverka skio», titolita «Du Melodioj». Aŭtoro: Sinjoro Nik. M. Medousov, el Tambov (Rusujo).

Tria Mencio: Verko numero 38, devizo «Se junaĝo sciis-se grandaĝo povus», titolita «Prim-parado-galopado», rememoraĵrakonto el studentaj tempoj. Aŭtoro: Sinjorino Helena Hempel, el Lwow (Polujo).

Kvara Mencio: Verko numero 66, «Mi restos fidela». Aŭtoro: Sinjoro J. von Schmidt, el Steyregg bei Linz (Aŭstrujo).

VII. Tradukaĵo el la kataluna poeto Verdaguer. Premio de la «Katoĵika Junularo» de Vich.

Du tradukoj estas ricevitaj: unu en prozo kaj alia en verso. La premion ni aljuĝas al la versa traduko, numero 126, devizo «Per rozoj Aŭror' ilin kronas», kiu konsistas el fragmentoj de la fama kataluna poemo «L'Atlántida», de Verdaguer, perfekte tradukitaj. Ĝia aŭtoro estas: S-ro **Josep Grau Casas**, el Barcelona.

VIII. Originala teatraĵo aŭ novelo. Premio de la Grupo «Vika Esperantistaro».

Dek verkojn oni grupigis por ĉi-tiu temo. La premion ni dividis en du partojn, unu por teatraĵo, alia por novelo.

La premio por teatraĵo estas aljuĝata al la verko numero 53, devizo «Procede et semper, Italia, semper!», titolita «Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn!», tre sprita komedio lerte verkita de Sinjoro **Arturo Ghez**, el Trieste (Italujo).

La premion por novelo meritas la verko numero 48, devizo «Bonis placuisse maxima laus est», titolita «Rakonto de maljuna klubano», kies aŭtoro estas la konata esperanta novelisto Sinjoro **H. A. Luyken**, el London (Anglujo).

Unua Mencio: Verko numero 83, devizo «Lonjo», titolita «Sukceso», interesa novelo de Sinjoro Jakobo Schmid, el Bern (Svisujo).

Dua Mencio: Verko numero 52, devizo «Tannhäuser», titolita «Montoj kunigas», bela noveleto de Sinjoro Joseph Berger, Córdoba (Hispanujo).

Tria Mencio: Verko numero 56, devizo «Regu vin mem, sentinte mian doloron», titolita «Tell». Aŭtoro: Sinjoro Hans Dahmen, el Horrem bei Köln (Germanujo).

Kvara Mencio: Verko numero 11, devizo «Ad Augusta per Angusta», titolita «Finn Mac Cumhail», bela Irlanda noveleto verkita de Sinjorino Emma L. Osmond, el London (Anglujo).

Kvina Mencio: Verko numero 39, devizo «Kie estas homo, kiu ne mensogas?», titolita «Gajno-ĉu malgajno?». Aŭtoro: Sinjorino Helena Hempel, el Lwów (Polujo).

IX. «La amo al la birdoj». Premio de la «Kanariistoj de Vich».

Ses verkoj konkursis ĉi-tiun temon, el kiuj tri estas rimarkindaj.

La premion ni aljuĝis al la verko numero 134, devizo «Mi amas la birdojn», titolita «Trilarpeĝoj», bela sed iom longa versaĵo kantanta la gojon pri la birdoj. Ĝia aŭtoro estas Sinjoro **Artur Domènech**, el Barcelona.

Unua Mencio: Verko numero 57, devizo «Pasero kaj najtingalo», titolita «La amo al la birdoj», tre gracia kaj belstila prozaĵo de Sinjoro Joseph Berger, el Córdoba (Hispanujo).

Dua mencio: Verko numero 27 «Gaja svato», de Sinjoro Jakobo Schmid, el Bern (Sviŝujo).

X. Bonhumora versaĵo. Premio de la komerca firmo «Vidua de J. Sendra».

El la sep verkoj partoprenintaj ĉi-tiun temon, atingas la premion la verko numero 1, devizo «Ĝoja momento», titolita «Kanto al kolbaso». Ĝia aŭtoro estas Sinjoro **Maksymiljan Blassberg**, el Kraków (Polujo).

XI. Tradukitaj Prozaĵoj (Dua Grupo). Premio de «Vika Kazino».

La premion ni dividis en du partojn, kiujn ni donis al la du verkoj numero 78 kaj numero 107.

La verko numero 78, «Eloe», estas belega prozaĵo majstre tradukita el la pola Marja Czeska, de Sinjoro **E. Fethke**, el Bydgoszcz (Polujo).

La verko numero 107, «Kardi' iradas tra l' arbar' », estas bonega traduko el la germana lingvo, de Sinjoro Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Unuan Mencion meritas la verko numero 133, «Dioj de Milito», de la franclingva aŭtoro Maurice Maeterlink, tre bone tradukita de Sinjoro Marian Solà, el Terrassa.

Dua Mencio: Verko numero 82, «La krimulo», el la pola lingvo tradukita de Sinjoro E. Fethke, el Bydgoszcz (Polujo).

Tria Mencio: Verko numero 103, «Polvereto», tre originala rakonto de la germanlingva aŭtoro Kurd Laszwitz, tradukita de Sinjoro Adolf Hainschegg, el Graz. (Aŭstrujo).

XII. Lingvistika studo. Premio de la gazeto «Kataluna Esperantisto».

Atingis la premion tre bona lingvistika studo titolita «Kontribuajoj al Esperanta etimologio», numero 135, kun devizo «Ĉu ni ne venkos en decida hor' », talente verkita de Sinjoro Doktoro **Bruno Migliorini**, el Roma (Italujo).

XIII. Sciencaj Verkoj. Premio de «Ateneu Enciclopèdic Popular» de Barcelona.

La premion meritas la verko numero 119, devizo «Kiel inter la flo-roj ekzistas helaj kaj malhelaj, bonodoraj kaj senodoraj, belaj kaj nur

utilaj, tiel en la Floraj Ludoj apud la Poezio trovi lokon ankaŭ ĝia serioza fratino: la Scienco». Ĝi estas interesa studo pri «La karaktero de la epilepsiulo», verkita de Sinjoro Doktoro **Walter Lippmann**, el Leipzig (Germanujo).

Mencio: Verko numero 59 devizo «Sterkadu», titolita «Pri la sterkadado de la kulturplantoj», Aŭtoro: Sinjoro Will y Reiner, el Tuttlidgen (Germanujo).

XIV. «Kio plej impresis min dum-mia vivo». Premio de la Grupo «Barcelona Stelo».

El la tri verkoj ricevitaj, atingas la premion la verko numero 43, «La filo perdita», bela kaj kortuŝa rakonto de Sinjoro **Joseph Berger**, el Córdoba (Hispanujo).

Mencion meritas la verko numero 32, kun devizo «Homo sum, nihil humani me alienum est», de Sinjoro Rudolf Pivl, el Trautenau (Ĉeĥo-Slovakujo).

XV. Tradukitaj prozaĵoj (Tria Grupo). Premio de «Círcol Recreatiu Vigatà».

Dek-sep verkojn ni grupigis por ĉi-tiu temo. La premion ni aljuĝas al la verko numero 5, devizo «Rozoj, amo, pio: Bela harmonio!», titolita «La Festo de la Rozoj», Ĝi estas bela kaj milda epizodo el la germana romano «Vampir», bone tradukita de Sinjoro Doktoro **Walter Lippmann**, el Leipzig (Germanujo).

Unua Mencio: Verko numero 79, «Donna Liza», kortuŝanta rakonto bonege tradukita el la pola lingvo. Aŭtoro: Sinjoro E. Fethke, el Bydgoszcz (Polujo).

Dua Mencio: Verko numero 118, devizo «Ave Maria, titolita «La forgesema sendito», belega kaj delikata legendo tradukita el la hungara lingvo, de Sinjoro Jenő Szabó, el Budapest (Hungarujo).

Tria mencio: Verko numero 81, «La kulpo de Judaso», traduko el la pola lingvo. Aŭtoro: Sinjoro E. Fethke el Bydgoszcz (Polujo).

Kvara Mencio: Verko numero 104, «La Virgulino kaj la diablo», el la germana aŭtoro Gottfried Keller tradukita de Sinjoro Adolf Hainschegg, el Graz, (Aŭstrujo).

Kvina Mencio: Verko numero 58, devizo «Amo kaj naturo ĉarmas min», titolita «La vilaĝa poeto», el la hispana lingvo tradukita de Sinjoro Miquel Millà, el Girona.

XVI. Studo pri la Kataluna Lingvo. Premio de la «Mancomunitat de Catalunya».

La premio estas aljuĝata al la verko numero 139, kun devizo: «Non si ama e si difende meno la patria con la forza della lingua che con quella della spada. Aŭtoro: Sinjoro **Frederic Martí Albanell**, el Barcelona.

XVII. Folkloro-Legendoj. Premio de la Revuo «Literatura Mondo».

Atingas la premion la verko numero 18, devizo «Ŝatanto de l'alta kaj ideala ĉe la popoloj», titolita «Bulgaraj popolaj kutimej». Ĝia aŭtoro estas Sinjoro **Ivan H. Krestanoff**, (Bulgarujo).

Unua Mencio: Verko numero 29, «Kristnaska meso en la kapelo de Monteto». Aŭtoro: Sinjoro Jakobo Schmid, el Bern (Svisujo).

Dua Mencio: Verko numero 16, «Tom-Tit-Tot», popollegendo de Orienta Anglujo, devizita «Ŝlosita pord' katenas min». Aŭtoro: Sinjorino Emma L. Osmond, el London (Anglujo).

Tria Mencio: Verko numero 28, «La Folio de Leonardo da Vinci». Aŭtoro: Sinjoro Jakobo Schmid, el Bern (Svisujo).

Kvara Mencio: Verko numero 97, «Civilizacio estas nur haŭtprofunda», kun devizo «Enterigitaj trezoroj». Aŭtoro: Sinjorino Emma L. Osmond, el London (Anglujo).

XVIII. Humorajoj. Premio de «Literatura Mondo».

Kvin verkoj estas ricevitaj. La premion ni donas al la numero 113, «Se oni ridas Esperante», kun devizo «Gajnu la mondon per gaja ridado», tre sprite verkita de Sinjoro **Christian Thoma**, el Köln-Kalk (Germanujo).

Unua Mencio: Verko numero 75, «Mia freneza amiko», kun devizo «Ridu». Aŭtoro: Sinjoro Jan Fethke, el Bydgoszcz (Polujo).

Dua Mencio: Verko numero 40, «Strangaĵoj de niaj prapatroj», kun devizo «Unuafojulo», tre originala fantaziaĵo de Sinjoro Ismael Gomes Braga, el Rio Janeiro (Brazilo).

XIX. Literaturaj studoj. Premio de «Literatura Mondo».

Premio: Verko numero 15, «Iom pri Dostojewski kaj lia verko «Kart-ludanto» kun devizo «Kutimo estas dua naturo». Aŭtoro: Sinjoro **Ivan H. Krestanoff**, el Bulgarujo.

Mencio: Verko numero 46, «Leo Tolstoj kaj lia instruo», kun devizo «Homo havas ankaŭ spiritajn bezonojn». Aŭtoro: la sama Sinjoro Ivan H. Krestanoff, el Bulgarujo.

XX. Originalaj Prozaĵoj (Dua Grupo). Premio de «Literatura Mondo».

Kvin verkoj estas atentindaj el la dek-du ricevitaj. La premion meritis la verko numero 55, «Plenumo de l' devo», kun devizo «Obstine antaŭen», de Sinjoro **Curt Lee**, el Kamenz (Germanujo).

Unua Mencio: Verko numero 31, «Kvarjara heroo», devizo «Mizero kaj espero». Aŭtoro: Sinjoro Otto Wilcke, el Berlin (Germanujo).

Dua Mencio: Verko numero 145, «Bildoj el la mondmilito», devizo «Homa sorto», de Sinjoro Koenig Lajos, el Miskolcz (Hungarujo).

Tria Mencio: Verko numero 114, «La krizo», devizo «Feliĉa sonĝo», de Sinjoro Christian Thoma, el Köln-Kalk (Germanujo).

Kvara Mencio: Verko numero 84, «Mono ne feliĉigas», de Sinjoro Jakobo Schmid, el Bern (Svisujo).

Jen, Gesinjoroj, la rezultato de nia deka konkurso. Aŭdinte pri la multnombraj verkoj premiitaj, vi facile imagos kiom granda estis la laboro de la Juĝantaro, kaj certe oni pardonos se ni en ia okazo iom rapide juĝis. Merititan honoron vi ĉiuj faris al la premiitaj aŭtoroj: ni honoru kaj danku ankaŭ la fervorajn samideanojn ne premiitajn, kiuj certe en venontaj konkursoj, akirinte plian sperton kaj perfektigon, atingos la deziratan sukceson. Ni laŭdu kaj kuraĝigu la amon al la literaturo, ne nur pro la bono kiun ĝi faras el lingva vidpunkto, sed ankaŭ pro la spirita kaj morala altiĝo, kiun kaŭzas la amo al la belaj pensoj, al la belaj esprimoj. Kiu bele parolas, tiu des pli bele agas!

Ni ne timu, ke la literatura flanko de la esperanta movado povos iel malhelpi nian triumfon. Al nia afero, esence lingva, konvenas kreskanta riĉeco literatura. Ne malatentante ĉiun praktikan aspekton de nia movado, ni ne forgesu ke la kulturado de la literatura kampo estas la praktike plej valora penado de la esperantistoj. Per ĝi ni ĉiuj pli kaj pli spirite kuniĝas, ni montras unuj al aliaj la proprajn pensojn kaj sentojn en amika interŝanĝo, ni lernas ĉiujn kaj ĉion koni kaj ami malgraŭ ĉiuspecaj diversecoj, kaj, legante la ĉefverkojn de la originala esperanta literaturo, ĉiu el ni sentas en si korbati la universalan animon!

Koran dankon ni esprimu al ĉiuj helpintaj la sukceson de la Floraj Ludoj: al la malavaraj donacintoj de premioj, al la esperantaj gazetoj kiuj publikigis la «Alvokon», al la sendintoj de konkursaĵoj.

Apartan dankon mi diras al la du ne katalunaj membroj de la Juĝantaro. Dankon al la Prezidanto de la Esperanta Akademio, Sinjoro Th. Cart, kiu, malgraŭ siaj gravaj okupoj, bonvolis akcepti la Prezidantecon de la Dekaj Floraj Ludoj. Bedaŭrinde, pro malsaneco li ne povis tute plenumi sian rolon de Prezidanto; sed la sola honoro kiun li faris al ni, meritas nian tutkoran dankon! Varman saluton al la eminenta poeto Julio Baghy, pro lia valora helpo en la tasko de la Juĝantaro. Nian tutan simpation al li, plenan ankoraŭ de nia admiro pro lia triumfo ĉe la lastaj Ludoj!

Kaj nian dankon, la plej intensan, al Vi, bonvola Reĝino kaj afablaj Korteganinoj, pro la donaco al niaj okuloj de via radianta beleco kaj ĉarma allogo, dum la daŭro de tiu solena festo de Vi tiel inde prezidita. Mi konscias, ke mi ne trafis la ĝustajn vortojn por esprimi al Vi la sentojn de ni ĉiuj, sed via bonvolemo komprenos ilin, per la respekto de mia humila riverenco je viaj Reĝinaj piedoj.

Fine, dankeman saluton al Vi, Ekscelencaj Aŭtoritatoj, kaj al Vi, popolo de la tradiciema urbo Vich, kiu, gastigante tiel fervore nian Esperantan Kongreson kaj Literaturan Konkurson, montris la plej grandan aprobon al la plej granda idealo.»

JAUME GRAU CASAS

Aplaŭdo sonas kiel premio al la peza tasko de la Sekretario.

Ĉiuj premiitoj aŭ iliaj reprezentantoj iris, ĉe ilia alvoko, ricevi la premiojn de manoj de la Reĝino, kaj la aŭtoroj de versaĵoj deklamis ilin. Ĉiuj estis tre aplaŭdataj.

Kiam la Sekretario finis sian raporton, lia frato S-ro Josep Grau Casas, Lingvo Komitatano, kiu estis restinta ĉe la scenejo post legado de lia premiita traduko el «La Atlantido» (kies katalunan originalon li ankaŭ legis), alpaŝas iom antaŭen kaj sin turnas al la publiko en kataluna lingvo, por plenigi la mankon de la kutima Prezidanta parolado, kiun pro malsaneco ne povis sendi la Prezidanto S-ro Th. Cart.

Li esprimis per plej elokventaj frazoj la mirindan taŭgecon de la esperanta lingvo por ĉiuj plej altaj literaturaj celoj, la rimarkindan gravecon de la esperantaj Floraj Ludoj en la riĉigo de la esperanta literaturo, la nediskuteblan ekziston de la esperanta Poezio – kaj tia poetika ebleco estas la plej alta pruvo ke nia lingvo estas flua, viva, homa... Post kelkaj brilaj paraĝrafoj, li subite diris kun granda emocio ke ni per ĉi-tiu solena festo ludus la plej stultan kaj abomenan farson, se ni ne havus absolutan certecon pri la boneco kaj beleco de tiu genie kreita lingvo kiun ni volas fari internacia. Li fine invitis ĉiujn al la lernado de Esperanto, kiu suprenlevas nin al spirita alteco kaj ebligas al ni flugadon tra la vasta mondo...

Ovacio kronis la paroladon de S-ro Josep Grau Casas, kiu kaŭzis videblan impreson sur la publikon.

Fine parolis S-ro Jacinto Bremón, L. K., membro de la Juĝantaro, kiu dediĉis kelkajn rememoraĵajn vortojn al la forestanta Prezidanto S-ro Cart.

Sinjoro Urbestro prononcis «La Festo estas finita» kaj la Reĝino kaj Korteganinoj malsupreniris la estradon kaj trairis la teatron, meze de longa aplaŭdado, akompanataj de la aŭtoritatoj kaj distingindaj samideanoj.

Ĉe la pordo, ili supreniris al la aŭtomobiloj atendantaj ilin kaj sin direktis al la Urbdomo, kie okazis la

DISDONADO DE RUBANDOJ AL LA STANDARDDOJ

S-ro Comella faris mallongan paroladon proponante al la Grupoj tiujn silkajn rubandojn kun metala surskribo rememore pri la Kongreso, kaj Fraŭlino Montserrat Terricabras Fatjó metis ilin sur la standardojn, kiuj sin klinante salutis antaŭ la Reĝino. Krom tiuj de la Grupoj, ankaŭ la standardo de «Orfeo Vigatà» ricevis la honoran rubandon.

OFICIALA FESTENO

Partoprenata de 120 personoj, ĝi havis lokon ĉe «Vika Kazino», en vasta kaj riĉe ornamita salono. Prezidis la Reĝino kaj ŝiaj Kortegani-

noj, akompanataj de la Urbestro, reprezentanto de la laŭreata poeto, aŭtoritatuloj kaj pioniroj. El la menuo, ni menciuj ke la vino, ĉampano kaj likvoroj estis regalo al la Kongresanoj farita respektive de la komercaj firmoj: R. Planas, de Vich; Bodegas Veritas, de Barcelona; A. Vives, de Arenys de Mar. La fraŭlinoj kaj sinjorinoj ricevis ankoraŭ bongustajn bombonojn, donaco de la firmo Bernabé, de Barcelona. Kiam oni malŝtopis la ĉampanon, komenciĝis la longa serio de tostaj paroladoj en lingvoj kataluna, hispana kaj esperanta. Parolis la Urbestro; la Militista Delegito; la kataluna verkisto Martí Genís Aguilar; la Barcelona komercisto S-ro Bassols; S-roj Maynar kaj Gastón, el Zaragoza; S-ro Barceló, el Palma de Mallorca; S-ro Comella, prezidanto de la Kongreso; S-ro Amades, prezidanto de la Federacio; la katalunaj Lingvo-Komitatanoj S-roj Jacinto Bremón, Marian Solà kaj Josep Grau Casas; S-ro Delfi Dalmau, reprezentanto de la poeto Kolomano de Kalocsay; kaj multaj aliaj. Ĉiuj paroladoj estis ĉu laŭdo al la beleco de la Reĝino, ĉu esprimo de simpatio al Esperanto, ĉu reciprokaj salutoj kaj ĝentilajoj. La raportanto, kiu havis la ĝojon sidi inter du babilemegaj kaj simpatiegaj Korteganinoj, ne povas doni pli da detaloj. Ni diru, por fini, ke la elokventecon de ĉiuj tostoj superis la kantado de «La Vojo», per kiu unu fojon ankoraŭ montris sian afablecon nia ĉarma kantantino Fraŭlino Palmira Castellví.

FERMA KUNSIDO

Unuanime estas elektataj por la nova Direkta Komitato la jenaj samideanoj: Prezidanto: S-ro Delfi Dalmau; Vic-prezidanto: S-ro Sebastia Alberich; Sekretario: S-ro Marian Solà; Vic-sekretario: S-ro Sebastia Chaler; Kasisto: S-ro Ramon Marsà; Administristo: S-ro Artemi Barba; Voĉdonantoj: S-ro Josep Alberich, S-ro Joan Gili Norta, S-ro Francesc Pérez, S-ro Jaume Herp.

S-ro Jaume Grau Casas, membro de la eliranta Komitato, rekomendas al la novaj gvidantoj ke ili klopodu restarigi en ĝia tuta graveco la gazeton «Kataluna Esperantisto» kaj laŭeble sekvi ĝian tradicion.

S-ro Sebastia Chaler respondas ke la novaj Komitatanoj kun plezuro klopodu fari tion.

Koncerne la elekton de urbo por la venonta Kongreso, S-ro Grau raportas ke jam de antaŭ kelkaj monatoj li pritraktis kun S-ro J. Barceló, el Palma de Mallorca, nun ĉeestanta, la eblecon okazigi en tiu belega urbo la XII^{an} Kongreson de «Kataluna Esperantista Federacio». Li do petas S-ron Barceló ke li bonvolu diri sian opinion pri tio. S-ro Barceló tre kortuŝite stariĝas kaj esprimas la ĝojon kaj dankon kiujn li sentas, aŭdante la proponon de lia urbo por la venonta Kongreso. Li ĝoje akceptas, en la nomo de siaj samurbanoj, kaj promesas fari ĉion eblan por ke nia Dek-dua estu tiel sukcesa kiel la antaŭaj.

Per ovacio la Kongresanoj salutas S-ron Barceló kaj decidas elekti

por la venonta Kongreso *Palma de Mallorca*, ĉefurbo de la belegaj kaj famaj Balearaj Insuloj.

Nia XII^a Kataluna Kongreso estos do la unua okazanta ekster Katalunujo, tamen en katalunlingva lando. La beleco kaj turisma graveco de Mallorca, la «Orita Insulo», kun siaj mirindaj kavoj, ravaj marbordoĵoj, hela ĉielo kaj blindiga lumo, certe allogos grandan nombron da Kongresanoj. Ankaŭ ili povos ĝui la nekutiman agrablajon de la mara vojaĝo. La traveturo de Barcelona ĝis Palma de Mallorca — unu nokton — en la Junia monato estas kvieta kaj belega. Espereble, la esperantistoj pleniĝos tutan ŝipon de la «Transmediteranea Kompanio».

Per la decido sendi telegramon al la Esperantista Klubo «Palma», sciigantan pri la farita elekto, finiĝas la Ferma Kunsido. Krioj sonas «Vivu Palma de Mallorca» kaj entuziasme oni kantas «La Espero».

DANCADO DE SARDANOJ

En publika placo okazis la dancado de la katalunaj «sardanoj» dediĉata al la Kongresanoj. Multaj el tiuj eniris la dancantajn rondojn, kiuj, per la eniro de la esperantistoj, transformiĝis, ja, en «unu grandan rondon familian».

M A R D O, 10

EKSKURSOJ

Sukcese okazis la du anoncitaj ekskursoj. Tridek gesamideanoj vizitis la antikvegan Monaĥejon de Ripoll, arkeologia monumento, kaj sesdek aliaj faris la ekskurson, aŭtomobile, al la pentrinda kataluna regiono «Les Guillerries».

Tiuj lastaj vizitis la vilaĝon Folgueroles, naskiĝloko de la fama kataluna poeto Verdaguer, antaŭ kies statuo oni deklamis versaĵojn liajn katalune kaj esperante. Poste ili vizitis la Orfejon de Sant Julià de Vilatorrada, en kies Biblioteko ili vidis esperantajn librojn kaj la tutan kolekton de «La Revuo», ricevitaĵojn de unu el la tieaj pastroj, kiu estas esperantisto. Ili reprenis la veturadon ĝis «La Cantina», kie oni tagmanĝis kaj pasigis la posttagmezon tra la arbaro.

Je la 7^a vespere, ĉiuj ekskursintoj denovi estis en Vich. Kvankam la plej multaj Kongresanoj estis jam forveturinta la antaŭan tagon, troviĝis ĉe la stacidomo, atendante la vagonaron al Barcelona, ankoraŭ 60 gesamideanoj. Ili estis adiaŭataj de la Vikanoj, al kiuj ĉiuj dankis ilian afablecon dum la tri Kongrestagoj. Kiam la vagonaro ekmoviĝis, ni ĉiuj disigiĝis agitante ĉapelojn kaj poŝtukojn kaj kriante «Vivu Vich!».

«KOMETO», ĴURNALO DE LA KONGRESO

Dum la tri kongrestagoj aperis tiu ĵurnalo, kun propagandaj artikoloj kaj kongresaj informoj. Ĝi estis tre bona ideo, pri kiu ni gratulas la Vikajn amikojn.

Adiauo de nia Redaktoro

Nia estimata samideano S-ro Jaume Grau Casas, kiu tiel vigle kaj multe laboris por la K. E. F. kaj preskaŭ ekskluzive redaktis ĝian organon dum jaroj, nia tre ŝatata amiko, kiu, por venki ĉiujn danĝerojn al nia Federacio, okaze akceptis sur siajn ŝultrojn ĉies taskon, kaj faris ĉion, kion li povis kaj sciis por pretervivigi nian esperantan organizon super ĉiaj krizoj, pro premantaj personaj okupoj ne plu povas tiel aktive laboradi kun ni.

Tamen li akceptis nian peton, ĉar dum nia Kongreso en Vich li agis kiel Sekretario de K. E. F., de ĝia Kongreso kaj de ĝiaj Floraj Ludoj, redakti ankoraŭ la tutan raporton pri niaj laboroj kaj solenaĵoj en Vich, kies organizadon kaj sukceson ni speciale ŝuldas al nia fervora kaj agema Vika samideano S-ro Jacinto Comella kaj al S-ro Jaume Grau Casas. Ni ankaŭ deziras mencii samideanon Eduard Capdevila kiu estis bonvola helpulo de S-ro Grau.

La raporto, kiu preskaŭ tute plenigas ĉi-tiun numeron, estas la adiaŭa tasko de S-ro Grau kiel Redaktoro de nia gazeto, kaj jenokaze ni esprimas al li nian amikecon kaj dankemon por liaj klopodoj por nia ĉefa Kataluna Esperantista organizaĵo.

Ni bedaŭras, ke nia amiko ne estos kun ni Komitatano, sed ni ĝojas esti certaj ke li alie fervore daŭrigos sian laboradon por kaj en Esperanto. — D. D.

**La nuna numero de «Kataluna Esperantisto» estas
submetita al la milita cenzuro.**


Ni esprimas nian dankon al la polica oficisto Samideano Luis Santamarina, por lia helpemo.

Oficiala Parto

Per tal que la Federació Catalana d'Esperantistes pugui acomplir d'una manera brillant i decidida, com li escau, la seva tasca essencial, impulsar el moviment esperantista de la nostra terra, li cal no veure's abandonada dels samideanoj, sinó amparada per llurs entusiasmes i encoratjada per llur protecció. Cal que tots tinguem present la necessitat ineludible de procurar l'ingrés a les nostres rengleres del major nombre possible de socis, puix quan més nombroses seran les nostres llistes més planera serà la tasca del Comitè i més profitosa. Per tal de donar tota mena de facilitats, el Comitè Directiu ha acordat admetre quotes de tres pessetes per a la segona meitat d'aquest any podent els inscrits nous rebre el «Kataluna Esperantisto» des de l'actual número fins a fi d'any. Creiem que aprofitant aquest avantatge tots els federats i principalment els Grups Esperantistes s'esforçaran a fer ingressar un bon contingent de membres nous, palesant-nos així llur adhesió i el desig d'ajudar-nos en la nostra tasca.

«Barcelona, 16 Junio 1924.

S-ro Prezidanto de la Dua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj.—Bilbao.= Altestimata samideano: = Kiel esperantisto mi ĝojegas saluti vin ĉiujn kun la espero ke via tasko estos sukcesiga por nia sankta afero. = Kiel katalunlingvano, fakto por mi tiel natura kiel la kastillingvaneco de kastiloj kaj ceteraj kastillingvaj hispanoj, mi esperegas ke la estontaj Kongresoj de Iberiaj Esperantistoj havos la bazon de oficiala akcepto de ĉiuj lingvoj nature parolataj en Iberio, aŭ la bazon de oficiala malakcepto de ĉiuj Iberiaj lingvoj. Jen esperantista justeco, jen homaranismo, jen ebleco ke ni ĉiuj estu samrajtaj fratoj. Kaj nur en samrajteco estas ebla vera frateco. — Mi estas feliĉa ke mi povas paroli al esperantistoj, kiuj komprenas kaj konsentas kaj postulas la justecon, ĉar ni celas intergentan pacon kaj amon. — Niaj eminentaj aragonaj samideanoj Sroj. Maynar kaj Gastón spertis en niaj katalunaj kongresoj por Esperanto niajn fratajn sentojn kaj nian fervoron por la sukcesigo de Esperanto al kies interna ideo ni sentas profundan adektecon. = Mi bedaŭregas ke privataj cirkonstancoj malebligas al mi la feliĉon de via persona kunesto, kaj avidas baldaŭan okazon por tia ĝojo. = Vivu kaj efiku Esperanto kaj ĝia interna ideo.= Delfi Dalmau, nova Prezidanto de K. E. F.»



KATALUNA ESPERANTISTO

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfí Dalmau, Marian Solà

Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korrektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj.

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj.

«Deklaracio pri Esperantismo». — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido.) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon. — 1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ cspero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas».

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena akflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon».

Parolado en Esperanto en la Barcelona Ateneo

Nia elokventa samideano el Terrassa, sekretario de la K. E. F., D-ro Marian Solà, membro de la Lingva Komitato, kaj rajtigita de nia Federacio kiel reprezentanto en la Universala Kongreso ĵus okazinta en Vieno, regalos nin per parolado pri tiu Kongreso kaj la granda aŭstria ĉefurbo, la proksiman sabaton, 13 sept. vespere je la 10^a, en la salonego de la Barcelona Ateneo, Carrer Canuda, 6.

Multaj belaj kliŝoj estos samtempe projekciataj, kiuj interesos ankaŭ ne esperantistojn, kiuj eble varbiĝos kiam ili aŭdos la internacian lingvon.

Ceestu, kaj ĉeestigu plejnombre.



Suplemento al "Kataluna Esperantisto"

XI^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio


Vich: 8, 9, 10 Junio 1924



La Reĝino de la X^ai Internaciaj Floraj Ludoj,
FRAULINO MONTSERRAT TERRICABRAS FATJÓ




La Reĝino, kun sia Ama Kortego: Fraŭlinoj Pepeta Alier, Concepció Bannús, María Bassols, Trinitat Bayés, Patrocini Codina, Montserrat Fatjó, María Illa, Elvira de Mas, Carme Puig, Carolina Soler, Pilar Vergés kaj paĝioj Eduard de Arana kaj Miquel Vilà.



Kongresanoj elirantaj el la stacidomo.



En direkto al la Urbdomo.



Malferma Kunsido.



Ekskurso al «Les Guilleries».



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

La nova vida de la K. E. F. Orientació

Amics, hem de parlar un xic íntimament de la nostra organització capdal per fer triomfar en les més altes esferes la llengua auxiliar general en les terres de la nostra llengua natural.

Diguem-ho d'un cop, i diguem-ho ben francament: Ens contradiriem, traïriem el nostre ideal de la solució justa que defensem al magne problema que més ens interessa, qu'és problema de justícia i de cultura, si acceptàvem cap llengua auxiliar altra que l'esperanto, ni cap llengua pròpia altra que la natural.

L'esperanto és la plasmació genial de les essències lingüístiques humanes, del fons lingüístic de la humanitat. El camí únic per a cada home, de penetrar el subsol de la meravella qu'és la paraula humana, és l'estudi i la cultura del propi esperit lingüístic natural, del propi idioma. Altrament no és possible d'atènyer l'inefable goig de sentir l'essència de la paraula. I per a tots els homes del món, la pell de l'ànima lingüística comuna és l'esperanto, la creació del Dr. Zamehof, només possible per un geni intens com tota la humanitat passada i extens com tota la humanitat present, aplicada a crear el fonament de l'idioma neutral de tota la humanitat futura.

Aquesta comprensió esperantista ens dóna l'orientació de la Kataluna Esperantista Federacio.

I com a primera prova de conseqüència i de fidelitat, havem substituït la portada del KATALUNA ESPERANTISTO que presentava la limitació i fronteres polítiques de l'antic Principat de Catalunya, de les « quatre províncies » Tarragona, Barcelona, Girona i Lleida, pels conceptes subs-

tanciosos que no havem de passar sense llegir-los ben sovint fins a fer-los imperatius en la consciència de tots.

KATALUNA per a nosaltres no ha de tenir cap sentit polític, sinó lingüístic, perquè el nostre problema d'esperantistes avui no és polític, sinó lingüístic. I serà una bella prova d'aquesta orientació i fidelitat la celebració a Mallorca, València i Rosselló de vinents Congressos de la Kataluna Esperantista Federació.

ACTIVITAT

El sentiment profund i la comprensió clara d'un ideal poden determinar l'esforç i el sacrifici àdhuc de la pròpia vida per tal de fer-ne realitat. La possibilitat, però, n'ha d'ésser també clara, puix que'l sacrifici inútil és poc menys que una imbecilitat. La possibilitat d'efectuar la bella realitat esperantista universal ja fou vista clara pel Mestre. I si algun esperantista mai té cap dubte, cap tel al seu ideal científicament o filosòficament, podrà desfer-lo llegint «Esenco kaj Estonteco» en el «Fundamenta Krestomatio» i veient la realització dels trenta-set anys d'esperantisme universal que confirma plenament la base de raó i de previsió que tingué el Mestre per veure clara la possibilitat, i avui ja seguretat, de la victòria esperantista al món. Qui podia preveure, sinó la vidència d'un geni integral, que la solució lingüística titllada d'utòpica pels eminents ignorants de l'esperanto havia de fer-los emmudir i avergonyir tan aviat? Qui gosarà avui aixecar la veu contra la prova victoriosa de trenta-set anys, quan ja no hi ha ciutat al món prou gran a contenir els concurrents a un Congrés general esperantista, quan ja els xovinistes francesos han cridat alarmats per la rivalitat internacional de l'esperanto sobre el francès en mantes ocasions, i quan veiem els esperits com per exemple Herriot a França i Rovira i Virgili a Catalunya encarnant una nova realitat a favor nostre contra la rància i hermètica realitat que'ns barrava el pas, fent-nos reaccionar amb més força, de Poincaré i Puig i Cadafalch? — No ens és possible de citar tots els fets com la importància pràctica de l'Universala Esperanto Asocio i l'interès a la Lliga de Nacions, la utilitat en la radiotelefonía, l'ús en els congressos de Comerç i Fires de Mostres, i de catòlics, proletaris, etc., etc., que va establínt-s'hi de l'Esperanto. Però aquesta bella realitat es va fent sentir cada dia més arreu, i ens estimula a complir el nostre deure d'esperantistes. I el fet de compenetrar-se la Kataluna Esperantista Federació amb tots els elements i grups esperantistes del nostre territori, la solidaritat que senten i sentim cada dia més, la sensació de l'eficàcia de l'esforç que fem cadascú i tots plegats, explica el revifament i la nova empena dels grups i societats «Barcelona Stelo», «Nova Sento», «Paco kaj Amo», etc., que farem extensiu a tots els elements iniciats del nostre territori, amb visites de propaganda i d'orientació, que preguem a tots de demanar-nos per tal d'ordenar la campanya a fer des d'ara i que culminarà en el vinent congrés de la nostra Federació.

NECESSITEM DINERS

Els demanem amb la mateixa ingenuïtat del noi que demana berenar quan n'és hora. Amb la mateixa seguretat que no'ns seran negats, perquè comencem oferint nosaltres personalment els nostres diners a més dels nostres esforços. En efecte la nostra actuació durant el període 1924 a 25, en la Junta Directiva de la K. E. F., reunint-nos adés a Barcelona adés a Terrassa que són les dues ciutats de les quals hi ha elements que la componem, i altres despeses personals motivades pel càrrec respectiu, qu'haurérem de pagar de la nostra butxaca privada, pujaran de 50 a cent pessetes a cadascú. — Amics i confederats, en ésser nosaltres elegits en el Congrés de Vich, cap no va sentir avinent d'agrair l'honor, perquè tots vàrem sentir caure damunt les espatlles el deure del càrrec. No som un comitè honorari, sinó un comitè laborari. Per a tenir l'honor, no us demanariem res més després de l'elecció. Però per a fer la labor necessitem a més del nostre esforç especial, i dels nostres diners, el vostre ajut voluntari, sinó d'especial labor i d'aportació metàl·lica alhora, al menys l'econòmic. Hi ha un terme equitatiu d'ajut qu'esperem acceptareu i complireu tots: trametre'ns aquest any cada membre de la K. E. F. dues adhesions, dos membres nous a la K. E. F., o una adhesió i 50 pessetes, o bé 100 pessetes.

Tot i éssent ja milers els esperantistes de llengua catalana, la K. E. F. compta ara només uns trescents membres, després d'una cinquantesena de nous, o baixes retirades, qu'havem aconseguit en els dos mesos de la nostra actuació. — Havent liquidat totes les despeses pendents i hagudes des de la nostra entrada fins avui, ens trobem qu'amb unes noranta pessetes en caixa i unes quantes quotes a fer efectives, és a dir qu'amb prou feines podrem pagar la publicació i tramesa del present número del KATALUNA ESPERANTISTO. I nosaltres i tots vosaltres volem que surti cada mes. La nostra demanda d'ajut és, doncs, plenament justificada i imperiosa i no podem dubtar que'ns l'atendreu, puix qu'en una o altra de les tres formes exposades tots podeu fer-ho.

Dos anys enrera la nostra Federació comptava amb un nombre de vora cinccents membres. Per a tenir vida pròpia en necessita el nombre mínim de 600. L'esforç que tots i cadascú havem de fer ens permetrà, si tots compleixen, d'arribar l'any vinent al dit mínim, si cadascu aporta dos federats nous, o bé 100 ptes. o bé 50 ptes i un federat nou; si tu sol particularment ens envies cent pessetes, o un federat nou i cinquanta pessetes, o bé dues noves adhesions de federat. — Totes les remeses poden adreçar-se al caixer Ramon Marsà, carrer St. Joan, 32, Terrassa; o bé al secretari, Marian Solà, carrer St. Francisco, 12, Terrassa; o al president, D. Dalmau, carrer València, 245, Barcelona.

COMPLINT EL NOSTRE DEURE

Des del número vinent publicarem en el KATALUNA ESPERANTISTO una nota de l'Administrador i una altra del Caixer detallant el moviment de la «Kataluna Esperantisto Federacio», perquè és un deure i una necessitat per l'ajut i la confiança que'ns devem, que sapiguen tots l'estat i la marxa de la nostra organització capdal.

Nogensmenys volem complir el deure d'estudiar i atendre tots els plans i projectes de propaganda i d'acció econòmica que'ns siguin presentats i viables, i, abans del pròxim congrés, mirarem de reunir en consell consultiu tots els presidents de grups i societats esperantistes pertanyents a la K. E. F., per tal d'anar al Congrés conscients tots de les qüestions a tractar-hi.

Nogensmenys curarem de fer examens de capacitat i de professorat per premiar la tasca dels alumnes estudiosos i dels professors intel·ligents i aplicats. — Sense aquests elements no hi hauria hagut esperantisme útil al món; i, doncs, han d'ésser degudament atesos i estimulats.

No cal dir que'ls Jocs Florals Internacionals que constitueixen un timbre de glòria de la K. E. F. per l'atenció que sempre'ls ha atorgat i l'èxit assolit i que'ns recorden la intel·ligència i devoció per l'esperanto del nostre pioner Pujalà i Vallès que va plantar-ne la llavor en el Congrés Universal a Barcelona, mereixeran la cura més entusiasta per tal d'aconseguir en el Certamen vinent la dignitat i la magnificència que requereixen.



XVI^a Universala Kongreso de Esperanto en Wien

6^a-14^a de Aŭgusto 1924^a

Denove falas sur min la tasko verki raporton pri la Granda Internacia Festo de la Esperantistaro.

Antaŭ ol atingi la belan aŭstrian ĉefurbon, mi volis pasigi kelkajn tagojn en la montara regiono de tiu ĉarma lando, kaj tial mi haltis en urbo Salzburg, kie ekzistas krom multaj allogaj vidindaĵoj grupo da entuziasmaj

kaj perfekte nian lingvon parolantaj samideanoj. En hotelo Wolf Dietrich, kiun mi rekomendas al ĉiu vizitonto de la urbo, sidas ankaŭ la esperantista grupo kaj la ĉefkelnero parolas nian lingvon. De tago al tago alvenis en la urbon novaj samideanoj el diversaj landoj, tiamaniere ke ĉiuvespere en la salono de la grupo, ĉiu antaŭ sia bierglaso, ni havis internacian kunvenon. Speciale miaj samurbaroj estas jam tre konataj en Salzburg per korespondado kaj ankaŭ per antaŭaj vizitoj; tio estas sendube la kaŭzo ke mi estis tre kore akceptata kaj ĉiam gvidata de afablaj samideanoj por travidi la urbon kaj ĝiajn admirindajn ĉirkaŭaĵojn. Ĵus antaŭ unu monato la grupo publikigis Gvidlibron de Salzburg en Esperanto, kiu enhavas specialaĵon, tio estas: Programo por pluvaj tagoj; kaj efektive tio estas oportuna ĉar la pluvo estas tre ofta en la lando kaj mi povas tion ĉi atesti per la sola rememoro kiun mi devis alporti kun mi el Salzburg: pluvombrelo.

En la antaŭtago de nia komuna forveturo al Wien, vespere, en la salono de la grupo okazis salutkunveno kun ĉeesto de lokaj aŭtoritatoj, Salzburga gesamideanaro kaj granda nombro da eksterlandaj esperantistoj, ĉar en la lasta tago alvenis ankoraŭ la karavano de S-ro Poncet de Lyon. Mi volas el tiu ĉi kunveno raporti nur pri okazintaĵo kiu tuŝas la katalunajn samideanojn: intér la diverslanduloj kiuj devis alparoli la kunvenon troviĝis ankaŭ mia nomo, sed kiam S-ro Mangada kaj lia stabo sciigis pri tio tuj ekstaris, turnis sin al la Prezidanto de la Grupo kaj kun grandaj gestoj protestis ke kataluna esperantisto estas parolonta inter la naciaj salutantoj: bedaŭrinde la Prezidanto submetiĝis al minacoj de tiuj ĉi ĉarmaj sinjoroj, kiuj, laŭ diro de holandano, donis sufiĉe altan montron de sia samideaneco kaj de sia vantata homaranismo. Mi nur bedaŭras ke tio malebligis al mi publike esprimi mian dankon por la afabla akcepto kiun mi havis en Salzburg, kaj krom tio mi devis ankoraŭ aŭskulti longan kaj plorigan paroladon de S-ro Mangada kaj de iu el liaj kamaradoj, tiel longan kaj tedan, ke post ilia sopirata fino, neniu alia persono povis paroli pro manko da tempo.

Merkredon, la 6^{an} de Aŭgusto matene kune kun miaj Salzburĝaj geamikoj ni forveturis per vagonaro al Linz kaj de tie sur vaporsipo tra la Danubo al Wien, kie ni alvenis je la sesa vespere. Mi ne volas priskribi la ravan vojaĝon por ne trolongigi la raporton, de ĝi mi certe konservos ĉiam agrablan rememoron. Ĉe la bordo de la riverego atendis nin samideanoj kun esperantistaj flagoj kiuj akompanis nin per tramo al la Akceptejo.

Jen mi volas nun rakonti anekdoton, kiun mi dediĉas al S-ro Mangada, laŭ lia diro mem tre ŝatanto de anekdotoj. Kiam multaj kongresanoj, tro ŝarĝataj per siaj valizoj, pretendis surgrimpigi la konvenan tramon kiu atendis antaŭ ili, ili estis tre surprizitaj ĉar en ĝi oni enlasis nur la karavanon de U. E. A. gvidata de S-ro Poncet; kaj multaj esperantistoj kiuj pli rapidis ol la karavananoj estis devigataj longe atendi kaj eĉ iom marŝi kun valizoj sur la dorso por preni novan tramon. Ke tio ĝenis la samideanojn S-ro Poncet mem tion komprenis kaj senkulpigis sin. Sed, malgraŭ la okulvitroj, S-ro Mangada, kiu ankaŭ vojaĝis kun la karavano de U. E. A. ŝajne ne ri-

markis tion, ĉar en la kunsido de la morgaŭa tago li petis la parolon kaj starigis por laŭdi la grandan sukceson kiun ili havis per tio ke ili surgrimpis la tramon antaŭ la nazo de la starantaj samideanoj, kaj pro tio li rekomendis al ĉiu aliĝon al U. E. A. forgesante ke sur la trotuaro troviĝis eble pli da U. E. A.-anoj ol interne de la veturilo. Mi plej respektive rekomendas al S-ro Mangada, ke li elektu temojn vere indajn de granda kunveno, ĉar ni, ĉiulandaj esperantistoj, sidas en kongreso por aŭdi kaj diskuti pri io pli grava ol tio, ĉu li pli-malpli feliĉe surgrimpis veturilon. Kaj por konstati ke tio estas ne nur mia persona opinio sufiĉas legi tiun paragrafon el la raporto pri la Wiena Kongreso, publikigita en n^o 205^a el Esperanto Triumfonta, ĝuste sub la nomo de tiu ĉi sinjoro; ĝi diras jene: Kelkaj esperatistaj oratoroj devas ankoraŭ nepre eduki sin paroli nur laŭteme kaj ne rakonti cent bagatelaĵojn, kiuj bone taŭgas ĉe la biertablo sed ne por oficiala kunsido».

La Loka Komitato de la XVI^a organizis la kongreson kun granda sekreto, ĉar neniu ion sciis pri la programo kaj nenion pri la kongreso oni povis legi en la esperantista gazetaro; tio estas bedaŭrinda fakto kiu timigis multajn alveturantojn kaj ne varbis tiujn personojn, kiuj nur post propagando lasas sin treni. Ankaŭ la unua impresio kiun oni ricevis en la Akceptejo ne estis tre alloga, ĉar tial ke ĉiu kongresano devis sin turni al la sama oficejo fariĝis tie granda tumulto kaj nur post longa puŝado oni sukcesis atingi la oficiston kaj pridemandi lin: almenaŭ tiel okazis en la unua tago, kiam kongresanoj staris en la Akceptejo pli ol dum horo kaj duono antaŭ ol ili povis alproksimiĝi al la oficistoj kaj tio certe estis evitebla per iom pli bona organizado.

Vespere post vespermanĝo, mi vizitis la Esperantistan Kabaredon; mi povas gratuli por la bona aranĝo de la kabaredo, por la perfekta muzikistaro, por la dece aranĝita scenejo, por la bona manĝoservo, sed mi tion ne povas fari por la verkoj el kiuj konsistis la programo. En ili mankis la sprito kaj la bonhumoro kaj tio estas la kaŭzo ke la samideanoj ne plenigis la salonon en la sekvantaj tagoj; krom tio ripeti la saman programon la tutan semajnon estas ja eraro. Kiel ni sopiris al la Nürnberga Kabaredo, al la trupo de Baghy, kiun ni ne vidis en Wieno, kvankam antaŭanoncita en gazetoj.

Ĵaŭdon, la 7^{an} de Aŭgusto, matene je la deka, en salono de la Koncertejo, grandega konstruaĵo, sidejo de la Kongreso, okazas la interna malferma kunsido (la solena malfermo okazonta nur la 10^{an}); D-ro Privat, kiu prezidas, malfermas la diskuton pri la raporto de U. E. A.: li parolas pri la iom pli favora stato de la Asocio, bedaŭras ke ĝi ne kalkulas ankoraŭ 10,000 membrojn kaj admonas al ĉiu varbi novajn ĝis atingo de tiu ĉi nepre necesa nombro. Li ankaŭ petas ke oni subskribu monon por la radio-stacio kiu estos je la dispozo de la esperantistoj se sufiĉa kvanto estos kolektata (legu la artikolon pri tio en la antaŭlasta numero de la gazeto «Esperanto»). Post mallonga debato la raporto estas aprobita kaj oni fermas la kunsidon.

Posttagmeze okazis sennombraj fakaj kunsidoj. Ĉiutage je la tria horo oni povis veturi per luksa, ja tre komforta tramo, al la imperiestra palaco en Schonbrun; simpatia tramisto dum la veturado tra la homplenaj stratoj per perfekte komprenebla Esperanto raportis al la diversnacia societo pri la monumentoj kaj konstruaĵoj videblaj. Mi ne raportos pri la vizito al la palaco ĉar tio estus tre longa.

Vendredon, la 8^{an} de Aŭgusto, matene okazis ankoraŭ fakkunsidoj. Kiel reprezentanto de K. E. F. mi ĉeestis la kunsidon de la Konstanta Reprezentantaro; tie renkontiĝis pli ol dudek delegitoj de naciaj societoj sub prezido de S-ro Merchant, brita delegito, S-ro Edmonds sekretario kasisto kaj D-ro Privat, svisa delegito. La sekretario legis la raporton pri la agado de la K. R. kaj pri la kasaj aferoj; el tiu ĉi raporto oni povas konstati ke nia K. E. F. estas la sola societo, el Iberiaj landoj, kiu akurate pagis sian kotizaĵon al la K. R. kaj sekve laŭleĝe ĝi sola rajtas voĉdoni en la kunsido. Post diskutado estas preskaŭ unuanime akceptita la ŝanĝo proponita en la kontrakto de Helsinki, t. e. ke de nun la Centra Komitato, elektita por tri jaroj, interkonsente de U. E. A. kaj de la K. R. (Naciaj Societoj) havos la zorgon organizi la Universalajn Kongresojn de Esperanto, kaj sekve ne plu ekzistos la Konstanta Kongresa Komitato kiu ĝis nun havis tiun taskon. Oni aprobis ankaŭ ke la oficoj en la Centra Komitato daŭros tri jarojn kaj ke ĝi rajtos disponi pri la kaso de la K. R. kaj la mono restanta en la kongresa kaso sed kun la devo prezenti bilancon de siaj elspezoj por aprobo de la K. R. en ĉiu kongresa kunveno. Oni decidis akcepti kun bedaŭro la eksigon de S-ro Chavet el la Centra Komitato, esprimante al li dankon por la multa laboro kiun li faris por nia movado kaj unuanime estas elektita por lia posteno la franca samideano S-ro Rollet de l' Isle. Oni akceptis ankaŭ mian proponon ke tiuj samideanoj kiuj ne apartenas al nacia societo, nek al U. E. A., kaj tiel neniel helpas nian movadon, se ili aliĝas al la Kongreso devas pagi iun kotizaĵon por subteni niajn internaciajn instituciojn.

Dua kunsido de la K. R. okazis ankoraŭ vespere: oni aŭdis unue paroladon de aŭstra samideano, kies nomon mi forgesis, pri propagando entreprenota kontraŭ Ido; feliĉe en Katalunujo ni tute ne devas okupi nin pri tiu malgaja afero. Poste, D-ro Privat anoncis ke por la venonta jaro venis neniun invito por Kongreso, kaj sekve la Centra Komitato devas aranĝi la aferon; li volis aŭdi la opinion de la ĉeestantoj pri la organizo de la Kongresoj kaj pri tio ĉu ne estus pli bone ke ili okazu nur dujare kaj en la intertempo organizi teknikajn konferencojn pere de Esperanto kiuj havus eble pli da efika rezultato; diversaj opinioj esprimiĝis sed la plej ofta estis ke en la venonta jaro ne okazu kongreso se nur neniun propono alvenos. Multaj kongresanoj deziris ke kongreso okazu en Italujo, sed tio estas nun nebla pro politikaj cirkonstancoj. La delegito de la Dana Societo diris ke eble liaj samlandanoj estas pretaj inviti la Kongreson por la venonta jaro. Tiu ĉi demando pri la organizo de Universalaj Kongresoj estas tre interesa afero

kaj tre malfacile estas respondi al ĝi rapide; tial mi intencas por tio verki specialan artikolon aperontan en alia numero de nia gazeto.

En la sama vespero okazis ankaŭ la Blindul-Koncerto kaj alia koncerto en la Kongresejo.

Sabaton, la 9^{an} de Aŭgusto, matene denove fakkunsidoj kaj vizito al Arta Muzeo. Vespere en la salono de la Kongresejo ni havis la plezuron aŭdi radioparoladojn de niaj pioniroj pere de laŭta parolilo kiu prezidis la ĉambron; poste oni havis ankoraŭ radio-koncerton.

Dimanĉon la 10^{an} de Aŭgusto, en la grandega festsalono en la Kongresejo, je la deka matene okazis la solena Malfermo de la XVI^a: la salonego prezentis plej belan aspekton. Sur la podiumo sidis la urbaj kaj landaj aŭtoritatoj, delegitoj de registaroj, la loka komitato, naciaj delegitoj, k. c. Ekludis la orgeno kaj poste kantistaro per piana akompano perfekte kantis nian himnon kiun ĉiu aŭskultis stare. Oni ne permesis al kongresanaro kunkantikaj mi tion bedaŭras ĉar la impresoj ja estas multe pli imponaj se ĉiuj ĝin kantas unuvoĉe kaj kun akompano de orgeno; la voĉo de malmultaj kantantoj sonis tro mallaŭte en la granda salonego. D-ro Dietterle prezidinto de la antaŭa kongreso malfermas la XVI^{an} kaj proponas kiel prezidanton de la nuna D-ron Mill becke, kiel Sekretariojn S-rojn Kreuz, Edmonds kaj Smital kaj kiel vicprezidantojn diversajn personojn pri kies nomoj mi bedaŭrinde forĝesis. Post la salutparolado de la Prezidanto kaj fervora ovacio al S-ino Zamenhof kaj ŝia juna filino, salutas la Kongreson reprezentanto de la Ministro de Publika Instruado kaj la Vicurbestro de Vien; iliaj vortoj estas tuj al Esperanto tradukitaj. D-ro Privat diris poste sian ĉiam atendatan paroladon, kun granda elokventeco, kaj post li parolis la delegitoj de registaroj, inter kiuj la diplomatia ministro de Pola Respubliko en Vien kiu kolektis bruan aplaŭdadon ĉar li parolas nian lingvon. Post mallonga paŭzo, ankoraŭ salutis la kongreson 43 delegitoj el diversaj nacioj per unu frazo en sia propra idiomo kaj la sama en Esperanto. Bedaŭrinde tiun ĉi fojon ankoraŭ oni ne aŭdis la voĉon de kataluno, ĉar S-ro Mangada, kubano, kiu pro alfabeto ordo estis parolonta antaŭe bonvolis min malŝarĝi de tia tasko, kaj salutis la kongresanojn en la nomo de la hispana registaro, de la baska-esperantistoj, de la katalunaj, de la valenciaj, de la andaluziaj, de la kastiliaj, eĉ de la balearaĵ samideanoj; oni konstato ke liaj ŝultroj estas sufiĉe larĝaj kaj pli larĝa ankoraŭ lia senĝeno. Estas mia devo tie ĉi danki lin por la nepetita favoro kaj por la afabla intenco kiu lin kondukis al tio. Ĉar tiel bone li sukcesis reprezenti pli ol unu nacion, en venonta kongreso mi pensas prezenti proponon similan al tiu ĉi: Por ŝpari la longan tempon bezonatan por la salutoj de naciaj delegitoj ni konfidas al S-ro Mangada, kiu tiel facile scias tion fari, la ŝarĝon saluti en la nomo de ĉiuj nacioj kiuj ĉeestas la Kongreson. Mi pensas ke ĝi estos unuanime akceptata.

Kompreneble mi protestis pri tiu ĉi uzurpado ĉe la Prezidanto de la Centra Komitato kaj kvankam la senkulpiĝo kiun li donis al mi ne tute kon-

tentigis min mi scias ke li malaprobas tiun faron, kaj en la nomo de la K. E. F. mi devas diri ke ni ne toleros tion en estonta Kongreso.

Post la paroloj de la naciaj delegitoj finiĝis la solena malfermo de la XVI^a Kongreso de Esperanto.

Vespere en la granda salono okazis rimarkinda koncerto, unu el la plej belaj festoj el la tuta kongreso.

London, la 11^{an} matene, okazis Ĝenerala Laborkunsido, en kiu estis legataj kaj post diskuto akceptataj la raportoj de niaj lingvaj institucioj de la Konstanta Kongresa Komitato kaj de la Centra Komitato. Oni akceptis ankaŭ diversajn deziresprimojn koncerne la vortarojn. Diskuto estiĝis ankoraŭ pri la organiza demando; oni bedaŭrinde perdas ankoraŭ tro multe da tempo en tiuj jam tedaj debatoj.

Je la tria posttagmeze oni malkovris en la fasado de Hotelo «Hammerand» en Florianigasse, kie nia Majstro loĝis dum siaj studentaj jaroj en Wien, Memortabulon. Granda amaso da samideanoj plenigis la straton kaj aplaŭdis la paroladojn de la Repezantanto de la Urbestaro, de D-roj Privat kaj Blassberg kaj de S-ro Schade, Sekretario de la Loka Komitato. Post tio ĉiuj kongresanoj renkontiĝis antaŭ la Urbdomo kie oni faris fotografajn.

Vespere en la Bürgenteatro okazis la ludado de «La Malŝparulo», sorĉfabelo de Raimund, tradukita de S-ro Zwach. La verko entute plaĉis al la aŭdantaro, la aktoroj bone ludis kaj elparolis la lingvon; nur iom ĝenis min frazoj kiel plaĉas min, estis min, diras min, k. c. tute malkonformaj al la kutima uzado, ankaŭ la uzo de la vorto lernejo en la senco de pentrarta skolo ŝajnas al mi nepardoninda, sed tio estas malgravaj pekoj facile forviŝeblaj. Ĉe la fino de la ludado oni longe aplaŭdis la aktorojn kaj tradukinton de la teatraĵo.

Mardon, 12^{an} okazis ankoraŭ nova Laborkunsido, kiun mi ne povis ĉeesti ĉar mi devis jam forveturi, kaj vespere nova prezentado de «La Malŝparulo». Merkredon, la 13^{an}, okazis la Ferma Kunsido kaj vespere Adiaŭna Festo en la Wiena Naturparko Prater.

Fine jaŭdon, la 14^{an}, la ekskurso al la monto Semmering, pri kiu ankaŭ mi ne povas raportti.

Ĉu la XVI^a Kongreso estis sukceso? jes kaj ne. 3500 personoj aliĝis; laŭ la nuna stato de la movado oni rajtis esperi ke pli vasta nombro da kongresanoj kolektiĝos en Wien. Sed se ni aliflanke konsideras ke la XVI^a estas organizita preskaŭ sen propagando, kun malmultaj informoj, sen iu klopodo allogi vizitantojn, kaj ke tio estas kaŭzo ke multaj esperantistoj restis hejme, ni devos konfesi ke estas ja sukceso ke pli ol tri mil personoj veturis al la Kongreso, eĉ ne konante la programon kiun oni en Wien ĝuos.

MARIAN SOLĂ

Jen bela produktaĵo de la inspiro de nia kara kataluna samideano kaj fervora esperantista poeto, Artur Domènech, kiu meritis la unuan honoran mencion al la Natura Floro de la X^aj Internaciaj Floraj Ludoj.

La naskiĝo de Amo

Devizo:

Amo, animo de l' mondo

Kiam, ĵus l' unuan fojon, ekrugiĝis oriento
per magiaj fajraj ruĝoj de l' giganta suna flam' ,
jen brilegis la rideto de l' Kreint' en firmamento,
kaj tuj, kiel nub' maldensa disigita de la vento,
tra la mondo disvastiĝis ĵuse naskiĝinta Am' .

Tiam, pro influ' magia, ekskuata de fervoroj,
ĝoje tremis kaj sin sentis ekvivadi la natur' ;
kaj pleniĝis la sfer' tuta de belaĵoj, de koloroj,
de lumheloj, de bruetoj, de parfumoj, de sonoroj,
de belec' , de poezio kaj de revoj pri plezur' .

Pli ol iam palpebrumis en ĉielo la stelaro
kiel miloj da okuloj surprizitaj de la mir' ;
baldakenon similante de grandega dialtaro
la ĉiela blua sfero reflektiĝis en la maro
kiel pluv' de diamantoj sur pavimon el safir' .

L' ombroj noktaj, malrapide forpuŝataj de la honto
pro malvenko dum batalo longedaŭra kontraŭ lun' ,
kun fiero sin solene kaŝis preter horizonto,
dum per heiradi' ricevis sur la supro de la monto
blanka neĝ' l' nnuan kison de la fajrlumanta sun' .

Kaj la neĝo transformiĝis, pro mil lumaj variantoj,
en mirindan katarakton, je la sorĉ' de tiu kis' ;
el la mont' malsuprenfalis superŝut' da diamantoj,
pluvoj da rubenoj, perloj, milfacetaj brilantoj,
kaj kaskadoj perlamotoj kun nuancoj de turkis' .

Ekvekiĝis malproksimo: kaj la tulo de nebuloj
de l' venteto disŝirita, kvazaŭ delikata gaz',
transformiĝis en nubetojn orumitajn de sunbruloj
kiuj ŝajnis, super kampoj el smerald', arĝentmakuloj
sur kolosa plafonego el safiro kaj topaz'.

Murmuranta rivereto, de l' florej' kristalserpento,
ekkantetis, trobador' ebriiĝinta je nektar';
florojn kisis; serpentbrilis kvazaŭ strio el arĝento;
plikreskinte ĝi kuniĝis kun la fluo de torento
kaj, iĝinte riverego, forkuradis ĝis la mar'.

Heligante la sablaron per blankhelo brilanta,
ambroperla ŝaŭmo brilis sur marondoj, kiel kron';
kaj la ondoj ekludetis sur sablaro diamanta
dum, de l' malkvieta maro litanie resonanta,
kun eterna ritmo eĥis, ĉe l' rokejo, la kanzon'.

La kreskaĵoj sin ornamis kun la perloj de l' ros' brila;
font' murmuris ĉe la ombro de kvieta arbaret';
aromiĝis la aero tuta per arom' subtila;
la burĝonoj, sur tapiŝo verda kaj velursimila,
floris, kun krakad' de kisoj, de l' florej' en la kviet'.

Arogante malfaldiĝis la folioj de la floroj,
kvazaŭ roboj kun plej ĉarma bril' de silko kaj velur';
la tapiŝon verdan brodis mil diversaj florkoloroj;
la kamparo tuta, plena de la floraj bonodoroj,
iĝis templo kaj sankteĵ' de poezio kaj plezur'.

Ekresonis la trilado de la birdoj en aero,
kvazaŭ en la templo sonus solenludo de orgen':
kaj la triloj de l' birdaro suprenflugis al etero,
kvazaŭ svarma babilado de anĝeloj sur la tero,
kvazaŭ ĥoro de serafoj kaj keruboj en eden'.

Ĉio, sur ĝojanta tero, ekridetis de plezuro
kaj fandiĝis unusente en komuna ĝojaklam':
la parfumoj de la floroj, de l' venteto la murmuro,
la trilado de la birdoj kaj la bluo de l' lazuro,
ĉio, ĉio, gaje festis, pro la eknaskiĝ' de Am'.

Kaj de la moment' unua, de l' natur' en la komenco,
 triumfante sur la tero estis Am' unika reĝ',
 ĝi animo de la mondo, ĝi de l' vivo la esenco,
 ĝi ĉiela senditaĵo kies forto kaj potenco
 tuj montriĝis per regado de mistera amoleg'

Tuj ekamis la venteto petolema l' ĉarmajn florojn,
 inter ili ludetante kun murmuroj de pasi',
 disportante tra la aero ebrügajn bonodorojn,
 kantetante tre mallaŭte dolĉajn, mildajn fajfsonorojn
 kiuj sonis en floreto kiel ama melodi';

Tuj ekamis ankaŭ unuj la aliajn la floretoj
 de l' herbej'; sekretportisto estis blanka papili';
 por fidela trairad' de flor' al flor' kun amaj petoj,
 al flugila kuriero, je l' ricev' de l' amsekretoj,
 ĉiu floro pagis guton da dolĉega ambrozi'.

Tuj ekamis la birdeto flirtadante kun gracio
 l' ampepantan parulinon, inter branĉoj, apud nest':
 iĝis tiam la branĉaro, sub la ombroverd', podio
 kie trile sonoradis, kun mistera harmonio,
 ĉu pasia madrigalo, ĉu triumfa kant' de fest'.

Kaj ekamis en kaŝejoj de arbar' la sovaĝbestoj;
 kaj la fiŝoj rapidmovaj en la fundo de la mar';
 kaj la fortaj rabobirdoj en la altaj siaj nestoj
 kiuj, kvazaŭ nevenkeblaj fortikaĵoj, sur la krestoj
 kuŝas el ŝtonegaj blokoj, de la suproj de l' montar'.

Eĉ la ĝermoj interamis sin, sub ter', kun antaŭsento
 de l' florado de printempo, de l' fruktado de aŭtun':
 krevis imitante kisojn, de l' mallum' en la silento,
 kaj de l' idoj oferdonis la branĉaron al la vento,
 la radikojn al la tero, kaj la fruktojn al la sun'.

Ĉiuj teraj kaj ĉielaj elementoj de l' naturo
 allogataj de amsento kun fervor' dediĉis sin
 al kreado, sur la tero, de vivanta amfiguro
 harmonie laborante, klopodante en konkuro
 por plej bela, kaj perfekta, kaj miriga krei ĝin.

Tero, maro, kaj ĉielo, penon kaj materialon
 por modeli l'amfiguron ekliveris en komun' :
 ter' provizis por la korpo alabastron kaj opalon;
 mar' por dentoj blankajn perlojn kaj por lipoj ruĝkoralon;
 por hararo oran silkon la radioj de la sun' .

La helbuo de l' lazuro kun la mildo de gazelo
 por okuloj kunfandiĝis, per magia sorĉkombin';
 vangoj iĝis el du rozoj; pruntis voĉon la kardelo;
 kaj al palma beltalio aliĝinte perla helo,
 kiel ŝpruc' de kisesenco, eknaskiĝis la virin' ,

Kaj de tiam, de l' komenco de la mondo, virin' restas
 la sanktejo kie ardas la eterna ama flam' :
 celo gaja de la vivo, ŝi per sia ĉarmo estas;
 kaj, vivanta amfiguro, tra l' jarcentoj ŝi atestas
 ke sur ter' la vivo floras ĉar en ĝi reĝadas Am' .

ARTUR DOMÈNECH



Eloe (*)

En arbara soleco ŝi kreskis, malproksime de la homoj, gracia kiel la lilioj de ŝia ĝardeno, pura kiel ili.

Fiere rigardis la maljuna patro sian Eloe; lia celo dumviva estis: gardi tiun infanon kontraŭ avidoj, tentoĵoj, peko... kaj ŝi kreskis tiel bela, kaj ŝiaj grandaj, malhele bluaj okuloj estis en ŝia nekonscio tiel infane senkulpaj.

Dum aŭtuno, kiam la arboj deĵetis la purpuron kaj oron de siaj vestaĵoj, kvazaŭ ili deziregis fordoni sin al la suno en lasta kiso... Kiam la tero fruktograveda ŝajnis sveni pro ĝuo patrineca...

Eloe ne aŭdis la potencajn voĉojn de la naturo, ne komprenis kaj ne deziris kompreni ĉi tiun misteron, kiun ĉirkaŭ ŝi kreis la amo.

* Premiita en la Xaj Floraj Ludoj.

Dum printempo, kiam la floroj kliniĝis en dolĉa senforto forskuante la fruktigan polenon...

Kiam en sufokaj lunaj noktoj kantis la najtingalo kaj la rozoj disvastiĝis ebriiĝan bonodoron...

Kiam la birdoj pretiĝis la nestojn...

Papilioj persekute postflugis sin...

Ŝi sola ne sentis la revigan agordon...

Ŝiaj oreloj estis fermitaj por la misteraj, tentaj vokoĵ de la naturo...

Ŝiajn ĉarmajn, infanajn okulojn eĉ por momento ne kovris nebulo de sopiro...

Ŝi ne konis ĝin...

Sed foje...

Vespero krepuskis.

Ŝi revenis kun la ŝafaro de la altaĵoj, la purpuraj briloj de la suno metiĝis sur ŝiajn nudigitajn brakojn, kiel kisoj... Venteto muĝadis...

Kaj subite kun la muĝo de l' arboj miksiĝis flustreto:

«Venu kun mi!...»

Ŝi returnis sin:

Antaŭ ŝi staris junulo gracia, forta, bela, brilis liaj nigraj belegaj okuloj.

Ili ŝajnis al Eloe kvazaŭ arbaraj fontoj: kvietaj, profundaj... du steloj falintaj de la ĉielo... kaj kiam ili ekbrilis je ŝia rigardo, ili memorigis ŝin pri ĉielo antaŭ fulmotondro en malproksima fajro de fulmoj.

«Venu kun mi...» lia voĉo allogis ŝin per nekonata kareso: «Bela vi estas kiel viaj floroj arbaraj, en la faldoj de via vestaĵo vi portas trankvilon, kvieton... paco fluas el vi. Venu kun mi...» Forta brako ĉirkaŭprenis ŝin direktante en la malhelon de vojeto kondukanta inter piceoj... en malsekantan, abisman profundon...

Ŝi ektemis... ŝi ekrigardis la ŝafaron irantan sur la sunbrilanta vojo, sen paŝtistino.

«Mia patro!?»

«Vi revenos al li... li havis vin dum tiom da jaroj... ĉu por tiu maljunulo ekfloris via ĉarmega beleco? Ĉi ĝojigis lin jam tro longan tempon... mia lilio. Mi kondukos vin en landon, kie la amo havas sanktejon, mi montros al vi, kompatinda infano de montoj, novan mondon nekonatan kaj ravan... venu nur!»

Kaj li kondukas ŝin en la malhelan profundon de piceaj arbaroj.

Estingiĝas la sunaj radioj.

Krepuskiĝas.

Malseketa malvarmo...

Kaj en ŝia animo, unuan fojon dumvive, timo vekigiĝas...

La arbaro, tiu arbaro, en kiu ŝi kuris ĉiun tagon, ŝajnas al ŝi tiel fremda hodiaŭ kaj malamika... ŝi ne ekkonas ĝin preskaŭ.

Tiel strangaj voĉoj el ĝi aŭdiĝas hodiaŭ al ŝi: iaj vokoĵ fremdaj, nekompreneblaj...

Kion ili signifas?... kion?

La vivo krias...

Kaj jen la arbaro finiĝas: en la radioj de l' suno vidiĝas herbejoj plenaj de floroj, tuberozoj bonodoraj ŝajnas bari al ili la vojon, akra odoro de diantoj kaj levkojoj leviĝas kiel fumo el incensiloj, kaj jen densaĵoj de rozoj ŝajnas ankoraŭ nepaŝitaj, malantaŭ ili blankas muroj de iu gotika kapelo: ĝian pordon hedero surkreskis, kvazaŭ kurteno... kaj jen sojlo!

Li levis la hederan kurtenon kaj duone petas, duone ordonas:

«Eniru Eloeo!»

Ŝi ekhezitis dum momento, mallonga kiel ekbrilo: ŝi ekvidis la patron atendanta maltrankvile... vane... la ŝafojn sen paŝtistino kaj la internon de la kabano... mizeran, al ŝi tiel karan... ŝi levis la okulojn kaj renkontis la flamaĵn pupilojn de l' viro... Ŝi eniris...

Vasta ĉambro dronis en la krepusko, de la plafonarkoj je maldikaj, oraj ĉenoj pendis lampo purpura, ĝia sanga brilo lumetigis elegantan larĝan kuŝejon, blankajn rozojn kaj freskojn de l' muroj.

La grandaj miraj okuloj de Eloeo rigardas la pompon de orteksitaj brodaĵoj, de lanecaj feloj kaj de floroj rospertaj kaj levas sin al li, la posedanto de ĉio ĉi.

Li staris kaj ridetis al ŝi:

«Reĝino vi estas ĉi tie...» lia voĉo karesas kiel spiroj de kisoj, kun fiera ebrio ŝi rigardas en liajn okulojn brilantajn en antaŭsento de feliĉo. «Mi amas vin... viajn okulojn, harojn, lipojn... vin tutan... ĉu vi komprenas? tutan Eloeo... Via mi deziras esti, via sola, sed ankaŭ vi volu esti la mia!» Li altiris ŝin al si kaj daŭris paroli: «La arbaro, tiu amiko via, intimulo, kamaraĉo, ankaŭ ĝi, kreu min, amas, «La branĉoj de ĝiaj arboj verdiĝas, kiam suna kareso vekas ilin al vivo. La pomarboj de via frukta ĝardeno tremadas pro ĝuo skuante polenojn... La floroj de viaj herbejoj kliniĝas al si kun malfermitaj kalikoj... La nuda brusto de l' tero fordonas sin al la kareso de l' suno kaj ekfloras... La tuta naturo vokas al amo, aŭskultu ĝian voĉon kaj komprenu, Eloeo...»

Li ĵetis flanken la densajn plektaĵojn hederajn; la luna, varmega nokto juna parolis al ŝi per potencega sorĉo...

Kanto de najtingalo sonis super florkampoj, kantis pasian sopiron, kortuŝan peton, la ĉon de pasigitaj ĝuegoj kaj volon: ilin ripeti.

Ŝi komprenis...

Nebulo malheligis ŝiajn klaregajn okulojn, ŝi levis ilin al li kun konfido, sopiro.

«Amu! amu, Eloeo...»

Lia mano per movo rapida kiel penso ŝiris de ŝiaj ŝultroj ŝian ĉemizon... en la krepusko ekbrilis kiel floro mistera la virga blanko de ŝia korpo.

Kaj ŝi ŝajnis naskita fratino de l' neĝaj rozoj...

«En la landon de eterna feliĉo... de eterna printempo mi kondukos vin.»

Kaj ankoraŭ unu fojon kiel vizio eklumetis antaŭ ŝiaj okuloj la interno de l' patra dometo, ĝis kiam... ŝi falis teren...

Pala matenkrepusko enpenetris tra la koloraj vitroj de l' gotikaj fenestroj, ŝi levis la kapon:

Ŝiaj mirigitaj rigardoj serĉis la hieraŭajn sorĉaĵojn: meze en la plafonarkoj profundaj fendoj minacis ruinfalon, en florbazoj pendetis velkaj rozoj, super la kuŝejoj araneoj plektis kurtenojn, dezerto blovis de muroj skrapitaj...

La lacigitaj okuloj de Eloë fine ekvidis spegulon kaj en ĝi la bildon de ŝia propra vizaĝo, okulojn lace malheligitajn... ve! tio ne estis plu la iamaj ĉielserenaj okuloj, el sub malviglaj palpebroj ili brilis per febrigita brilo... Kaj ŝi vidis siajn lipojn ŝveligintaj de kisoj, tro purpuraj sur la palaj trajtoj de ŝia vizaĝo... Ŝi deturnis sin de tiu ĉi bildo kun tedo kaj ia senlima pentio.

Kaj ŝi renkontis la okulojn de l' viro, neniu postsigno de l' hieraŭaj flamoj, malbrilaj, indiferentaj ili rigardis ŝin el junula vizaĝo kun maljuneca trajto.

Du estingitaj torĉoj...

Du malklaraj fontoj...

Kaj ne plu rimarkis tiuj okuloj la mirindajn liniojn de ŝia korpo, ĉar ilin rigardi ne permesis la malpuraj ĉifonoj de ŝin kovranta ĉemizo, en suna brilo tiel senkompatate malpura...

Poste ili levigis al ŝia vizaĝo:

«Kia alia vi estas hodiaŭ, Eloë!»

Ŝi fleksis antaŭ li la genuojn:

«Jen via amo!... Jen la lando de eterna printempo! Ne deturnigu de mi... mi apartenas al vi... amu!!!»

Ŝiaj brakoj penadis premi lin al ŝia brusto, ŝiaj lipoj sopiris per kisoj ellogi lian kison:

«Mortigu min! Vi donis al mi sonĝon de feliĉo, ne permesu, ke mi postvivu ĝin. Miaj arboj fordonas sin al la suno sed poste mortas... ne atendas ilin malestimo, malhonoro, honto... o lasu min, dividi la sorton de miaj arboj!»

Li klinis sin super ŝi:

«Eloë... mi donis al vi, kion doni mi kapablis, ne estas mia kulpo, ke la legenda nokto de homa feliĉo finiĝas per la tagiĝo de elreviĝoj. Vi, en mi jam ne trovis la hieraŭan amaton kaj mi en vi... vane serĉas la hieraŭan Eloë...»

El renversita florbazo teren falis rozoj velkiĝintaj... li surpaŝis ilin... Sur la sojlo en suna brilo desegniĝis lia forta kaj fleksebla silueto.

«Revenu!»

Ŝian malesperan krion eĥis la montoj.

Li ne revenis.

Ŝi falis apud la rozoj paŝdetruitaj kaj en sovaĝa dolora plorego surfluis ŝin... la kono de l' vivo.

Kiam ŝi levis sin, la subiranta suno agoniis malantaŭ la montoj kaj en ŝi agoniis la animo...

Velkiĝintan, surpaŝitan rozon ŝi levis... ankaŭ nun ili ambaŭ estis fratinoj.

Vane meze en flora herbejo ŝi serĉis la hieraŭan vojon: diskliniĝis antaŭ ŝi la lilioj, karlinoj sangomakulis ŝiajn piedsignojn, malgajaj senodoraj krizantemoj disigis antaŭ ŝi la densaĵon de siaj malĝojaj floroj.

Kaj jen jam la arbaro...

Ŝi returnis sin kaj rigarde ĉirkaŭprenis la floran valon per rigardo profunde malĝoja: proksimiĝis krepusko... incensilaj fumoĵoj de floroj disvastiĝis kiel hieraŭ... meze en la densaĵoj de hedero kaj rozoj trembrilis necerta, purpura lumo...

Ŝi ekvidis du ombrojn starantaj sur sojlo.

Ŝi ekspiris.

Tie jam por alia la vivo preparis nokton iluzi-legendan kaj... elrevigan tagiĝon.

Ŝi deturnis sin.

Nek ombroj arbaraj timiĝis ŝin plu, nek misteraj voĉoj allogis.

Ŝi revenis... el la pala vizaĝo brilis profundegaj okuloj. Ŝi ekvidis fine la patran enteran argildometon, kaj blekado malĝoja de ŝafoj atingis ŝiajn orelojn...

Ĉu hejmen reiri?...

Ĉu iri en la vivon pro novaj pekfaloj kaj novaj larmoj?

Ĉu... en la morto serĉi forgeson?...

Ankoraŭ unu fojon vidi la dometon, la patron, kaj se li forpuŝos ŝin... ĉar ĉu li, kies vivcelo estis eduki ŝin ĉasta, akceptos sub ŝian tegmenton pekfalintinon?... Kaj do, kiam li forpuŝos ŝin... tiam...

Ŝi ekstaris sur la sojlo silente, liaj okuloj atende surprorde fiksitaj, renkontis ŝian mortintan vizaĝon:

«Eloe!...» estis ĝemo, demando.

Ŝi donis al li kun senespere malĝoja gesto rozon paŝdetruitan.

La trajtojn de l' maljunulo aliĝis kolero, doloro, honto...

Do ne gardis ŝin lia ĝemo, sindono, ne evitis ĝin la muteco de l' arbaroj.. la vivo venis postuli la al si apartenantan depagon kaj paŝe ruinigis la multjaran laboron de liaj manoj.

Do li edukis, karesis, amis ŝin pro tio ke nekonato rabis al li la animon kaj korpon de lia infano!?

Obtuza plorĝemo ŝirigis el la brusto de l' maljunulo.

Lia lilieto!

Tiu vizaĝo dolore malvarma, tiuj okuloj rigardantaj en malproksimon de memoroj, tiu trajto de faciĝo... la lipoj sang-makulitaj de kisoj...

Lia lilieto...

Kaj subite li karese alpremis ŝin al sia brusto, kvazaŭ li volis per lar-moj kaj kisoj forlavi de ŝi la hontegon.

Kaj el lia brusto ŝirigis nur ĝemo:

«Infano... kompatinda infano mia...»

Ŝia buŝo kisis liajn nudajn piedojn... doloro de soleco, la travivita nok-to de feliĉo kaj disreviĝo, la suferita senhonorigo... disfluis en larmoj pres-kaŭ feliĉaj.

Ĉar li ne forpuŝis ŝin: en la mirinda, ĉasta lilieto kaj en la pekfalinta virino same li vidis nur sian infanon.

el la pola trad.,

E. FETHKE

LIBERA RUBRIKO

Tridek-sepa datreveno de Esperanto. Pripensoj kaj komentarioj

Lastan julion plenumiĝis la 37-a datreveno de Esperanto.

Nia loka grupo Paco kaj Amo elektis la 3-an de aŭgusto por soleni tiun memorindan daton kaj organizis ĉarman feston en arbaro Càn Cabanyes, apud Montmeló. Tie, en libera aero, loko saturita de pinparfumo, okazis festo partoprenita de ĉirkaŭ ducent personoj. Sporta mateno kaj literatura vespero konsistigis la feston.

Deklamantoj ĝuigis la aŭdantaron per kantoj al la internacia lingvo, laŭdoj al la paciga celo de Esperanto kaj malbenoj al la milito kaj socia malordo.

Paco kaj Amo, en kies programo havas krom la propagando de Espe-ranto la disvastigon de racia kulturo por alten levi la homon, povas esti fiera, ke ĝi kunigis tiom multajn esperantistojn kaj ke tiom da entuziasmo ĝi sukcesis vekti ĉe la partoprenintoj.

La fatko ke 37 jaroj forruliĝis de post la apero de Esperanto, pripensigas min pri la movado nuntempa en Katalunujo. Superrigardo al ĝi ne estos superflua por eltiri konsekvencojn, precizigi nian situacion kaj montri vojojn por eligi ĝin el la kavazaŭmorta aspekto hodiaŭa.

Ĉu ni povas esti kontentaj pri la progreso kaj stato de Esperanto en Katalunujo? Ĉu ni povas diri ke nia irado estas progresanta? Kredeble neniu kuraĝos respondi jese; certe neniu konscia esperantisto objektivite juĝante povas diri ke nia tasko havas kuraĝigan frukton. Estas vero ke en la tutmonda esperantista koncerto ni aŭdigas unu el la plej maldolĉaj sonoj.

Ni ne devas trompi nin mem, ni ne devas fari al ni falsajn iluziojn; la vegetado de nia federacio, la malfacila disvolviĝado de niaj grupoj, el kiuj kelkaj ekzistas nur sur la papero, ne sufiĉas: tian vivon havas eĉ plej banala grupo aŭ movado.

Memkompreneble, tiuj, kiuj kolektiĝas sub la flago de ia grupo, sentas sin oportune kaj eĉ trovas en ĝi ian aktivan vivon, sed oni devas juĝi la aferon pli larĝe, estas necese ĝin pesi kun pli da realeco por alveni al la konkludo, ke malgraŭ la ŝajne aktiva vivo, tia movado ne estas sufiĉe solida.

Multajn jarojn de batalado havas sur si grupoj kiel Aplec, Barcelona Stelo, Nova Sento, Lumon, Paco kaj Amo, tamen facile oni povas konstati ke ilia tuta vivo fluas laŭ sama grado de graveco, sen grandaj reliefigoj, sen rimarkebla progreso, kiu prezentus al nia vido grandan kontentigan pejzaĝon, kiam ni turnas la rigardon al la irita vojo.

La deirpunkto estas kronologie malproksima sed space troviĝas je manatingo. Ni ne povas konstati kun tiu sereniga interna trankvilo, kiun oni sentas ĉe alproksimiĝo al vojaĝcelo, ke ni multon faris, ke ni multajn barojn renversis.

Kion signifas ĉio ĉi? Ĉio ĉi signifas, ke ni devas pliglatigi la situacion kaj ke fariĝas necese harmoniigi nian enlandan movadon kun la disvolviĝado, kiun en aliaj landoj akiris Esperanto. Fariĝas necese duoblige niajn klopodojn, pli profunde identiĝi kun la idealo celata kaj ke ni donu al ĝi la tutan helpon, kiun ĝi meritas kaj postulas por plua antaŭeniro.

Trideksejara batalado rajtas okupi pli altan postenon ol Esperanto okupas sur la kampo de ideoj. Kiom da fortoj vane eluziĝis en la longa forŝoviĝinta tempo! Se pli praktika taktiko estus gvidinta la defendantojn de de la Zamenhofa verko, ni estu certaj ke la horizonto antaŭ niaj okuloj pli hele brilus.

Ni pripensu la aferon. Koncentrigu ni la penson kaj esploru ĉu ni trovas la kaŭzon. Eble ni eltrovos la ĝustan vojon kondukantan nin al pli kontentiga situacio.

Sendube per si mem estas tiel nediskuteble grava la alprenado de neŭtrala lingvo internacia, orfa je partieceoj kaj inklinoj malsanaj, ke ĝi ne bezonas laŭdojn nek pliajn argumentojn, sed, kaj tio estas tre atentinda, la esperantistoj ne devas kontentiĝi per la sola propagando kaj disvastigo de

la lingvo: ili krom tio devas alte taksi ĉiujn problemojn, nuntempe tiel multnombrajn ĉe ni mem, kaj ne sin fordoni al la detruanta fluo de la homaj pasioj.

La kontakto kaj interŝanĝado de ideoj kun homoj el diversaj nacioj kaj rasoj elpravas al ni evidente kiel stulte estas uzataj la naciecoj por vekaj falsajn, koruptitajn instinktojn. Super la politika nacieco, nomo mortiga kaj naŭza, ni starigu la ununuran naciecon tutmondan.

Sub la nomo patrujo—sinonimo de nacieco—oni faris la plej terurajn krimojn. La eŭropa atmosfero estas ankoraŭ infektita de la granda (ho sarkasmo!) milito. Tutajn popolojn la patriotismo starigis por defendi la nacion, la kulturon, la... kapitalismon, pli ĝuste.

Ni rememoru bone ke la adeptoj de Esperanto, tiel predikemaj de paco, facile forlasis la mistikan esperantismon kaj aliĝis la respektivajn vicojn militistajn. La tiel kantita frateco interpopola brue falis je la unua premo de la patriota klavo.

La esperantistoj sin tenis ne pli inde ol tiuj servantoj de dio, kiuj formetis la pastran veston por levi la fratmortigan pafilon. Kian kontraston evidentigas la fatko ke inter la predikata regno de dio kaj la regno de la homoj estas abismo, kiun eĉ la diminstroj ne povis eviti.

Aliajn aspekton prezentas nia problemo sed ĝi estas riskoplena en la nuna tempo. La lingvoj naciaj kaj Esperanto havas intiman rilaton, pri kiu hodiaŭ tie ĉi ni ne povas paroli tiel amplekse kiel ni volus. Sinjorino Anastasie grincigus tondilon kaj ni eble falus en la reton de malsataj ĉasistoj.

Tamen ni provu konkludon: toleremo estu inter ni, ni respektu ĉies lingvojn kaj super ili regu la internacia—universala estus pli ĝusta adjektivo.

Ke Esperanto per si mem, kiel pure lingva afero, ne sufiĉas por tiri la homaron el la malalta nivelo en kiu ĝi baraktas, estas facile konstateble. Ke la simpla uzado de lingvo internacia ne naskos la miraklon homojn malbonajn fari bonajn estas demando, kiu ne eltenas saĝan analizon.

Sekve altrudiĝas serioza studo, altrudiĝas novaj vojoj, se ni volas eliri el la marĉo. Akvo staranta senmove facile putriĝas kaj ni ne devas putriĝi, ni devas eviti senmovecon.

Por tio fariĝas necese loki la lingvan problemon apud pli altajn celojn, kiujn devas subteni ĉiu konscia homo. Nia vivo ne estu ombro, kiu estingiĝos kun la morto. Ni plugu en la kaduka socio profundan sulkon, kiu en es-tonteco brile videbliĝos kaj donos sanan frukton, kiu ĝuigos veran vivon al la homaro.

Sendube estas sufiĉe malfacile difini, kiu celo devas esti la kuniranto de la lingva demando ĉar ĝuste dekoj da tendencoj trenas la homan cerbon, sed la triumfo estas por tiuj, kiuj en sia esenco pli intime akordiĝas kun la leĝoj de la naturo. Ni ne volas difini por tio antaŭe elektitan skolon, kulturon aŭ moralon ĉar pri tio estas ankoraŭ diferencoj inter grandaj filozofoj.

Tamen ni konsentu, ke ĉiuj ideoj meritas respekton, se oni subtenas ilin kun plena konscio kaj nobla konvinko.

Tiel, enkondukante Esperanton en la kampon de nia batalado ĝenerala por la altigo de la homaro, ĝi ricevos nutran sangon el nia vivo, akiros forton kaj fariĝos nia vera celo kunfandiĝinta en tuton harmonian.

La 37-a datreveno estu komenco de nova batalplano akcelonta la definitivan alvenon de racia homaro. Ĝi estu signo de revigliĝo energia en nia kampo, ĝi estu fajrero, kiu bruligos la mondon.

Alta kaj nobla estas nia batalado. Al ĝi ni donu nian vivon mizeran, rampantan sur dornoplana medio, por ĝin eligi el ĝia duonmortinta stato.

Iru ni antaŭen sur la vojo al la paco, amo kaj libereco.

S. ALBERICH JOFRÈ



Bibliografio

(Ni recenzos verkojn duope ricevitajn)

NATAN LA SAĜULO. — Drameca poemo en kvin aktoj de Gotth. Ephr. Lessing. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin kaj Dresden. 1923. 208 paĝoj, 16 × 11 cm. Prezo ne montrita.

Karl Minor, la kritikema germanlingva komitatano, esperantigis la mondkonatan ĉefverkon de Lessing. Nia literaturo akiris duoblan gajnon: majstran ĉefverkon kaj majstran tradukaĵon. La tradukinto sukcese prezentas malpezan lingvaĵon, sen strangaj frazkonstruoj nek trouzo de modernaj vortkonstruoj (multiu, kelkio).

Malmultajn devojigojn ni trovis. Ni notu; krom forkuri (p. 117), al staradi, (p. 118), sen malkaŝi (p. 156). Iajoje la tradukinto permesis al si la uzon de eksterregula apostrofado de l' artikolo; kaj l' (p. 163-171) k. a. Kiel novajn vortojn ni notis: ofri, kalme, *som*-besto, raro, varo, devoteco, precipiti, kombati, kozo, salvi (p. 139), sermono, burŝo, breviero, prinzo, revolto, generi, ekspliki, agnoski, k. a. Preserarojn ni ne trovis.

LA TRAGEDIO DE REĜO LEAR. — Tragedio en kvin aktoj de William

Shakespeare. El la angla lingvo tradukis A. L. Curry kaj A. J. Ashley, 1924. 170 paĝoj, 18 1/2 × 13 cm. Prezo ne montrita.

Iom post iom la verkoj de la fama Shakespeare multnombriĝas en nia literaturo. La tradukintoj elektis unu el la plej energiaj el la verkoj de la angla majstro, sed ili ne plene sukcesis en sia malfacila laboro. En kelkaj lokoj la versojn oni tre malfacile deĉifras kaj la senco restas nekomprenebla, tamen, en aliaj paĝoj la lingvo facile fluas kaj trafe reflektas la energion de la originalo.

Nekonsilindan apostrofadon de l' artikolo ni rimarkis, inter ili, kal l', per l' glavo, k. a. Korektindaj eraroj estas: ago anstataŭ agon (paĝo 12, linio, 86), refleksivoj sia (50-4), siaj (84-29) kaj sia (132-430). Jenajn novajn vortojn ni notis; skitoj, defini, oferti, splena, generi, k. a. Deko da preseraroj enŝovigis.

BABILADOJ DE BONHUMORA ZAMENHOFANO. J. Ŝapiro (Joŝo). Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Esp. Librotrezoro No. 1. 36 paĝoj, ilustrita. Dua eldono 1924. Bialystok, Polujo. Eldonejo J. Ŝapiro, Lipova 33. Prezo 0'50 germ. ormk. aŭ 0'65 sv. fr.

Kvin amuzaj rakontoj pri la diversaj tipoj, kiujn oni trovas ĝenerale en la grupoj kaj vivo de esperantistoj. La stilo estas akceptinda kaj la lingvo gramatike korekta, se ni esceptas la du jenajn erarojn: «manĝis» anstataŭ «manĝas» (paĝo 14, linio 13), «kovrita per malvarma ŝvito» anstataŭ «kovrita de» (p. 17, lasta linio).

SALJO



Esperanto-Movado

BARCELONA. — Antaŭ nelonge komenciĝis ĉe «Ateneu Enciclopèdic Popular», grava ciklo de paroladoj organizita de la lernantoj de la Escola del Treball.

En la programo de tiu ciklo aperis la nomoj de kelkaj eminentaj oratoroj; inter ili, tiu de nia samideano Jaume Grau Casas, kies parolado okazis la 12^{an} de Aŭgusto, pri la temo: UTILECO KAJ NECESO DE LINGVO INTERNACIA; TAŬGAJ KONDIĈOJ DE ESPERANTO.

Li vaste parolis pri la eraroj de tiuj, kiuj opinias taŭga la revivigon de unu el la antikvaj lingvoj kiel tutmonda interkomprenilo.

La lingvoj greka kaj latina, li diras, kvankam ili estas tre riĉaj kaj perfektaj, ne povas adaptiĝi facile al la moderna vivo ĉar ili havas tro nacian karakteron por ludi tian gravan rolon.

Poste li rimarkigis ke esperanto rigore ne estas lingvo artefarita, ĉar ĝi entenas la esencon de la lingvaj reguloj plej komunaj, kio ebligas ke nia lingvo estu al ĉiuj familiara kaj facile asimilebla.

La parolado estis interesa kaj faris bonan impreson sur la multenombrian publikon kiu ĉe la fino varme aplaŭdis la parolinton.

GUIMERÀ

Nia gazeto ĉiam distingiĝis kiel literaturema. Ĝi estas la oficiala organo de la Internaciaj Floraj Ludoj. Patria, Fides, Amor estas la trilogio de la Floraj Ludoj. Angel Guimerà estis la nesuperebla kataluna verkisto je tiuj tri pasioj. Kiam li estis tre juna, ĉirkaŭ 17 jara, pro influo hispaniga de la lernejo, li verkis siajn unuajn poeziaĵojn en hispana lingvo. Sed baldaŭ lia spirito venkis lian kulturon, baldaŭ lia natura genio superegis lian lernejan oficialan kulturon, kaj de tiam li ĉiam verkis en sia patra lingvo, en la lingvo natura de la popolo pro kiu kaj por kiu li speciale inspiris sin; de tiam li sentis, pensis kaj verkis en kataluna lingvo, kaj fariĝis la fidela kreinto, la genia esprimisto de la vivadaj pasioj de Katalunujo dum la 70 lastpasintaj jaroj. Okaze de lia morto la tuta kataluna popolo unuanime montris sian ĉagrenon.

Nia gazeto dolore konstatas la fakton ke la homaro ne plu havas unu el siaj plej eminentaj literaturistoj, kaj plej honestaj viroj en ĉiuj sencoj.

En proksima numero ni publikigos esperantan tradukon de specimena verkaĵo de Guimerà.

Nova Esperantista Grupo en Soller (Mallorca)

Post mallongaj preparaj laboroj, la 15^{an} de Aŭgusto, stariĝis la Esperantista Grupo «Sollerich» kaj elektis la jenan Direktantan Komitaton.

| | | |
|------------------------------------|-------|----------------------|
| Prezidanto | S-ro | M. Arbona Oliva |
| Vicprezidanto | » | J. Bestard Cánaves |
| Sekretario | » | M. Serra Pastor |
| Vicsekretario | » | B. Coll Ozonas |
| Voĉdonanto-Kasisto | » | J. Coll Arbona |
| Voĉdonanto-Bibliotekisto | » | A. Cañellas Muntaner |
| Voĉdonantasesorino | F-ino | F. Pizá Castañer |
| » | » | F. Pizá Bermarar |

Tiu ĉi ĵus naskiĝinta societo varme salutas ĉiujn samcelantajn societojn kaj grupojn.

La 17^{an} de sama monato, solene oni malfermis la unuan kurson de Esperanto, kiu estis ĉeestata de multaj personoj. Prezidis la Urbestro kaj ĉeestis multnombraj reprezentantaroj de Esperantista Klubo Palma, de la Ruĝa Kruco kaj de la Asocio Prokultura de Mallorca.

Alparolis la ĉeestantaron S-ro Sancho, komitatano de Esp. Klubo Palma, klarigante la utilecon de Esperanto kaj facilecon de ĝia lernado.

S-ro Barceló, Delegito de U. E. A. en Palma, faris mallongan klarigon pri la gramatikaj reguloj de la lingvo Esperanto.

Poste S-ro Alomar, prezidanto de Esp. Klubo Palma, salutis je la nomo de tiu ĉi societo la novan grupon kaj per ĉirkaŭpreno donita al ĝia prezidanto simboligis la unuiĝon kaj fratecon kiuj devas regi inter ambaŭ societoj.

S-ro G. Colom je la nomo de la Prokultura Societo de Mallorca gratulis la membrojn de la nova grupo pro ilia ekagado kaj laŭdegis la valoron de l' parolo kiel antaŭenpelantan forton en la kultura progresado de l' popoloj, kiu ajn lingvo estas uzata.

Fine la Prezidanto de l' Esperantista Grupo «Sollerich» esprimis sian dankemon al ĉiuj ĉeestantoj, al la komisiono organizinta la Grupon kaj al ĉiuj, kiuj bonvoleme rigardis la klopodojn por la divastigo de Esperanto en la urbo Soller.

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la milita cenzuro.

Delegats de la K. E. F.

La reorganització de la nostra Federació és cosa urgent i irremissible. Preguem a tots els delegats de K. E. F. que se'n senten i volen oferir tota l'activitat necessària per assegurar-ne una bona marxa, que'ns ratifiquin aqueixa disposició personal abans de fi de setembre corrent. El que no ens expressi en aquest termini el seu propòsit de l'acurada i necessària activitat — que no consisteix més que a fer-nos efectives les quotes dels federats de sa localitat, comunicar-nos tota nova alta, baixa o anormalitat o notícia de moviment esperantista i respondre les comunicacions de la Junta de K. E. F.—serà considerat renunciador del càrrec de delegat, que la nostra organització necessita efectiu a cada ciutat i a cada entitat esperantista local del territori que abracem.



Per amor a tots els Déus, per respecte a la lògica, per dignitat de pensament, no dieu més “jo em faré federat quan veuré els fruits de la K. E. F.” — Seguint un tal principi tothom hauria esperat a veure els fruits de l’esperanto abans de fer-se esperantista, i cap progrés no hauria mai reeixit.

Federació Catalana d'Esperantistes

Aquesta entitat, fundada poc després del V.^è Congrés esperantista Universal a Barcelona, en 1909, amb l'objecte (Art. 2.^{on} dels estatuts) *d'unir tots els esperantistes de terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto.*

CELEBRA anyalment, amb motiu de la seva reunió general, brillants Congressos Esperantistes, portant-ne ja 11 de realitzats a Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, Sant Feliu de Guixols, Vilanova i Geltrú, Manlleu, Girona, Manresa i Vich.

ORGANITZA els Jocs Florals Internacionals que són celebrats simultàniament amb els nostres Congressos, contribuint així a l'enriquiment de la literatura esperantista.

PUBLICA com a òrgan federatiu la revista mensual «Kataluna Esperantisto», gratis per als adherits, en la qual apareixen interessants informacions sobre el moviment esperantista mundial, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana i treballs premiats en els esmentats «Jocs Florals Esperantistes».

EDITA, a mesura de les seves possibilitats, opuscles de propaganda i ensenyament de la llengua internacional.

COL·LABORA a la celebració d'actes de propaganda, com conferències, obertura de cursos, exposicions, visites, etc.

ATORGA títols de Professor d'Esperanto, segons condicions estatuïdes en el II Congrés a Tarragona, i d'acord amb els membres catalans del «Lingva Komitato».

CURA, en general de coordinar els esforços dels adeptes de l'Esperanto en terres de parla catalana.

REPRESENTA la nostra nació davant la Organització Esperantista i en els Congressos Esperantistes Universals.

ADHERIU-VOS-HI!

QUOTA ANYAL: 6 PTES.

Excepcionalment podeu entrar a la Federació fins a fi de 1924 pagant només mitja quota, és a dir, ptes. 3'—. No deixeu passar l'ocasió.

KATALUNA ESPERANTISTO

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

L'Assemblea de la Lliga de Nacions oficialment reconeix l'Esperanto



Recomanació als Estats
Membres de la Lliga

TEXT OFICIAL

L'Assemblea recomana que'ls Estats Membres de la Lliga de Nacions acordin a l'Esperanto, com a llengua pràctica auxiliar per a comunicacions internacionals al costat de les llengües nacionals en ús, el tractament i tarifes vigents per a "llengua clara" en comunicacions telegràfiques. Crida l'atenció de l'Organització per a Comunicacions i Trànsit envers aquesta recomanació.

El report transcrit fou comunicat al Consell, als Membres de la Lliga i als Delegats en la V.^a Assemblea, i fou acceptat **unànimement** per l'Assemblea el 20 de Setembre 1924.

La qüestió de l'Esperanto ja fa tres anys que ve tractant-se en les diverses Comissions de la Lliga de Nacions, i la resolució presa ara obeeix al resultat d'enquestes i estudis fets imparcialment, d'on ve la **unanimitat** de la recent important resolució. Però nosaltres que sabem l'activitat desplegada com a informador i propulsor prop de la Lliga, de l'eminent samideà i catedràtic de Ginebra, Edmond Privat, volem aprofitar aquesta avinentesa a congratular-lo.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU

Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne intrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE K. E. F.: LA 21 DEC.
1924, AKURATE JE LA 4^a POSTTAGMEZE ĈE ATENEU ENCICLO-
PÈDIC, CARME, 30. — BARCELONA

TAGORDO: REORGANIZO DE K. E. F. KAJ RILATO INTER K. E. F.
KAJ IBERIA KONFEDERACIO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

**Redakcio kaj Administraĵo:
Carme, 30 : BARCELONA**

Feliĉan Novjaron

Jen nia deziro, jen nia espero, kaj nia bela perspektivo. Ni ĝoje konstatis la interkonsenton en la lastaj du Universalaj Kongresoj pri la Centraj Institucioj de nia Movado. Faktoj kiel la klopodado de la Universala Esperanto-Asocio al la Ligo de Nacioj, meritigis al ĝi ĝeneralan aplaŭdon, simpatian. La konstanta frapado de U. E. A. pardonigas ĉiujn pekojn neeviteblajn ĉe ĉiu homo aŭ homaro. Aliflanke la cirkonstancoj malvigligis malnovajn komitatojn. Ĉio ebligis kaj pravigis la hodiaŭan neŭtralan Centran Komitaton de Konstanta Rezentantaro kaj ĝia intima rilato kun U. E. A. La anonco pri la proksima Universala Kongreso en la plej internacia lando, en la scenejo, en la Centro de la Universala vivo de ĉiukontinentaj Ŝtatoj, kien alflugas delegitoj de ĉiuj nacioj premantaj kaj subpremataj, la tiom diversa kiom malgranda kaj paca kaj paciga Svisujo, elvokas efikan paŝon.

La reorganizo de nia K. E. F., la okazigo de nia proksima Kongreso en Mallorca, la Universala intereso pri niaj Floraj Ludoj, kaj la revigliĝo de nia Movado en nia teritorio antaŭvidigas belan katalunan floron en la Universala bukedo de Esperantaj sukcesoj en la nova jaro.

Jen nia deziro, jen nia espero, kaj nova, venka, duobla perspektivo.

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE K. E. F.: LA
21 DEC. 1924, AKURATE JE LA 4^a POSTTAGMEZE ĈE ATE-
NEU ENCICLOPÈDIC, CARME, 30. — BARCELONA.

TAGORDO: REORGANIZO DE K. E. F. KAJ RILATO INTER
K. E. F. KAJ IBERIA KONFEDERACIO.

Alvoko al la Katalunaj Esperantistoj Pri nia reorganizo

Ŝajnas al ni necese, nepre necese, paroli denove pri la tiel ripetita reorganizo de K. E. F. Ni volas paroli pri tiu ĉi grava temo plene konsciante, plene konvinkitaj, ke de firma reorganizo dependas la plua ekzistado de nia Federacio, nuntempe baraktanta kiel antaŭajn fojojn inter vivo kaj morto.

Ni ne devas fari al ni iluziojn, ni ne plu devas flugi en revoj nek vivi el simplaj esperoj. Se ni ne sukcesos trovi firmajn fundamentojn, eĉ nia ĝisnuna erara konstruaĵo eble falos kaj dispremos nin.

En Girona kaj Manresa la demando kuŝis sur la tablo sed ĝi ne estis plene de ĉiuj studita aŭ la atmosfero ne estis favora, kaj sava solvo ne sukcesis: la tuta afero, ĉio, restis en mallumo, sen definitiva arango. La recepto akceptita por la malsanulo celis la malsanon sed ne la kaŭzon de la malsano, hodiaŭ kaj morgaŭ renaskiĝanta pli kaj pli akre.

Oni povas demandi al si ĉu Federacio en Katalunujo povas esti utila al nia movado kaj krom tio, ĉu la utileco, kiun ni povas ĉerpi el ĝi, penindas oferojn kaj energiojn. Ĉiu, ŝajnas al ni, konsentos facile, ke tia organizaĵo efike povas helpi nian problemon kaj forte akceli la progreson de Esperanto en la tuta lando.

Ne nur utila, sed necesa, ni opinias Federacion. Ĝi devas kunigi fortojn dise starantajn, propagandi en lokojn kie la semo ne donis fruktojn, helpi la organizon de grupoj, presigi propa gandilojn, lernolibrojn, broŝurojn, organizi propagandon ĉe la gazetaro, labori ĉe la oficialaj institucioj por enkonduki Esperanton, publikigi gazeton por gvidi la tutan enlandan movadon kaj nediŝireble ligi la aliĝintojn, okazigi kongresojn, la famajn Internaciajn Florajn Ludojn, k. t. p.

Se ni ĉiuj konsentas ke Federacio estas necesa, kial ni ne donas al ĝi helpon kaj subtenon, kiujn ĝi bezonas por trafe efektiviĝi la montritajn punktojn?

En nia lando ne mankas fortoj por firma organizo. Ne pli ol 600 aliĝintoj, akurate pagantaj la kotizajon, estas necesaj por efektiviĝi vastan planon, kaj en Katalunujo facile oni povas trovi la montritan nombron da esperantistoj.

Bedaŭrinde preskaŭ neniu sentas sin ligita al la Federacio. Terure estas pensi ke ni ricevis neniun kuraĝigan vorton, ke esceptuloj promesis helpon al nia laboro por restarigi nian organon, kiu pace dormadis en la sonĝo de la justuloj.

Ĉu la hodiaŭa plendo estos aŭskultata de neniu? Ĉu ni ĉerpas akvon per kribilo? Ni esperas, ke oni komprenos nin, ke ĉiu koro de esperantisto malfermiĝos al ni larĝe kaj donos malavare sian helpon por forigi la ŝanceliĝadon de nia tradicia K. E. F.

Ni ja volus saturi tiujn ĉi liniojn per fajraj vortoj de instigo kaj konvinkigo. Se ni sukcesus altiri al K. E. F. amajn rigardojn viajn, ĝi vigle restarigus por intense disvastigi nian karan idealon.

Longe ni pripensis la vojojn alprenindajn por nia reorganizo kaj konkludis, ke reciproka kunhelpado de la grupoj kaj individuaj membroj estas necesa por la bono kaj firma subteno de K. E. F. Se ni trovos sindonemon en la grupoj, ni baldaŭ paŝos sur ebena vojo.

Ni decidis prezenti al nia federacianaro kelkajn ŝanĝojn en nia regularo kaj ni esperas atingi la sankcion de ĉiuj. Oni atente studu ilin.

Regulo 3^a. — Forigi la vortojn *gratis als federats*. Aldoni *el preu d'abonament a la revista serà de 6 ptes. l'any*.

Regulo 4.^a (Nova) — *La K. E. F. constarà de membres asociats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyen i els altres amb caràcter particular.*

Els diversos organismes pertanyents a la K. E. F. contribuiran al seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada per endavant, de 0.50 ptes. mínim per cada un dels socis que els integrin, i els individuals amb una quota mínima de l'50 ptes. l'any, pagada també per endavant.

Regulo 5.^a (Nova) — *La K. E. F. serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Vice-caixer, Bibliotecari, Administrador, primer Vocal i segon Vocal.*

Regulo 9. (Nova) — *Tots els esperantistes pertanyents a organizacions federades tindran veu a les assemblees anyals, però sols podrà votar llur delegat, qui tindrà tants vots com cotizacions hagi pagat l'entitat per ell representada, i els federats isolats tindran veu i vot.*

Regulo 12. (Nova) — *Aquesta Federació podrà actuar mentre complti amb dues col·lectivitats organizades o 30 membres isolats. En cas de dissolució, previ acord de la mateixa, l'actiu que existeixi serà lliurat a les institucions oficials de l'Esperanto.*

Facile videbliĝas ke la tuta ŝanĝo (vidu regularon sur la lasta paĝo) koncernas la ekonomian flankon kaj la kolektivan organizon apud la individua nun reganta. Se oni bonvole aprobos niajn vidpunktojn aŭ oni aprobos aliajn pli bonajn, kiuj ne venis al ni en la kapon, ni estas certaj, ke la estonto estas nia.

Por 1925 ni kalkulis la jenan budĝeton:

| | | | | | |
|----------|---|--------------------------|------|-------|------|
| enspezoj | { | 600 kotizajoj | 900 | ptoj. | |
| | | 500 abonoj | 3000 | » | |
| | | anoncoj k. t. p. | 100 | » | 4000 |

| | | | | | |
|----------|---|-----------------------------------|------------|-------|------|
| elspezoj | { | presado de K. E. | 2000 | ptoj. | |
| | | poŝtelspezoj | 180 | * | |
| | | diversaj | 120 | * | |
| | | propagando kaj eldonaĵoj. | 1400 | * | |
| | | pago al K. R. | <u>300</u> | * | 4000 |

Unuavide ŝajnas frukto de iluzio la 600 federacianoj, sed se la diversaj grupoj en Barcelona, Girona, Palma, Sabadell, Terrassa, Vendrell, k. a. konsciente la povon de la koncentrigo, kiun ni celas, aliĝus al K. E. F. kaj alportus helpon, ni certe irus tre malproksimen, ni povus efektiviĝi la tutan planon pli supre montritan.

Ankaŭ ni esperas varbi facile, se la grupoj kuniĝos ĉirkaŭ la Federacio, la 500 abonantojn necesajn por regule publikigi 16-paĝan organon, kies unujara kolekto donos belan 200-paĝan volumon riĉenhavan, interesan kaj lingve ĉastan laŭtradicie.

Ni kunvokas la katalunajn esperantistojn kaj precipe la diversajn grupojn al eksterordinara ĝenerala kunsido okazonta la 21 de decembro, je la 4-a posttagmeze, en nia sidejo Carme, 30, Ateneu Enciclopèdic Popular. En ĝi la kataluna esperantistaro difinos kaj elektos la strukturon de la reorganizata federacio, de kiu ni ricevos novan revigliĝon, freŝan energion por akceli la disvolviĝadon de Esperanto en la tuta lando, kies grundo, okaze tre favora, atendas la ŝutotan semon por enprofundigi fortajn radikojn kaj elkreskigi vivoriĉan foliaron.

Nia tuta skizita konstruaĵo disfalus, se la grupoj, de kiuj ni esperas ricevi la plej faktan helpon, kruce fleksus la brakojn kaj surde aŭskultus nian pledon. Nia plano korsiĝu dronus, se ĉiuj enlandaj esperantistoj ne etendus sian manon al ni. Tiaokaze plej saĝe ni agos se ni forblovos la tutan aferon.

Amikoj kaj samideanoj!, la estonteco de nia movado esperantista en Katalunujo estas en viaj manoj. Ĉu vi permesos al ĝi la nunan pezan dormon aŭ vi energie vekos ĝin? Ni atendas vian respondon.

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE K. E. F.: LA
21 DEC. 1924, AKURATE JE LA 4^a POSTTAGMEZE ĈE ATE-
NEU ENCICLOPÈDIC, CARME, 30. — BARCELONA.

TAGORDO: REORGANIZO DE K. E. F. KAJ RILATO INTER
K. E. F. KAJ IBERIA KONFEDERACIO.

Nia proksima Kongreso okazos en Palma de Mallorca la 21 - 24 Majo 1925^a

Grandan entuziasmon vekis ĉe niaj rondoj la definitiva ebligo ke nia proksima Kongreso de K. E. F. okazos en la ĉarma mondfama por turistoj ĉefurbo de la Balearaj Insuloj. — Unuanime kaj varme esprimiĝis en nia antaŭa Kongreso en Vich tiu deziro kaj espero. Ĉiuj gesamideanoj en la Balearaj Insuloj ankaŭ deziregas la ĝojon kaj ĝuon akcepti ĉiulandajn gesamideanojn, kiuj mare kaj kelkaj eble ankaŭ aere veturos al la Mediteraneaj juveloj konkeritaj de la granda Reĝo Jako I la Konkerulo. — Kelkaj malfacilaĵoj unue aperis pro timo al la peza tasko organizi Kongreson, kaj pro la deviga forveturo de nia samideano Leŭtenanto Barceló kaj lia regimento al Maroko. Sed feliĉe nia eminenta efektiva samideano Narciso Bofill akceptis la entreprenon pro fervoro al Esperanto, al nia Federacio kaj al la bela Mallorca Insulo, kaj la jam faritaj de li laboroj kaj atingitaj rezultoj antaŭvidigas tre grandan sukceson.

LA PROKSIMAJ FLORAJ LUDOJ

La graveco de la listo de premioj kaj de ĉiu premio. La sukceso de la antaŭaj Floraj Ludoj. La okazigo de la proksimaj en plej ĉarma kaj flora terjuvelo, en plej flora kaj floriga monato. La maturiĝo de niaj internaciaj aŭtoroj. La nuntempa akriĝo de ĉiuj homaj kaj homaraj problemoj, pensoj kaj sentoj. — Jen kial niaj proksimaj Floraj Ludoj videbliĝas plej gravaj kaj solenaj. — Bonvolu, estimataj kolegoj, publikigi la alvokon por la proksimaj Floraj Ludoj. Bonvolu, eminentaj pensuloj kaj sentuloj, malkovri vian animon al la frataro per kaj por flora ludado kaj luda florado de via spirito.

«KATALUNA ESPERANTISTO»

Nia gazeto, oficiala organo de la Floraj Ludoj, depost la nuna jaro aperos regule ĉiumonate. La kataluna esperantismo unuanimiĝis definitive. Ni sentas fortikan unuecon, kaj ĉio, de nun, estos al ni facila. La unuiĝo ne nur enkalkulas la forton de ĉiuj, sed ĝi malavarigas ĉiun. La rezulto, do, ne nur estas kunigo de fortoj, sed ankaŭ kreado de fortoj. Tiu-ĉi ekonomia bazo, kaj la «animo, kiu kreskiĝas korpon», certigas la definitivau prosperon de nia gazeto, kies animo estas duoble granda: nia fervoro por Esperanto kaj la intereso de la Floraj Ludoj. — La jarabono por ĉiuj landoj kostas nur 5 svisajn frankojn aŭ unu dolaron, per antaŭpago al la jena adreso: Direktoro de «Kataluna Esperantisto», carrer València, 245 — Barcelona.

Klare kaj Lojale

Al hispanlingva Samideano Mangada — MADRID

Ĝeneraligis inter la K. E. F - anoj la espereble malvera sciigo ke vi deziras profiti la nunajn nenormalajn cirkonstancojn en la Hispana Ŝtato celante malpermesigi la funkciadon de nia Kataluna Federacio. — Mi ne havas la plezuron koni vin persone, sed mi ne povas kredi vera tian sciigon. Laŭ informoj aŭditaj pri vi, vi estas tre sentema esperantisto, kaj mi tial estas certa ke vi ne ĉagrenos vin per tia ago, ĉar nia Federacio efike laboras por Esperanto kaj malpermesigi ĝian funkciadon estus krimo kontraŭ esperantismo.

Oni diras ke la kaŭzo de via intenco estas politikaj motivoj. Tiaj motivoj kontraŭ nia Federacio ne ekzistas. La bazo de nia Federacio estas la laŭlingva bazo de la oficialaj Universalaj Institucioj de nia Movado. Ni eĉ forigis de nia koverto la figuron kiu montris iajn nunajn politikajn limojn de katalunlingva teritorio. Nia celo estas varbi por Esperanto ĉiujn katalunlingvanojn kaj ĉiujn homojn en katalunlingva teritorio por ke neniam estiĝu la neceso aŭ devigo inter katalunlingvanoj kaj alilingvanoj kompreniĝi per nesia lingvo, sed, per la komuna, homa, neŭtrala Esperanto.

Nia celo estas ĝuste akorda kun la «Deklaracio pri Esperantismo» kaj «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia». Mi ne povus, do, kompreni ke samideano malakordiĝos kun ni. Eĉ vi mem akceptis regularon en Vieno laŭ kiu nia eminenta Prezidanto de la Centra Komitato, Edmond Privat, skribis al ni la jenan respondon:

Estimata Sinjoro Prezidanto,

Respondante al la letero de la Kataluna Esp. Federacio de la 28^a de Septembro lasta, mi informas vin ke laŭ la nova regularo de la kongreso akceptita en Vieno, estas tute klare kaj ne dubeble ke delegito rajtos paroli je la nomo de la katalunaj esperantistoj en ĉiuj denunaj Universalaj kongresoj de Esperanto, se malfermo kun la tradiciaj salutparoloj okazos, ĉar povos tiam paroli unu delegito por ĉiu lingvo de regno.

Mi petas vin afable komuniki tiun respondon al ĉiuj el la subskribintaj komitatanoj senescepte. Je tiu celo ni sendas al vi ĉikune kopiojn de tiu-ĉi letero, kiujn vi bonvolos disdoni al ili.

Kun kora saluto kaj bondeziro al la agado de niaj fidelaj katalunaj samideanoj por nia kara afero,

mi restas via:

Edmond Privat

Prez. de C. K.

Efektive nia Federacio adresis demandon al la Centra Komitato pri nia rajto havi delegiton saluti kiel la aliaj delegitoj, kaj tian demandon ni faris ĉar dum multaj jaroj ni povis ŝajni malkuraĝaj aŭ senrajtaj ĉar ni silentis celante eviti interpersonan aŭ eĉ internacian diskuton pri nia rajto en la

Universalaj Kongresoj de Esperanto, motive de via kontraŭstaro al nia rajto.

En niaj Kongresoj de la Kataluna Esperantista Federacio, ni havis la ĝojon konstati oftan afablan ĉeeston de niaj hispanlingvaj pioniroj advokatoj Mainar kaj Gastón el Zaragoza kaj de aliaj nekatalunlingvaj samideanoj, kiuj ankaŭ honoris nin per persona ĉeesto aŭ skriba saluto. — Ĉu vi ne aldonos vin al tiuj hispanlingvaj samideanoj okaze de nia proksima grandioza Kongreso de K. E. F. en Mallorca? — Niaj Internaciaj Floraj Ludoj estas tiel internaciaj, ke eble ni pli logike ilin nomos Universalaj.

La agado de nia Federacio estas lojala kaj klara, kaj neniun membron ni demandas pri liaj privataj politikaj, religiaj aŭ aliaj intimaj aŭ publikaj opinioj, sentoj, kredoj aŭ scioj, kondiĉe ke li evidente estas favora al Esperanto.

Kaj se iam nia Kataluna Federacio meritis unuaniman aprobon estas nun. Eĉ tiuj membroj aŭ grupoj kiuj iam ekŝiĝis pro ia ajn motivo, revenas nun al nia Federacio konsente ke estas evidente ke la Kataluna Esp. Federacio defendas plej ĝuste kaj pure la celon de Esperanto kaj Esperantismo.

Mi esperas ke nek via militisteco nek via hispanlingveco pravigas la indignigan pridiron kiu ĝeneraliĝis inter la K. E. F-anoj, kaj ke, kontraŭ la ĝenerala pridiro, kaj por honoro al viaj ecoj, vi evitos tian danĝeron por la Kataluna Federacio. Miaflanke mi proponas kaj petas ke miaj kunfederaciaj neu kaj kontraŭdiru ĉian verecon pri tia intenco aljuĝita al vi.

Niaj proksimaj kaj grandiozaj Kongreso kaj Floraj Ludoj okazontaj en Palma de Mallorca en Majo 1925^a, novafoje publike pruvos nian puran kaj fervoran Esperantismon.

Vin salutas

DELFI DALMAU

Prez. de K. E. F.



Alvoko al la XI^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la XI^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ vin salutas kaj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.

II. — Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

I. — Traduko de la jena versajo:

LA PASTORETA

Gentil era la nina
guardada amb gran esment,
com una perla fina
guarnida d'or i argent.

Com una perla blanca,
rosseta com fil d'or,
poncella d'alta branca
de on seria flor?

Mes, ai, que ben en terra
la pobra ja està,
des que partí a la guerra
son pare, i no tornà.

Una madrastra dura
li fa guardar anyells:
la jova' els pastura,
suau, tendra com ells.

Enfora de la vila
els ha de pasturar;
i mentre fila, fila,
s'alegra de cantar.

De matinet ja canta
quan surt alegre el sol:
sa veu que el bosc encanta
fa enveja al rossinyol.

Bé prou que la sentia
el comte jovencell,
que en greu melancolia
no dorm dins el castell.

— Quina cançó novella
m'encanta aquest mati?
— És d'una pastorella
qui passa per aquí.

— Anau, doncs, a pregar-la
que pugi i cantarà. —
No bé el comte així parla,
un patge se n'hi va.

— Pastora, pastoreta
vindries al castell?
— Què hi faré jo, mal neta,
vestida de burell?

— Pastoreta, poc importa
si duus burell o no:
al comte l'aconhorta
ta veu i ta cançó. —

Ella entra empegueïda,
no sap a on mirar...
Bé el comte la convida,
no gosa ella cantar.

— Pastora, si volies
cantar ara per mi...
aquest anell tindries,
aquest anell d'or fi.

— Senyor, quina fretura
me fan vostres anells?...
Deixau-me a la pastura
tornar amb els anyells.

— Si cantes, pastoreta,
jo et donaré un vestit.
— Ja em basta a mi, pobreta,
aquest que duc sargit.

— Doncs canta, per ma vida,
que res te donaré.
— Senyor, ja m'heu sentida,
i així ja cantaré.

.
Cantà: fins l'escoltaven
els caçadors i cans,
i pel balcó es posaven
calàndries i pinsans.

Com no la escoltaria
el comte malaltís?
Sa greu melancolia
fugí com per encís.

A la cançó primera,
ell li tirà una flor:
quan fou a la tercera,
ja li donava el cor.

— Pastora, pastoreta,
això ja ho admetràs:
jo et donaré ma dreta,
comtessa tu seràs!

II. — Traduko de la jena prozaĵo:

VIA BLANQUERNA

A Vallde mossa hi ha un batlle, que en aquests temps que correm, és una *avis rara*, una merla blanca, o com diem aquí, un veritable cavall verd. Li ha passat pel cap, i ha aconseguit que ho aprovés l'Ajuntament, de retolar els carrers de la vila muntanyenca amb noms autòctons, escrits així com cal. En un bell marbre blanc, en nobles lletres romanes, a la cantonada de cada carrer, rumbeja un nom gloriós, NICOLAU CALAFAT: l'impressor incunabile que al desert de Miramar feia gemegar la primera impremta, a l'hora mateixa que Mossèn Posa, a Barcelona, feia gemegar la seva. SOR AYNA MARIA DEL SANTISSIM SACRAMENT: exploradora del boscatge lul·lià i expositora del místic idil·li de l'Amic i de l'Amat. REI JAUME II, qui fundà i dotà amb cinc cents florins d'or el col·legi de llengües orientals... A l'ampla avinguda que els plàtans aombren i que per entre cendroses oliveres i alzines negrejants va a cercar l'horitzó obert i el somriure innombrable de les ones, li ha posat el nom de VIA BLANQUERNA. Havia d'ésser un poeta, empeltat de batlle, qui trobés aquest nom tan bell i tan just, i aconseguís encapçalar-ne una via i decorar-ne un marbre polit. Si al nostre Ramon Lull se li hagués acudit de fer passar aquell protèic personatge seu que amb el nom de *Blanquerna* batejà, i en féu l'espill de la cristiana perfecció en cadascun dels estaments socials, ço és saber, de matrimoni, de religió, de prelacia, de senyoria apostolical, i finalment, de vida ermitana; si al nostre Ramon Lull, dic, se li hagués acudit de fer passar Blanquerna per aquesta magistratura ciutadana de la batllia, en el gustós capítol que n'hauria escrit: *De ço que féu Blanquerna essent batlle*, no hi hauria mancat alguna de les coses que ha fet el batlle de Valldemossa, Antoni Llorens i Clariana.

Blanquerna és un personatge de boira i de somni, ric de moltes vides, que bé es mereixia un carrer en aquella vila qui el va veure ermità i on, sota l'aspra i grossa vestidura, visqué sos dies més daurats i tranquils. La via que s'abelleix d'aquest nom és aquella que duu a Miramar i a la capella «anciana» de la Santíssima Trinitat, i a la Cova de Ramon, i a la font «on, hom qui no ama s'enamora quan beu en la font», i en aquell lloc, «entre la vinya e el fenollar», on Blanquerna s'estava en plors i sospirs. Si, la vinya ja no hi és, emperò encara el fenoll que fa aquella soledat aromàtica, creix, entre penya i penya i obre els seus corimbos granats de picant anís. Sembla que encara és viu l'idil·li de l'Amic i de l'Amat. Encara hi canten els mateixos ocells saltironant de branca en branca:

«Cantava l'ocell en lo verger de l'Amat. Vingué l'Amic que digué a l'ocell: Si no ens entenem per llenguatge, entenem-nos per amor...»

Encara els caminois ascètics són espinosos i malcabals com quan, com un lliri entre cards, floria l'enamorat diàleg:

«Consiros anava l'Amic per les carreres de son Amat, e encepègà e caigué entre espines, les quals li foren semblants que fossin roses e flors e que fossen lliit d'amors.»

Tot un eixam de records brunzents, per la gran multitud de terres i de ciutats i d'homes que com a diví novell Ulisses, havia vist Ramon Lull, portà, al silenci de Miramar, entorn de son cap meditativu; emperò no aconseguien trobar la seva pau interior i la seva íntima benaventurança. Jo he passat, a la mitja nit, pel bosc de Miramar; a la mitja nit que era l'hora en què es llevava Blanquerna. Tot cobra un prestigi espectral; com un tro dolç arriba del mar profundísim; el fullatge brunz; i a l'hora que les lluernes encenen, entre l'herba, el poruc cremell, també el tenen encès, els astres a la presència de Déu. I el so d'una campaneta com un martellet de cristall, percuideix aquell silenci i va a ferir la seràfica i tremolant assemblea dels estels. I, com un rusc, la capelleta ermitana, s'omple de remors i de mel. És Blanquerna rediviu que s'aixeca a sonar matines i a resar-les. I quan les ha resades, per la finestra de sa cel'la, a través del vel de les llàgrimes devotes, contempla el cel i les esteies; i després se'n torna a dormir un altre son, alai i lleu, que es deixonda a l'alba...

«Així vivia e estava Blanquerna ermità, considerant que mai no fo en tan plaent vida.»

En aquesta magnífica soledat que Ramón Lull omple amb la seva ombra, duu la novella *Via Blanquerna*, que els plàtans reguen d'ombradís clapat i les oliveres poblen de remors angèliques.

LLORENÇ RIBER

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. — Premio de S-ro Narciso Bofill, ingeniero, Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

II. — Premio de S-ino Maria Tornaris de Bofill, Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

III. — Premio de F-ino Amàlia Bofill Fornaris, Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

IV. — Premio de S-ro Antonio Rosselló, Direktoro de Compañia Ma-llorquina de Electricidad, Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

V. — Premio de S-ro José Salom, masonisto, Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

VI. — Premio de S-ro Pedro J. Tous, Fabriko de maŝinoj, Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

VII. — Premio de S-ro Miguel C. Oliver, juĝisto, Palma: 50 pesetoj. Temo: Altaj konsideroj de ordo morala, religia, pedagogia, ekonomia kaj regiona kiuj konsilas la restarigon de la «Normal de Maestras» sub la gvido de la «Religiosas del Real Colegio de la Pureza» de Palma.

VIII. — Premio de S-ro Mariano Jaquotot, Materialoj por konstruaĵoj, Palma: 50 pesetoj. temo: laŭvola.

IX. — Premio de S-ro Jaime M. Granada, Palma 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

X. — Premio de Banko «Fomento Agrícola de Mallorca», Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XI. — Premio de Banko «Crédito Balear», Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XII. — Premio de «Fomento del Civismo», Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XIII. — Premio de «Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares», Palma: 100 pesetoj, Temo: laŭvola.

XIV. — Premio de «Asociación per la Cultura de Mallorca», Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XV. — Premio de «Banco Vitalicio de España», Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XVI. — Premio de «Ferrocarri de Sóller», Palma 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XVII. — Premio de Ruĝa Kruco (Santa Catalina), Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XVIII. — Prezidanto de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj.

XIX. — Premio de Sekretario de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusiljonaj aŭtoroj.

XX. — Premio de Episkopa Moŝto de Mallorca: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXI. — Premio de Cámara Oficial de la Propiedad Urbana: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXII. — Premio de Sociedad General de Tranvías Eléctricos, Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXIII. — Premio de Esperantista Klubo Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXIV. — Premio de Oficiala Ĉambro de Komerco, Industrio kaj Navigado de Palma: 100 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXV. — Premio de Fomento de Turismo de Palma: artobjekto pri Palma. Temo: laŭvola.

XXVI. — Premio de Asociación de la Prensa de Baleares: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXVII. — Premio de S-ro Fernando Ramírez, sekretario de Delegación de Hacienda de Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

XXVIII. — Premio de S-ro Miguel Guasch, ministestro, de Palma: 50 Pesetoj. Temo: laŭvola.

XXIX. — Premio de S-ro Antonio Coll, agrikulturisto, de Palma: 50 pesetoj. Temo: laŭvola.

Aliaj eksterordinaraj premioj estos proponataj tre kredeble. Ni anoncos ilin en plej proksima numero de «Kataluna Esperantisto».

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

Kolomano de Kalocsay, *prezidanto*. — Jakob Schmid. — Eŭsebjo Artigas. — Narcís Bofill. — Fred. Pujulà i Vallès. — S. Alberich Jofrè, *sekretario*.

N O T O J

I. — La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵ Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos laŭorde bele binditan ekzempleron de la verkoj: Pro Iŝtar, Kataluna Antologio, La Tragedio de l' Homo, Fabiola. Se la merito de la premiitaj aŭtoroj de la *Tradukitaj Tekstoj I, II*, tion konsilos, oni premios ĝin per unu el la premioj por temo laŭvola.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵ premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en plene *Fundamenta Esperanto* kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anoncitraj.

IV. — La Festo de la XIaj. Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Palma de Mallorca dum la XIIa. Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» majo 1925.

V. — Sur la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15 de marto 1925 de la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro S. Alberich Jofrè, str. Bretón de los Herreros, 18, 1.^{er}, 1.^a Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por la akcepto de verkoj. Oni konservu kopion de la manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.

VIII. — La komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj, kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj Esperanto-gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas aliaj efektivaj premioj krom tiuj difinitaj en la nuna alvoko.

Angel Guimerà

Angel Guimerà estas mortinta la 18an de Julio 1924, kaj okaze de lia morto oni unuanime alnomis lin «la poeto de Katalunujo plej populara kaj universala». Sed pli ol kiel simpla poeto, li estis admire konsiderata precipe kiel teatra aŭtoro: liaj dramoj kaj liaj versaj tragedioj estas liaj plej famaj verkoj.

Guimerà, en sia longa vivo, ĉar li mortis 75-jara, kreis longan serion da majstraj teatraĵoj, el kiuj multaj transflugis la naciajn limojn.

Li estas la plej tipa reprezentanto de la romantika skolo en la kataluna literaturo: ĉi-tio kaj lia nesuperebla arto prezenti scenojn simplajn kaj kortuŝajn, naskis la fortan admiron kaj simpatian kiujn li havis ĉe la granda popolo.

Lia plej karakteriza dramo estas «Terra baixa» (En la malsupra lando). Ĝia argumento estas tre forta kaj ĝia protagonisto, la paŝtisto Manelic (Manelik'), havas scenojn de emocia sovaĝa beleco.

La paŝtisto *Manelic* venas «en la malsupran landon» edziĝi kun *Marta*, laŭ antaŭarango de la bienmastro *Sebastià*, kiu sekrete havis seksajn rilatojn kun ŝi. *Sebastià*, senskrupula malvirtulo, aranĝas ke *Manelic* venu esti lia muelisto kaj edziĝu je *Marta*, ĉar li tiel esperas povi daŭrigi pli *sendangere* sian rilaton kun ŝi. *Marta*, kompatinda virino, estas trompita per la informo ke *Manelic* konsentas la edziĝon, eĉ sciante ĉion, kaj pro tio ŝi sentas abomenon al la paŝtisto, kun kiu ŝi edziniĝas nur pro minaco de *la mastro*. Post la simpla edziĝofesto, *Manelic* krude rakontadas, inter aliaj aferoj, kiamaniere li mortigis, korpon ĉe korpo, la *unuan* lupon. *Marta* ekadmiras lin kaj ekdivenas ke oni lin trompis.

Manelic observas strangan sintenon ĉe sia edzino kaj aŭdas mokojn kaj aludojn pri li kaj la ĉiaman ekkrion: Kompatinda *Manelic*! Kompatinda *Manelic*! Fine li postulas klarigon kaj *Marta* rakontas ĉion. La bona *Manelic* decidas reiri en la montaron *kun Marta*. Ŝi diras ke *la mastro* ne permesos ŝian foriron. Li respondas ke ŝi estas *lia edzino* kaj la mastro ne plu rajtas pri ŝi. La sceno, en kiu *Marta* klarigas la tragikan situacion, estas belega. *Manelic* terure ekkoleras, li insultas ŝin, minacas la mastron *Sebastià*, malbenas la *malsupran landon* kaj sopiras je la pureco kaj boneco de siaj montaraj. «Eble tie estas boneco, ĉar tie ne estas homoj». Fine, li moligas, li kompatas sian edzinon, kun kiu li baraktis ruliĝante teren en sovaĝa ĉirkaŭpreno, li levas ŝin kaj ĵuras ke ili de nun por ĉiam sin amos reciproke.

En la tria akto prezentiĝas *Sebastià*, kiu volas malpermesi la foriron de *Marta*. *Manelic* diras ke li ne plu estas lia mastro, sed lia rabisto. La mastro minacas lin. *Manelic* malŝatas tian minacon: li ne timas homon, ĉar li scias mortigi lupojn. En la lasta sceno *Sebastià* kaj *Manelic* terure luktas kaj la paŝtisto, forlasinte ĉian armilon, per siaj fortaj manoj, mortigas

sian kontraŭulon. Li prenas la edzinon Marta en siajn brakojn kaj forkuras al la montaro kriante: *La lupon, mi mortigis la lupon!*

La dramo «Terra baixa» estas ludita centojn da fojoj. La granda kataluna aktoro Enric Borràs genie prezentis la figuron de *Manelic*. Ĉe la «Par-ko de Montjuic», en Barcelono, troviĝas monumento kun bronza statuo de la fama paŝtisto, kiu havas propran vivon ekster la scenejoj kaj restos unu el la kreaĵoj de la eminenta dramisto Guimerà. Tiu grava kataluna verko havas tradukon en lingvoj hispana, franca, portugala, itala, angla, germana, sveda, rusa, ĉeĥa, serba kaj aliaj. En esperanton ĝi estas tradukita, sed neeldonita. Ĝi estis unuafoje ludata la jaron 1896 kaj donis temon al du operoj: unu franca, kun la titolo «La Catalane», adaptigo de Tiercelin kaj P. Février, muziko de Ferran Le Borne; alia germana, «Tiefland», muziko de Eugeni d'Albert kaj teksto de la fama dramisto hungara Rodolf Leothart.

Aliajn gravajn dramojn verkis Guimerà, inter ili: «Maria Rosa», «La festo de l' tritiko», «Pastro Janot», «L' animo estas mia».

El la tragedioj, verkitaj en dekunusilabaj *Iberaj* versoj, la plej gravaj estas «Maro kaj ĉielo», «Gala Placidia», «Judith de Welp», «Indibil kaj Mandoni», «Reĝo kaj monaĥo», «Jesus de Nazareth». Same kiel ni faris pri la dramoj ni skizos la ĉefan el la tragedioj: «Mar i cel».

Ĉi- tiu tragedio estas titolita «Maro kaj ĉielo», ĉar la agado dum ĉiuj tri aktoj okazas en ŝipo de Alĝeriaj korsaroj. Epoko: jaro 1630. La korsaro *Said*, maŭro el tiuj forigitaj de Hispanujo, kaptis kristanan ŝipon veturantan de la Balearaj Insuloj al Barcelono, sur kiu troviĝis maljuna grava militisto, *Carles*, kun sia filino, *Blanca*, kiu sin direktis al Barcelono por tie eniri en monaĥinejon. Ankaŭ estas kaptitaj la kristana ŝipestro, *Ferran*, kuzo de Blanca, kaj multaj ŝipanoj. Said faras demandojn al Ferran, kiu ne konsentas respondi ilin malgraŭ ĉiaj minacoj. Tiam Carles insultas Said' on; tiu-ĉi respondas al la insulto malŝatante siavice la kristanojn, kiujn li kulpiĝas pri ĉiuj siaj doloroj. La monaĥino Blanca estas tre kortuŝata aŭdante la tragikan vivon de Said, kiu rakontas pri sia naskiĝo de kristana patrino kaj maŭra patro, pri la kruela morto al ili ambaŭ kaŭzita de la kristanoj, pri la devigo al ĉiuj maŭroj forlasi Hispanujon. Li malŝatas tiun genton, ĉe kiu estas strange kunigitaj la plej kontraŭaj simboloj:

... malamo kaj pardon'; ŝafid' kun tigro:
la ponard' kaj la kruc' en sama peco.

Blanca ploras kiam Said finas sian rakonton. Ŝia patro riproĉas ŝin pri tio, kaj ŝi, por kaŝi sian moligiĝon kaj kompaton kaj eĉ ian konfuzan senton pri la korsaro, intencas mortigi lin. Tiu-ĉi evitas la ponardbaton kaj sen ia kolero demandas, kial ŝi tiel *malamas* lin. Poste li prezentas sian bruston por ke ŝi lin vundu... sed ŝi lasas fali la ponardon kaj svenas.

La kompatato de Blanca pri Said ŝanĝiĝas en admiron kaj fine en amon, kvankam ŝi mem ne klare konscias pri tio. Siaflanke Said sin sentas strange influata de tiu virino. Post kelkaj tagoj da malliberiĝo en la ŝipo kaj baldaŭ

alvenonte en Algerion, Blanca petas sian kuzon Ferran ke li mortigu ŝin, se ĵi ŝin vidas en danĝero. Ferran promesas plenumi tion kaj Blanca danke kisas lian manon. Vidante tion, Said ne povas rezisti sian ĵaluzon kaj kole-ron, kaj vokas siajn ŝipanojn por ke ili satigu sian furiozon ĉe la personoj de Carles kaj Ferran. Sed, subite, kiam Said aŭdas ke Blanca ne amas sian kuzon kaj ke ŝia kiso estis nur danko por la ricevita promeso, li aliigas sian decidon kaj ordonas al la ŝipanoj respekti la vivon de la kristanoj. Li faras ne nur tion: li ankaŭ ordonas ke la ŝipo reiru en la maron, ŝajnigante ke estas proksima alia atakebla ŝipo, por eviti danĝerojn al Blanca ĉe la alveno en Algerion, kie li ne plu rajtus sur la kaptitino. Blanca sentas pro tio koran dankemon al li. Iom poste, la kristanaj kaptitoj, kun la helpo de unu el la korsaroj (malkonfesinta kristano, nun pentanta sian perfidon), sukcesas liberigi, kontraŭbatalas la korsarojn kaj fine ekregas sur la ŝipo. Tiam la patro de Blanca volas mortigi Saidon, sed ŝi kovras la korsaron, minacante mortigi sin per ponardo se oni atencas kontraŭ la vivo de Said.

La patro de Blanca konstatas kun teruro ŝian amon al Said, kaj malbenas ŝin. Said ĵetis siajn armilojn, sed ŝi konservas la ponardon en la mano. La korsaro, tre kortuŝite pro la sinteno de Blanca, petas de ŝi ke ŝi forĵetu la armilon kaj klopodas malŝatigi sin de ŝi, memorigante ke li dronigis ilian ŝipon kaj kaŭzis ĉiujn iliajn ĉagrenojn. Ferran admiras la heroan konduton de la korsaro, kaj petas kune kun Blanca ke oni pardonu lin. Sed la furioza patro ne cedas. Ferran pretigas boaton por ke Said saviĝu. Tiu-ĉi promesas iri en Hispanujon serĉi Blanca. Kiam Said pretiĝas forlasi la ŝipon, Carles pafas al li, sed trafas sian filinon, kiu sin metis inter ilin. Said prenas la mortantan korpon de Blanca, kaj ili ambaŭ, en ama ĉirkaŭprenado, sin ĵetas en la akvon. La lastaj vortoj de li kaj ŝi estas: Al la maro! Al la ĉielo! — La tuta agado estas brodita per belegaj literaturaj pecoj.

Krom la multnombraj dramoj kaj tragedioj, Guimerà verkis famajn poemojn. Du el la plej rimarkindaj estas «Migrado» kaj «La mila jaro», tiu ĉi lasta majstre priskribanta la teruron kiu regis en tiu tempo pri finiĝo de la mondo. Ili ambaŭ estas tradukitaj en esperanton.

La granda verkisto Guimerà estis honorata, ĉe sia 60-jara aĝo, per grava popola demonstracio, kiu tutplenigis la vastan Placon de Katalunujo en Barcelono. La tagon de lia enterigo, estis fermataj ĉiuj butikoj en la kataluna ĉefurbo. Akompanis lian kadavron pli ol 50.000 personoj. Guimerà ne nur estis granda poeto, sed ankaŭ patriarko de la renaskiĝinta kataluna literaturo, simbolo de la vivon deziranta moderna Katalunujo.

JAUME GRAU CASAS.

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la milita cenzuro.

“Maro kaj ĉielo”

AKTO I

SCENO XV

Said

Hassen, foriĝu!

Mi volas vidi lin fanfaronantan...
 la koko sen spronoj kaj sen kresto!
 Ĉiam vant' pri honor' kaj sur la lipoj
 ĉiam nomo de Di', ne respektata!
 Senkompata krimul'!... Filoj, lin vidu:
 li estas ja el tiuj kiuj iam,
 hipokrite homamon predikante,
 nian sangon elsuĉis; nek en staloj
 ili lasis al ni lokon ĉe l' bestoj;
 kaj malbenante nin, tre senkomplate,
 nin ĵetis tra la mondon, rifuzante
 al ni, por paca mort', pecon da tero!
 Kaj, je ilia Di'! estis ja nia
 la mond' al ni rabita! Kaj ni fidu
 pri gent', ĉe kiu — vidu — kune estas
 malamo kaj pardon'; ŝafid' kun tigro:
 la ponard' kaj la kruc' en sama peco!
 Kaj nun aŭskultu min, por lia honto.
 Mia patr' estis maŭro; amon sentis
 al kristana knabin'; je ŝi edziĝis
 post ŝajna konvertiĝ': ambaŭ min naskis.
 Li similas Jezuon, patrin' diris.
 Bela kiel huri', diris la patro.
 Apud ili mi kreskis, dum konfuzo
 versetojn de l' Koran' kaj la Biblio
 en vekigo kaj dorm' mi balbutadis.
 La hejm' estis ĝardeno Valencia;
 ĉie floroj en ĝi; eĉ en l' animo
 de l' amantaj gepatroj, kia ĝojo!
 Jezuon vidis ŝi; li la Profeton;
 feliĉe ili vivis, kaj aspektis
 kvazaŭ estus por ĉiam paciĝintaj
 Mahometo kaj Krist' pro tia amo!
 Sed la pac' estis nur en mia hejmo!

Mi memoras pri ĝi! Iun vesperon
 patro kisis patrinon; furioze
 levante laborilon, li eliris.
 Dum tagiĝ' oni frapis nian pordon
 kaj patrino malfermis. Kiu estas?
 Oni ĵetis al ni mortintan korpon
 kaj aŭdiĝis: Virin', jen via edzo!
 Pasis tago post tag': iun, subite,
 patrino vekis min: Fil', tempo estas!
 Kaj kun ploro ŝi prenis min en brakojn.
 Tiam, sesjara, falis mi en dormon.
 La ĝemoj vekis min: popolamason
 kune kun mi mi vidis en galero,
 dum griza tero malproksimiĝadis!
 Mia patrin' miajn okulojn kovris;
 poste regis sur mar' nokta kvieto;
 sed odoro de sango min sufokis
 kaj eĉ unu kaptito ne vidiĝis!
 Kaj parolis patrin': Kiuj mortigis
 perfide vian patron, filo mia,
 mortigos ankaŭ min; de l' maŭra raso
 eĉ la ekziston ili ja ne volas.
 Ĉu vi aŭdas fiŝegojn kiuj saltas
 kaj sataj, ŝvelaj, kun kadavroj ludas?
 Se vi saviĝus, mia fil', nin venĝu!
 Sed, ve! Subite nin ĉirkaŭis l' aro
 da kristanaj maristoj: patrin' krion
 de mort' eligis en forkur'; la monstroj
 per la haroj ŝin kaptis. Sango ŝia
 saltis sur min. Ŝi falis; ho ve! oni
 de ŝi deŝiris min! Sed ŝi premadis
 mortante mian manon; ŝiaj ungoj
 en la karnon penetris! Fil', nin venĝu!
 Kaj la monstroj ŝin levis, en la ondojn
 ridante ĵetis ŝin, kaj ĉar ŝi flosis
 venĝon! kriante, per remila bato
 ŝian kapon disfendis, kaj ŝi dronis!
 Kaj jen: ni estas la terur'! Hienoj,
 rabistoj kaj krimuloj ja ni estas!
 Ili... blankaj kolomboj, puraj koroj,
 infanoj tute am', pentraj-sanktuloj!

ANGEL GUIMERA

El la kataluna lingvo tradukis
 JAUME GRAU CASAS

Paĝo por Lernantoj
 Pàgina per a Alumnes

La Esperantismo estas penado disvastigi en la
 L' Esperantisme és un esforç a divulgar en tot
 tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale
 el món l' ús d'una llengua neutralment
 homa, kiu «ne estrudante sin en la internan vivon
 humana, que «no introduint-se en la vida interna
 de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzis-
 dels pobles i sense pretendre foragitar les exis-
 tantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de
 tents llengües nacionals», donés als homes de
 malsamaj nacioj la eblon komprenigadi inter
 diverses nacioj la possibilitat de comprendre's entre
 si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publi-
 si, que podés servir com pacificadora llengua de institu-
 kaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj
 cions públiques en aquells paŝos, on diversaj nacioj
 batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus
 lluiten entre si per l' idioma, i en la qual podessin
 esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan
 ésser publicades aquelles obres, que tenen igual
 intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ
 interès per a tots els pobles. Tota altra idea o
 espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la
 esperanço que tal o qual Esperantista lliga amb l'
 Esperantismo, estos lia afero pure privata por
 Esperantisme, és seva qüestió purament privada de la
 kiu la Esperantismo ne respondas».
 qual l' Esperantisme no respon».

Bibliografio

(Ni recenzos verkojn duope ricevitajn)

OFICIALA ALMANAKO de la Tutmonda Polica Ligo kaj Tutmonda Ligo de la Ordo, redaktita de A. H. de Marich kaj eldonita de «La Policisto». 208 paĝoj. 14 × 10 1/2 cm. Budapeŝto 1924.

En la antaŭparolo, kiu estas verkita en stilo originale malbela, mi rimarkis la jenan atentindan frazon: «Nun jam neniu nacio permesas subpremi sian propran nacian lingvon per alia».

La enhavo de la Almanako konsistas el kalendaro, Historio pri la policista movado, prikongresaj raportoj, portretoj, fotografajoj, listo de membroj, k. t. p. — SALJO.

SALTEGO TRANS JARMILOJ. — Romano originale verkita de Jean Forge. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 192 paĝoj, 19 1/2 × 13 cm. Prezo. bindita eldono, 4.50 gmk.

Jean Forge, kiun mi admiris en *Abismoj*, donas al Esperanto novan verkon en ĉarma stilo kaj flua disvolvigado de originalaj scenoj. Kvankam mi ne opinias tiun ĉi verkon tiel alloga kiel *Abismoj*, oni ne povas ne diri ke la fantazio de Forge iras tre malproksimen kaj scias teni la leganton alforĝita al la libro ĝis la fino.

«Saltego trans ĵarmiloj» prezentas la travivaĵojn de elpensisto kaj liaj kolegoj, kiuj dank' al novaj ondoj aŭ radioj falas en la Romon de Nerono. La scenoj inter la pacaj romanoj kaj la dudekjarcentuloj, kiuj prenis kun si la diversajn modernajn eltrovojn, vekas ĉe ĉiu paĝo sinceran ridon. La aŭtoro tre lerte pentras ĉiun strangan tipon, precipe tiun de elpensisto Fromaĝi kaj profesoro Sovaĝi.

Forge elpruas denove ke li majstre regas la lingvon. Lia stilo estas iel speciala, tamen bela kaj komprenebla. Novajn vortojn li preskaŭ ne bezonas, ĉar li bonege konas la esperantan vortaron kaj ĝuste uzas por ĉiu senco la necesan vorton.

Erarojn mi ne trovis. Mi opinias neĝusta la uzon de «gastemo» (paĝoj 33, 35, 108) anstataŭ «gastamo». Tre kredeble pro preseraro oni trovas sur paĝo 120, linio 17, «siajn» anstataŭ «ŝiajn».

Resumante; bela romano lukse bindita kun tre malmultaj preseraroj. Mi varme rekomendas ĝin. — SALJO.

DEKLARACIO, de Takeo Ariŝima. Romano tradukita el japana lingvo de T. Tooguu. 11 & 12 volumo de Kolekto de «Internacia Mondliteraturo». Eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn (1) Leipzig, 1924. 125 paĝoj, 19 1/2 × 13. Prezo 2 gmk.

(1) Ni kun plezuro atentigas, ke la eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn, kiu tiel efike helpas la esperantan literaturon, daŭrigas la publikigon de la kolekto «Internacia Mondliteraturo», kies verkoj fariĝas tiel ŝatindaj. Ni petas niajn legantojn ke ili postulu en «Librejo CATALONIA», «Llibreria Italiana» kaj «Llibreria Nacional i Estrangera», kies adresoj estas diritaj en la rubriko «Fajreroj» en tiu-ĉi numero de K. E. la recenzatajn verkojn publikigitajn de la dirita eldonejo, kiu nuntempe estas okupata per la eldono de la dua parto de la granda Enciklopedio Vortaro de Wüster Ŝajne la esperantistaro ne ĝuste taksas la gravecon de la kolosa Enciklopedio, al kiu ĉiu esperantisto devas doni sian kunhelpon per aĉeto. Ankaŭ ĉiu Esperantisto devas rememori la «Enciclopedia Espasa», kiu apud ĉiu vorto en hispana lingvo donas la tradukon en Esperanto. N. de la R.

Novelo verkita en formo de leteroj inter du japanaj studentoj, kies opiniojn kaj sentojn pri amo kaj homa vivo la leganto plezure legas kaj meditas. La rakonto disvolviĝas en alloga atmosfero, kiu faras la romanon dolĉa kaj ĉarma.

La traduko havas kelkajn makulojn, kiuj tamen ne evitas mian laŭdon al la tradukinto, kiu donis al nia literaturo orientan verkon tra kiu fluas belaj konceptoj kaj pensoj.

Tooguu sisteme uzas prepozicion «krom» antaŭ infinitivo (22-foje) kaj post la sama prepozicio uzas akuzativon sur paĝo 42, kie oni legas «krom koron bruligantan». Nekorektaj mi opinias: «pasis la jaron» (52) «edziniĝisian fratinojn je homo» (70). Ankaŭ mi ne trovas ĝusta la kuneston de pronomoj «kiu vi» (100 k. a.). — SALJO.

SES NOVELOJ de Edgar Allen Poe, el la angla tradukitaj de A. Frank Milward. Volumo 13 de Kolekto «Internacia Mondliteraturo», eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 80 paĝoj, 19 1/2 × 13. Prezo 1'20 gmk.

La ses noveletoj estas belaj. Bonhumoro kaj sentimentaleco kuniĝas en la verko, donante impreson ke la aŭtoro reliefigas kiel fama verkisto. «Liĝeja» elfluigas mistikon tre kortuŝe kaj «La Homo kiu troviĝis eluzita» ellasas spriton tre ŝatindan. La ceteraj rakontoj estas legindaj ankaŭ.

Legante la verkon oni tuj konstatas ke la tradukinto estas bona stilisto. Tre malmultajn neologismojn kaj tre malmultajn preserarojn. Mi opinias eraro: «siaj» anstataŭ «liaj» en la frazo «Fortunato, same kiel siaj samjandanoj, estis ĉarlatano» (p. 34), «el tuj haltigi» anstataŭ «el tuja haltigo» (p. 53). En diversaj lokoj, post *pli ol* kaj *kiel* mi uzus akuzativon anstataŭ nominativo (p. 41, 54, 55). «Spite tion» anstataŭ «spite tio» (p. 66). Mi rimarkis «egiptanoj» (44) «Epigtujo» (49) «Egipto» (53). — SALJO.

INTERNACIA KOMERCA ADRESARO PER ESPERANTO, kolektita kaj eldonita de Rudolf Hoschek, Wien XVII, 1, Müglendergasse, 6, 184 paĝoj, 19 1/2 × 12. Wien 1924.

El la libro ni ĉerpas la antaŭparolon, verkitan de prokuristo F. J. SCHADE.

«Nun en via mano estas libro, kiu laŭcele kaj unuavice utilas al la komercistaro tutmonda. La unua komerca adresaro eliris kiel tre modesta membro en la amaso de la komercaj adresaroj tutmondaj.

Multaj komercistaj entreprenoj, kapablaj korespondi per Esperanto, tute ne respondis la alsenditan demandilon. Ankaŭ la agrabla fakto, ke tute senpage estas akceptitaj la necesaj informoj, ne multe pligrandigis la nomaron de la amikoj, kiuj nun la unuaj estas, ebligantaj la eldonon de la faka adresaro.

Multaj komercistoj memstaraj laŭ niaj spertoj opiniis, ke la laboro ne bone sukcesos pro tro optimisma pritraktado de la afero. Aliaj ne volis esti inter la unuaj instigantoj, kreantaj internacian servilon, vere la plej modernan por progresemaj komercistoj.

Oni povas esperi, ke la ekzemplo devigos grandan nombron de intereso, kiuj ankoraŭ ne kredis la efektivegeblon de helpilo esperantlingva por komerco kaj trafiko, tuj zorgi pri tio, ke la dua eldono, jam nun preparata, afestu la afablan akcepton de la adresaro, tiamaniere, ke la eldonanto estu devigata presigi la novan libron en almenaŭ duobla amplekso.

Kaj la prilaboranto de la materialo, samideano prokuristo Hoschek, unu el la pioniroj, kiu sen bruado tre diligente laboris sub la konvinko, ke niam vortoj sed nur faktoj povas ebligi la enkondukon de la komerca helplingvo neŭtrala en komercistaron, vere meritas la plej koran dankon de la samcela kolegaro.

Autaiĝen komercistaj esperantistoj, vi helpu atingi la dezirindan sukceson!» — SALJO.

Internacia Mondliteraturo-Volumo 14 — LA FIRMAO DE LA KATO KIU PILKLUDE — Aŭtoro: HONORÉ DE BALZAC; tradukinto: S - Paul Benoit; paĝoj 74, prezo 1.20 germanaj markoj. Eldonejo: F. Hirt & Sohn — Leipzig.

Nova volumo kiu venas ankoraŭ riĉigi la belan libron eldonitan de la firmo Hirt, al kiu certe ŝuldas dankon la esperantistaro: kiam ni vidos katalunan tradukaĵon en tiu bela internacia kolekto? S-ro Benoit en sia antaŭparolo kritikas la verkon de Balzac kaj rekonas ke en tiu ĉi verko lia stilo estas iomete peza, kaj ke oni sentas ke li verkis rapide: efektive tio estas vera; sed oni povas certe demandi kial do li elektis ĝuste tiun rakonton de la abunda franca aŭtoro por traduko en Esperanton? Mi pensas ke oni devus esti pli rigora koncerne la elekton de tradukotaĵoj, kaj ke el ĉiu aŭtoro estus bone ĉiam elekti tiujn verkojn kiuj plej bone lin prezentas antaŭ la publiko: tio neniel signifas ke oni ne legas la tradukon kun plezuro. Kelkaj esprimoj, miaopinie neŝatindaj, enŝoviĝis en la libron, ekzemple: ne jam, dum tiam, levinta kaj bedaŭri malĝuste uzataj; kion efektive signifas kuŝhelpi? Ankaŭ troviĝas diversaj preseraroj kiuj kvankam ne malhelpantaj la kompreneblecon, tamen montriĝas kiel foriginda makuleto en la bela kaj eleganta broŝuro. Mi devas nepre rekomendi la aĉeton kaj legadon de la traduko. Unu el la plej karakterizaj personoj en la romano de Balzac, la komercisto, estas efektiva portreto de la tipo, en Katalunujo konata sub la nomo S-ro Esteve; kaj kiam mi legadis la romanon mi ne povis ne esti frapata de la simileco inter la personigito de Balzac kaj la tipo ĉe ni kreita de Russinyol. La katalunaj legantoj ŝatos ja per si mem fari tiun komparon. — M. S.

Internacia Mondliteraturo - Volumo 6 — EL LA SKIZLIBRO — Aŭtoro: WASHINGTON IRVING; tradukinto: S-ro H. L. Elvin; paĝoj 65, prezo 1.20 germanaj markoj. Eldonejo: F. Hirt & Sohn. — Leipzig.

Bela verketo; bona traduko. Oni povas nur rekomendi ĝian legadon. Per ĝi oni povas fari al si ĝustan opinionon pri la valoro de tiu ĉi unua usona beletristika verkisto. La rakontoj el kiuj konsistas la libro ŝajnas jam iom malmodiĝintaj, sed tio neniel signifas ke la leganto ne ĉerpas plezuron en ĝia legado. Precipe plaĉa estas la lasta rakonto, kiu konservas ankoraŭ tute modernan valoron: la kontraston inter nobeloj kaj novriĉuloj. El ĝi mi ĉerpas paragrafon kiu tre fidele reliefigas konatajn tipojn ĉe ni: «La maljunulo estis la sola, kiu vere atentis la diservon. Li prenis sur sin la tutan devon de familia adoro, staris tute rekte, kaj elparolis la respondojn per laŭta voĉo, kiun oni povis aŭdi en la tuta preĝejo. Ŝajne li estis unu el tiuj absolutaj «eklezio kaj reĝo» homoj, kiuj kunigas la ideojn de adoro kaj lojaleco; kiuj opinias, ke Dio, en iu maniero, estas partiano de la registaro, kaj ke la religio estas «tre bona afero, kiun oni devas observi kaj subteni». — M. S.

Internacia Mondliteraturo - Volumo 15 — ORIENTAJ FABELOJ — Aŭtoro: ULAS DOROŠEVIC; tradukinto: S-ro Nikolao Hohlov; paĝoj 65, prezo 1.20 germanaj markoj. Eldonejo: F. Hirt & Sohn. — Leipzig.

Jen verko kiun oni legas kun efektiva plezuro. S-ro Hohlov perfekte konas Esperanton, kaj legante lian tradukaĵon oni sentas la plej agrablan ĝnon: tiun de korekta kaj eleganta lingvo. Oni povas nur bedaŭri ke liaj bonaj kvalitoj ne laboris sur pli interesa verkaĵo. Plej ĉarmaj ŝajnis al mi la rakontoj: La Kalifo kaj la krimulino — Kiel de Hasan falis la pantalonoj — La malĝuste trafitaj kalkanoj. Koncerne la lingvajn notojn de la tradukinto,

mi povas diri, ke kvankam eble iu, el la de li enkondukitaj neologismoj, povas ŝajni neoportuna, lia elekto estas plej ofte saĝe farita, precipe en la orientdevenaj, kiuj nepre altrudos sin en niajn vortarojn pli-malpli frue. — M. S.

Eldonaĵoj de la Societo de la Historio de la Milito - UNU EL LA PROBLEMOJ DE LA PACO-LA SENDANĜERECO DE FRANCUJO — Aŭtoro: S-ro ANDRE HONNORAT, Senatano, Eksministro; tradukis ĝin aro da francaj samideanoj kaj ĝin revidis S-ro Grosjean Maupin. — Eldonejo: «L'idée française a l'étranger» 11, Place de la Bourse, Paris. Paĝoj, 158, Prezo: 5 francaj frankoj. Ĉefdeponejo: Esperantista Centra Librejo, 51 Rue de Clichy, Paris, 9.

Tre interesa verko estas tiu ĉi: ĝia tendenco plaĉas al mi, sendepende de ĝia speciala propaganda celo, ĉar ĝi signifas novan paŝon antaŭen en la praktika uzado de Esperanto. Oni donu al ni ne nur beletristikajn verkojn, sed ankoraŭ librojn de ĝenerala publika intereso. Nia libraro estas ankoraŭ malriĉa da tiaj verkoj kaj por kompletigi nian literaturon estas necese multe pli da politikaj, ekonomiaj, teknikaj kaj precipe sciencaj verkoj. Ni ne povas prezenti al la publiko nian literaturon kiel studindaĵon tiel longe kiel ni ne havos en ĉiu fako de la homa scio taŭgan kolekton da libroj.

La temo de tiu ĉi libro, kiu prezentas unu el la plej gravaj problemoj nuntempaj naskitaj de la granda milito kaj de la packontraktoj, estas la priskribo de la nestabila situacio de Eŭropo kaj la projektoj diversloke elpensitaj por certigo de la paco en nia kontinento. Abunda kaj riĉa kolekto da dokumentoj kiuj bone elmontras la taskon faritan de la plej bonaj eŭropaj cerboj por doni solvon al tiu demando, kvankam ĝis nun la sukceso ne kronis tiajn klopodojn. Estas eble ke la sola certigo de paco kuŝas en la plialtigo de la morala nivelo de la diversaj popoloj, kaj en la plifortigo de internacia organizaĵo, kiel la Ligo de Nacioj, federacio organizita kiel Superŝtato kaj kun sufiĉa aŭtoritato por obeigi sin de la privataj nacioj. Ĉiokaze la solvo kuŝas ankoraŭ malproksime; eble la homaro ne estas ankoraŭ sufiĉe punita por ke ĝi devige pensu pri tia necesa tasko. — M. S.

F A J R E R O J

Librejoj por esperantistoj en Barcelona: — «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Italiana», Rambla Catalunya, 125, kaj «Nacional i Estrangera», Rambla Catalunya, 72. — La lasta akceptas abonon al «Esperanto Triumfonta» po 22'50 ptoj. jare. — Ni interesigis tiun librejon, kies mastro estas germano, pri «Esperanto Triumfonta», la interesa duonsemajna gazeto, sed ni devas plendi ke interŝanĝe de «Kataluna Esperantisto» ni ne ricevas ĝin. Samtempe ĉiuj esp. gazetoj en la mondo bonvolu noti ke de nun ni sendos du ekzemplerojn de ĉiu numero de «Kataluna Esperantisto» kaj petas de ĉiuj kolegoj ankaŭ la sendon al ni de du ĉiunumeraj ekzempleroj interŝanĝe. — La nomitaj tri librejoj en Barcelona bonvole ricevos katalogojn kaj propagandilojn de ĉiuj eldonistoj de esperantaĵoj, kaj servos ĉiujn mendojn. — Nun kiam nia movado tiel forte revigliĝas, kiam niaj proksimaj Kongresoj en Mallorca kaj Genève kaj la Radiotelefonio tiel generalige interesi-

gas pri la lingvo internacia, estis necese varbi Librejojn en Barcelono, kaj ni estas ĝojaj ke ni sukcesis ĉe tri el la plej gravaj.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Palma de Mallorca. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por premio per atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingo de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramatika» (kurs mit-ĵà) de Pompeu Fabra, kaj de la «Ekzercaro» de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de *kapablo* estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de *profesoreco* estas ankaŭ necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bona helpa libro estas la «Gramatika Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallès.

Movado. — Niaj agemaj grupoj «Lumon» en Terrassa, «Aplec Esperantista» en Sabadell, «Nova Sento», «Barcelona Stelo», kaj «Paco kaj Amo» en Barcelona, sukcese malfermis kursojn por komencantoj kaj por progresintoj. Niaj samideanoj Solà, Dalmau, Amades, kaj Grau paroladis en aŭ pri Esperanto, en Sabadell, Terrassa kaj Barcelona.

Por kotizoj kaj aliĝoj al Universala Esperanto-Asocio. — Ĉiuj gesamideanoj en nia teritorio povas adresi la pagojn ĉu poŝte ĉu persone al la adreso de la Delegito en Barcelono, València, 245, S-ro Dalmau. Ĉiuj estas petataj fari la pagon plej frue por faciligo en la organizo de U. E. A. kaj en la oficejo de la Delegito en Barcelona. Tie-ĉi ili estos persone akceptataj matene de la 9^a ĝis la 13^a kaj posttagmeze de la 16^a ĝis 20^a ĉiun nefestan tagon.

Utilaj adresoj:

Prez. de K. E. F., D. Dalmau, Carrer València, 245. *Barcelona*

Sekr. » » » » M. Solà, Carrer St. Francesc, *Terrassa*

Kas. » » » » R. Marsà, Carrer St. Joan, *Terrassa*

Prez. de la Loka Komitato organizanta la proksiman Kongreson de K. E. F., N. Bofill, Carrer Sindicat, 188. *Palma de Mallorca*

Lingvaj altrudoj. — Sinjoro Ventura (José), profesoro de Valencia Liceo, parolas je la nomo de la internacia esperanta sciencistaro kaj klarigas kiamaniere la homaj klopodoj fariĝas tuj homaraj akiraĵoj dank' al komunikebleco mara, aera kaj onda. Li certigas ke vera neŭtraleco ĉe rilatoj inter diverslandaj sciencistoj aŭ sciencamantoj ne ekzistos ĝis malaperos la lingvaj altrudoj kaj esprimas sian varman deziron ke Esperanto plej baldaŭ fariĝu la necesa interkomprenilo por la intelektaj laboristoj de la tuta mondo. — El «La Suno Hispana», oktobra numero, raporto pri la Esp. Kongreso en Cheste.

Gratulo al la Valenciaj samideanoj. — Vere meritata estas gratulo al la Valenciaj samideanoj. Okaze de la Unua Esp. Kongreso de ilia Esp. Federacio, en Septembro en Cheste, videbliĝas la frukto de iliaj fervoraj klopodoj por nia afero, celo kaj venko. — Ĉiam antaŭen, amikoj. Konstate frapadu!

Agrabla vizito. — Niaj filipinaj samideaninoj S-ino kaj F-inoj. Zamora vizitas nian landon kaj nin, ĉi-tieajn esperantistojn. Ni deziras laŭdi ilian konduton utiligi Esperanton, la homaran helpan lingvon laŭeble ĉiam. Efektive niaj orientaj samideaninoj flue parolas angle, hispane kaj france,

krom tagale, ilia natura lingvo. En Katalunujo ni grandnombre ankaŭ konas tiujn disvastigitajn naciajn lingvojn krom la kataluna.

Tamen tiuj ĝentilaj esperantistoj tre prave, juste kaj esperantisme evitas uzi fremdan nacian lingvon. Ili ĉiam parolas inter samideanoj en Esperanto kaj en nia lando ili scivolas pri la kataluna lingvo kaj ĉiuj katalunaj aferoj, same kiel ni interesigas pri la tagala lingvo kaj ĉiuj filipinaj aferoj.

Rememorigo. — En 1859, Decembro, 15, naskiĝis en Bielostok nia majstro, la kreinto de la lingvo internacia. — Ĉiuj grupoj interkonsentu organizi profitajn, efikajn memorigaĵojn. La homaro nin benos, se ni benas la unuan benindan: Zamenhof.

Lingva Komitato. — Elektoj. (79 voĉdonintoj; — Plimulto: 40).

Estas reelektitaj, laŭ IV. 4. 5. 1.^a de la Regularo, la sekvantaj elirintaj membroj:

S-roj Bünnemann (74 voĉoj), Bulthuis kaj Fischer (71 v.) S-ino Fluurens (Roksano) (70), s-ro Arnold (69), S-ino Reed (Kellermann) (68), S-roj Rohrbach (67), Reed (66), Bianchini, Degon kaj Underhill (64).

Estas elektitaj, laŭ IV. 4. 5. 2.^a de l' sama Regularo la sekvantaj novaj membroj:

S-roj Rousseau (76 voĉoj), Kamaryt (75), Obruĉev (74), Baghy (72), Jodko (60).

Paroladoj en Esperanto. — Post tiuj de Joan Amades pri Kataluna Folkloro, de Marian Solà pri Radiotelefonio, de Delfi Dalmau pri Spirito kaj Kulturo, kaj de Jaume Grau pri Angel Guimerà kaj liaj verkoj, estas okazontaj en nia societo «Barcelona Stelo», Marquès del Duero, 101, la jenaj legoj de poeziaj verkoj kun komentarioj de Jaume Grau:

La 22 Nov. pri «Johano la Brava», de la hungara Petöfi (trad. K. de Kaloksay).

La 6 Dec. pri «Amfitriono» de la franca Molière (trad. E. Legrand).

La 20 Dec. pri «Originalaj Poemoj» de Julio Baghy.

La 3 Jan. pri «Songö de Someromez Nokto», de la angla Shakespeare (Trad. Louise Briggs).

Praktiko de Esperanto. — L' «Interviú amb una noia filipina» publikigita en «La Publicitat» de la 14 de Nov. nunjara estas farita dank' al Esperanto kaj pere de Esperanto.

Nova adreso. — La malnova enurba societo «Paco kaj Amo» kiu tiel sukcese propagandas nian aferon en kvartalo Gràcia, transloĝiĝis al str. Ros d'Olano, 6, kie ĝi baldaŭ komencos la kursojn 1924-25. Kiel propagandilon de la novaj kursoj ĝi publikigis belan kaj trafan flugfolion en kataluna lingvo. Ni rekomendas al la barcelonaj samideanoj, ke ili ĉeestu la vendredajn kunvenojn de la nomita societo.

Gefianĉiĝo. — Nia belga samideanino Raphaele de Cock en Hoboken (Antwerp) kaj nia kataluna samideano Antoni Valls en Ripollet (Barcelona).

Nekrologo

Dum la lasta Septembro, niaj amikoj S-roj Joan Amades, Eks-prezidanto de K. E. F., kaj Eduard Capdevila, antaŭa Kasisto, havis la ĉagrenon perdi respektive sian patron kaj sian fratinton.

Ni esprimas al ambaŭ estimataj samideanoj nian sinceran kondolencon.

Kataluna antologio

de Modernaj Poetoj kaj Prozistoj.

Ni povas anonci ke oni laboras jam aktive en la pretigo de tiu ĉi grava verko, kiu certe estos bela elmonro de la laboremo de la kataluna esperantistaro. La libro, kompleta kolekto de la enlanda literaturo, pli ol sepdek niaj aŭtoroj, poetoj kaj prozistoj, estos reprezentataj en ĝi, enhavos 400 paĝojn, kun formato egala al tiu de nia gazeto, presita sur luksa papero kaj tole bindata. Ĝi estos, do, artaĵo.

Multaj esperantistoj laboris pri la tradukado, kaj kelkaj laboras ankorau sub la direkto de nia amiko, eksdirektoro de nia gazeto, S-ro Jaime Grau Casas. Oni povas, sekve, tute fidi je la lingva korekteco de la tradukoj kaj je fideleco al originaloj.

Ĉiu samideano devas nepre helpi la eldonon de tiu ĉi valora libro, kiu montros al la tuta mondo nian memstaran literaturon kaj konigos en la plej malproksimaj landoj niajn modernajn verkistojn. La malgrandaj lingvoj, kiel la nia, diris iam enlanda gazetisto, estas tiuj kiuj povas el Esperanto ĉerpi la plej grandan profiton. Ni memoru tion kaj tion konsciinte ne forgesu sendi vian aliĝon al la Eldona Komitato de la «KATALUNA ANTOLOGIO», kiu aperos tuj kiam la necesa nombro de aliĝoj estos kolektitaj por certigi la eldonon.

Por tio ni rekomendas uzi la aldonitan aliĝilon.



Efika propagando

En «La Publicitat» de la 16 Nov. nunjara aperis grava artikolo de nia estimata samideano D-ro J. Bremon, pri «Esperanto i Radiotelefonia».

Estatuts de la Kataluna Esperantista Federacio

Article primer.—Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer.—Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuïran al seu sosteniment amb la quota mínima de SIS ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que'ls membres individuals i sos membres podran pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi els Presidents s'en endran amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació» al qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en què ho cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial interès en allò que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. cinqué.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-President, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El carrec de Caixer-administrador serà permanent. El designat continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisé.—Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer els comunicats necessaris per als efectes de l'article segon i altres particulars del règim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podran retenir-se, si ho creuen convenient en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. Seté.—El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia, es donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, es nomenaran els individus que hagin de formar el Comitè per al següent exercici, i es discutiran les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuité.—El Comitè estarà facultat a crear les seccions que cregui més convenientes a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. nové.—Tots els acords de les Assemblees i Congressos seran pressos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desé.—Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament hauran de presentar-se en temps convenient a ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. onzé.—La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la Catalana en les Assemblees.

Art. dotzé.—En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.» els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Officejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Art. transitòri.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona, carrer del Carme, 30, pral.

Registrats i aprovats pel «Gobierno Civil de la Provincia» de Barcelona).